Esperanto en servo de la monda paco



paco

ORGANO DE LA MEM-SEKCIO DE GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO



1987

Georg Grasnick

Ĉe la ŝaltposteno de psikologia militado:

Triunuo de tutmondismo, kontraŭkomunismo kaj politiko de bridado

La lasta kunveno de la membroŝtatoj de la Varsovia Kontrakto 1986 montris en konstruiva maniero, kion nia mondo en la nuklea epoko bezonas antaŭ ĉio. En Budapest oni substrekis la ĉefan linion de la eksterpolitikaj klopodoj kaj aktivecoj de la socialisma koalicio por fundamente plibonigi la nuntempe komplikan internacian situacion. La batalo por la finigo de la vetarmado, por la transiro al vera malarmado kaj la forigo de militdanĝero estas daŭrigata pli forte. La kunveno subtenis la programon de Sovetunio liberigi Eŭropon kaj la mondon de nukleaj armiloj kaj de aliaj amasneniigaj armiloj ĝis la jaro 2000 kaj kompletigis ĝin per iniciativoj por radikala reduktado de la konvenciaj armiloj kaj armeoj en Eŭropo. Por komplekse aliri la problemon de malarmado oni samtempe konkretigis la unuopajn paŝojn kaj prezentis internaciajn procedadojn de ĝia plenumado kaj kontrolo, ĉe tio konsiderante imagojn, restriktojn kaj objetojn de okcidenta flanko. – . . .

Kiel la plej agresivaj fortoj vidas la mondon

En forta kontraŭdiro al tio precipe Usono entreprenas pli kaj pli novajn aktivecojn por daŭrigi la vetarmadon, antaŭ ĉio en la nuklea sfero. Per ampleksa, ĉefe kontraŭsovetia kalumnia kampanjo kaj per ĉiam novaj variantoj de la monsogo esti minacata, oni volas pravigi la vetarmadon kaj agresemon de la plej reakciaj rondoj en Usono. Per la anoncita eksiĝo el la SALT-II-kontrakto, Washington celas subfosi ĉiujn gravajn kontraktojn kaj interkonsentojn, kiuj estis faritaj inter la lastaj tri usonaj administracioj kaj Sovetunio, dubindigi ĉiujn ajn intertraktadojn pri armadĉesigo kaj malarmado kaj detrui la militarisman egalrajtecon, sur kiu baziĝas la strategia ekvilibro, kaj la strukturon de la internaciaj rilatoj.

En spirita-ideologia rilato tiu ĉi kurso estas flankita de multspecaj praktikoj kaj metodoj de la psikologia militpreparado. Por ebligi al si, kiel oni pensas, senbridan manipuladon, Usono eksiĝis el UNESKO kaj decidaj novkonservativaj rondoj pledis por nuligo de la „Internacia konvencio pri la uzo de radiofonio en la intereso de la paco". La likvido de tiu ĉi konvencio, kiun, cetere, Usono neniam subskribis, kontribuu, tiel oni demagoge klarigas, al „libera informfluo" inter la landoj. La kredo je tiu ĉi „libera informfluo" rezultas el la stranga vidpunkto, el kiu Washington rigardas la mondon kaj laŭ kiu estas „la komunismo la ĉefa danĝero en la mondo". La konkludo por la adekvata propagando skizis „Washington Post" antaŭ nelonge per la vortoj, „kio ajn en la mondo okazu – ni imputos tion al Sovetunio".

La vidpunkto, el kiu la plej agresivaj fortoj de la usona imperiismo rigardas la mondon, baziĝas je la „triunuo de tutmondismo, kontraŭkomunismo kaj politiko de bridado", kiel tion akcentis la usonaj politologoj C. W. Kegley kaj E. Wittkop.

La kulto kun la perforto

La longdaŭre preparita kampanjo por akcelita militema kontraŭsovetia kaj ŝovinisma manipulado de la usona loĝantaro reflektiĝas ĉefe en filmaj kaj televidaj produktaĵoj. „Hollywood ree malkovris la malbonan imperion", opiniis „Washington Post". La pliakrigo de la kontraŭsovetia kalumniado helpe de filmoj el Hollywood limiĝas en sia efiko neniel nur je Usono. Usono eksportas ĉiujare pli ol 250 000 da televidaj programhoroj. Per tio ĝi regas la mondan merkaton. Aldoniĝas, ke ĉiuj internacie agantaj distribuaj firmaoj troviĝas en usona mano. Per la apero kaj la disvastigado de la privata televizio en okcidenta Eŭropo plivastiĝas la eblecoj por la ekspansio de la usonaj filmkonzernoj. Socialdemokrataj, liberalaj, sed ankaŭ konservativaj politikistoj parolas jam nun pri „usonigado" de la televidaj programoj en siaj landoj.

Je preteksto de protekto kaj defendo de la „okcidentaj valoroj minacataj de la komunismo" okazas sistema demoralizigo kaj vandalizigo de la kulturo helpe de la psikologia militado fare de la plej agresivaj fortoj de la imperiismo kontraŭ la propraj popoloj. La kulto kun la perforto festas malgajajn rekordojn en pli kaj pli multaj filmoj.

Kiel baza kliŝo „la rusoj" estas malbonfamigataj kiel „sangavidaj kaj senanimaj subhomoj". „Washington Post" karakterizas tion tiel: „La rusoj atakas nin en ondoj, instruas al ni rigorajn lecionojn pri la danĝero de neprepariteco". En ne malmultaj filmoj oni ekscitas emociojn, se „rusoj, nikaragvanoj kaj kubanoj" uzurpas la „landon apartenanta al Dio". „En seninterrompa vico de usonaj filmoj", konstatas radiostacio en FRG, svarmas „sovetiaj banditoj, kiuj atakas la bonan Amerikon". Konforme al tiu kliŝo usona televida kompanio produktas kun kostoj de preskaŭ 40 milionoj da dolaroj, la 16-partan serion „Ameriko". La legendo de tiu ĉi serio diras, ke per puĉo Usono fariĝis „satelitŝtato de Sovetunio". Aŭ: En la hollywooda filmo „Invado en Usono", kiu estas prezentata ankaŭ en okcidenteŭropaj landoj, estas skuata „la usona demokratio en siaj fundamentoj", kiel oni skribas en filmreklamo, de „hordo de internaciaj teroristoj, subtenataj de komunistoj". Sobraj usonaj kritikistoj nomas tiun ĉi filmon „abomeninda, brutala kaj sadisma".

„Radioaktiveco" – slogano por malfermi novan „merkaton" al la minaco el la Oriento

La sekvoj de longjara intensiva kontraŭsovetia kalumniado montriĝas en stereotipaj imagoj en la konscio de multaj usonaj civitanoj. Laŭ enketo farita de Harris-instituto en la jaro 1984, 74 % de la demanditoj opiniis, ke „la ĉefa problemo de niaj rilatoj al la mondo de la komunismo konsistas en tio, ke ĝi minacas niajn religiajn kaj moralajn valorojn". Se „ni estus malfortaj, Sovetunio surprizatakus nin kaj niajn aliancanojn en Eŭropo kaj Japanio en konvena momento", opiniis 65 %. Evidente tiuj ĉi kvotoj estu ŝanĝotaj per la nova kampanjo ankoraŭ pli favore al la ambicioj pri mondregado de la plej agresivaj fortoj de la lando.

Samtempe usonaj novkonservativuloj kaj ekspertoj pri psikologia militado observas zorgeme kontraŭajn tendencojn en okcidenteŭropaj landoj. Tiel parolas Irving Kristol pri „poltrona pacifismo" kaj Norman Podhoretz pri modernaj formoj de la „trankviligo" en okcidenta Eŭropo. Burĝa FRG-gazeto priskribas la animstaton de politikistoj dum la militologia kunveno en München, en marto 1986 jene: „Se temas pri pentrado de malarmadaj ĥimeroj, ĉiuj partoprenantoj faras seninterrompe neĝurajn falsajn depoziciojn pri la realaj analizoj de minaco. Tio nun venĝas sin." Kaj en „NATO-letero" estis rimarkita, „ke kontraŭsovetiaj sintenoj ne plu lasas sin transformi en regeblan ekkonon de senpera, evidenta minaco". Usona politologo notis: „Ekzistas la danĝero, ke en la publika opinio en la NATO-landoj la sekurec-politiko de Washing-

ton estas komprenata pli kaj pli kiel kaŭzo de la streĉoj inter Okcidento kaj Oriento anstataŭ kiel pravigita reago". Konsidere al tiaj ĝeneralaj tendencoj la reprezentantoj kaj defendantoj de la konfrontada politiko sentis la averion en la nuklea elektrocentralo en Ĉernobil kiel „donacon de la ĉielo". Nun malfermiĝas al la minaco el la Oriento nova merkato helpe de la slogano – „radioaktiveco". En Usono tio okazas en la plej ekstremaj kontraŭsovetiaj formoj, en FRG per la plej malbona hipokritado, en abomeninda kampanjo, kiu faligis ĉiujn kelkloke mem almetitajn „katenojn de prudento", kaj en kiu „miksiĝas histerio kaj delico", kiel tion taksis tiea gazeto.

Por kontraŭi moligon de la kontraŭkomunisma kaj kontraŭsovetia bildo de malamiko en okcidenta Eŭropo kaj akceli la psikologian militgvidadon, la usona agentejo por eksterlanda propagando USIA, disvastigas ekde aprilo 1985 per la franca ECS-kanalo televidajn programojn por okcidenta Eŭropo. La usona eksterlanda radioprogramo „Voice of Amerika" estas nun aŭskultebla en okcidenta Eŭropo. Oni planas elradii usonan televidan programon el Okcidenta Berlin.

„Ramboigado" de la socio

Por kontraŭagi al profiliĝintaj pozicioj de nova pensado kaj de internacia sekureco en la senco de ĝenerala sekureco de la ŝtatoj, kaj al la penado pri akordiĝo kun USSR por bremsi la vetarmadon, oni alstrebis ampleksan „ramboigadon" de la socio kaj politiko". Kion signifas tio?

Rambo, ĉefa heroo de fiagita militfilmo, revenas kiel iama usona soldulo, dek jarojn post la milito, al Vjetnamio. Laŭdire li volas tie liberigi militkaptitojn kaj torturitajn usonajn soldatojn el la manoj de vjetnamanoj. Per tranĉilo, pafarko kaj sago, mitraleto kaj eksplodaĵo li masakras ĉion, kio krucas lian vojon. Kio estas la ĉefa intenco de la filmo? Se ĉiuj estus batalintaj kiel Rambo, la milito en Vjetnamio ne estus malgajnita. La usona prezidento korektis: „Vjetnamio tute ne signifis malvenkon. Oni nur simple retiris la soldatojn."

Dumtempe jam delonge prezentiĝis sur la ekranoj „Rambo IV". Ĝi volas montri al la mondo – la agado estas fremdigita kiel boksbatalo „kontraŭ la rusa batalmaŝino Ivan Drago" – „kion la usonanoj vere estas – la venkantoj". La venkantoj en la batalo por la novordigo de la mondo.

La „ramboigado" de la politika debato, de la politika stilo, de la politika kulturo okazas en tiu maniero, ke la tuta socia realeco estu „ĉiam pli transformata al bildstrioj kaj al simpligita rakonteto pri bono kaj malbono", kiel skribas FRG-gazeto. Komplikitaj sociaj aŭ politikaj okazintaĵoj kaj procesoj estas simpligitaj al nur kelkaj bazaj kliŝoj: bona – malbona, humana – brutala, kuraĝo – timo, Usono – komunismo, patriota – kontraŭusona. Tiu ĉi simpligado estas miksata kun brutaleco. En televida elsendo en FRG oni pri tio diris: „Ju pli teruriga estas la bildo, kiun oni prezentas al si pri elpensita malamiko, des pli ekstraordinara oni trovas sin mem . . . La nova patriotismo bezonas bildojn de malamikoj. Por nova Superman-figuro – ‚Rocky IV' – oni varbas per jena slogano: ‚Preparu vin por la 3-a mondmilito'."

Tiel oni plialtigas la enhavon je brutaleco kaj krudeco en usonaj filmoj. Laŭ kalkuloj, faritaj en la citita elsendaĵo, ĝis sia 15-a vivojaro usona infano povis vidi sur la ekrano 10 000 mortigojn: „ekzekutojn, mortpafadojn, krevigitajn kraniojn."

La spirita polucio kaj ruinigo de la vivmedio estas akcelata pere de televidaj kasedoj. Ĉirkaŭ 70 % de usonaj televidaj serioj temas rekte aŭ malrekte pri milito aŭ bataloj. En la jaro 1984 preskaŭ la duono de la FRG-debito de televidaj programoj apartenis al la kategorio „Hororo, milito, batalo". Proksimume 70 % de elektronaj televidaj ludoj estas adaptitaj laŭteme al milito, respektive detruigo. Tabulaj ludoj, militaj ludoj, de kiuj ne malmultaj estas produktataj en Usono, havas konjunkturon. Ĉe la ĵetkuba tablo oni okazigas la „plej rigorajn batalojn". Multaj okazas sur la „eŭropa militscenejo".

Komence de tiu ĉi jaro sur la usona merkato aperis la nova ludo „Milito de fotonoj". La ludantoj povas gvidi etdimensian laseran astromiliton. Tiucele ĉiu ludanto estas ekipita per kolora ŝirmkasko kaj lasera pistolo. La lasta kapabligas lin eksplodigi duonon de la mondo sidante ĉe la ludtablo. En Usono oni eldonis por tiaspeca „distro" „Kompletan militludan manlibron".

La brutaliĝo prezentita en diversaj formoj, kiel tion montris esploroj, interligas la prezentadon de civila perforto en la amaskomunikiloj „kompletige kun la prezentado de milita perforto". Ambaŭ formoj sufiĉe precize respegulus kutimajn imagojn pri perforto kaj havus sian politikan funkcion. Sendube la alkutimigo al la perforto kaj ĝia apliko, ĝuste ankaŭ al la milita, estas celo de la psikologia militpreparado. Analizoj kaj esploroj pri la efikoj montras, ke konstante perceptita prezentado de perforto k.a. en la amaskomunikiloj instigas la personan perfortecon respektive kaŭzas indiferentecon aŭ alkutimiĝon al la perforto . . .

El „Horizont" n-ro 8/86.
Tradukis Renate kaj Dieter Berndt

David Irving

El Kroniko de la aeratako al Dresden 1945

La unua atako

La 13-an de februaro, je la 21-a horo 55: aviadila alarmo. Alflugas 244 kvarmotoraj Lancaster-bombaviadiloj de la RAF. Sur la celplano ne estas militaj kaj industriaj objektoj. Ĉitempe en Dresden troviĝas ĉirkaŭ 630 000 loĝantoj kaj proksimume duona miliono da fuĝintoj kaj evakuitoj. La pilotoj renkontas neniun kontraŭaviadilan defendon. Je la 22 h 13 komenciĝas la bombardado per grandeksplodaj bomboj. Poste ĉirkaŭ 400 000 termitaj kaj flamradiaj brulbomboj en ventumilforma area faligo. La atako daŭras 24 minutojn kaj realiĝas horore precize kaj rapidege. La antaŭplanita fajroŝtormo, kiu devis malebligi estinglaborojn kaj savadon, disvolviĝis jam ĝis la 23-a horo.

La dua atako

Neniu alarmado, ĉar jam ne laboras la grandalarmaj sistemoj. 529 Lancaster-bombaviadiloj de la RAF flugas kontraŭ Dresden kaj faligas 4 500 grandeksplodajn bombojn kaj 172 000 brulbombojn. La atako daŭras de 01 h 22 ĝis 01 h 54. Entute la brita aerarmeo ĉinokte faligis super Dresden bombŝarĝon de 2 978 tunoj. La fajroŝtormo atingas laŭ atestaĵoj de britaj pilotoj potencon de uragano, la supreniĝanta varmego de la flamomaro sentiĝas ĝis en la pilotejojn de la flugmaŝinoj.

La tria atako

Frumatene de la 14-a de februaro alflugas 316 „flugantaj fortikaĵoj" kaj ĉirkaŭ 200 ĉasbombaviadiloj de la 1-a Usona aviada divizio al Dresden. Ĉirkaŭ 12 h 12 komenciĝas la tria area bombardado per 1 500 grandeksplodaj kaj 50 000 brulbomboj. Ĝi daŭras dek unu minutojn. La bombŝarĝo sumiĝas je 783 tunoj. Poste, je la 12 h 23, komencas la akompanantaj ĉasbombaviadiloj de la 20-a USAF-ĉasgrupo laŭordone la malaltflugajn atakojn kontraŭ „okazaj celoj": torentoj de fuĝantoj, savadaj grupoj, plenŝtopitaj stratoj, homamasiĝoj kiuj serĉis rifuĝon sur la Elbo-herbejoj kaj en la Granda Ĝardeno.

La „Operacio tondrobato", kiel estis la milita kodnomo por la trifoja elaera atako, finiĝas per kruela amasmurdado. Dresden brulas dum ok noktoj kaj sep tagoj . . .

(RAF: Royal Air Forces = la brita aerarmeo, USAF: US-Air Forces = la usona aerarmeo)

El „DDR-Revue" 1/85 trad. Ulrich Becker

La diablaj rifoj de SDI

Ŝajno kaj realo de danĝera programo

Kun Robert Knuth kaj Heinz Kautzleben parolis Werner Müller-Claud de la revuo „Sonntag"

„Sonntag": Sovetunio denove plilongigis sian unuflankan moratorion por nuklearmilaj testoj. La usona administracio komunikis pere de parolanto, ke oni tamen daŭrigos la subterajn nuklearmilajn testojn. Samtempe oni antaŭenpuŝas SDI. Oni ekhavas la impreson ke estas interligoj inter la testoj de diversaj armilspecoj. Ni provu ĉi-tie iom pli profunde tralumigi la danĝerajn planojn de Usono precipe koncerne SDI. Ekzemple, klarigas militistoj, ke oni tre sukcese ellaboradas partiklajn armilojn. Estas testataj grandlaseroj. Ĉu ĉiuj ĉi armilspecoj estas preparoj por armado en la kosmo?

Robert Knuth: Jes, kaj ne nur tiuj ĉi. Aldoniĝas ekzemple ankaŭ elektromagnetaj kanonoj, kugletaĵaj raketoj kaj tere apogitaj kaptoraketoj. La rentgenlaseroj apartenantaj al la SDI-programo baziĝas sur la principo ĉirkaŭi kosman batalstacion per erinacforme ordigitaj kaj unuope direkteblaj metalaj bastonoj kiuj precize direktitaj al la alflugantaj raketaj kapoj aŭ satelitoj, fulmrapide vaporiĝas pere de eksplodo de instalita en la stacio nuklea aŭ hidrogena bombo – kaj nur ili povas estigi la necesajn enormajn temperaturojn – kaj elsendas intensivan rentgenan impulson en la direkton de la bastona akso por neniigi la celon. Unu „kaŭzo" por la daŭrigo de la subteraj nukleaj testoj fare de Usono en la dezerto de Nevada pro tio estas la evoluigo de taŭgaj nukleaj eksplodiloj. Aliaj „kaŭzoj" konsistas en la laboroj pri la „hardado" de satelitaj kaj raketaj partoj kontraŭ radiaj efikoj kaj en la forte antaŭenpuŝita evoluigo de ĉiam pli subtile elpensataj nukleaj eksplodkapoj por la usona raketa arsenalo. La absolute logika unua paŝo por la forigo de ĉiuj nukleaj armiloj, nome la rezigno je ilia teknika pluevoluado, pro tio tute ne konvenas al la koncepto de Reagana administracio.

Oni celas SDI-komponantojn kiel tute novan generacion de armilaj sistemoj kies militteknikaj efikoj ĝis nun en nenia maniero estas superrigardeblaj. Neniakaze tiuj ĉi sistemoj povas kontribui al stabileco kaj malstreĉiĝo, ĉar oni ja deklaris ke ili servas al la celo de Usono forigi la strategian ekvilibron por ĝia unuflanka avantaĝo. La inkludo de la kosmo kiel areno de vetarmado kreas por multaj problemoj novan dimension, ĉar tiel aldoniĝas al la regionaj rigardomanieroj ankaŭ tutmondaj. La apliko de amasmortigiloj en la kosmo estas malpermesita laŭ la kosmokontrakto de 1967, kaj la realigo de rentgenlasero estus tute klara kontraŭago kontraŭ tiu ĉi kontrakto. Sed ankaŭ la planitaj en la SDI-programo aliaj armilspecoj kiuj ne estas en tiu ĉi kategorio havus ĉe ilia apliko katastrofecajn efikojn. Ekzemple tersatelitoj estas pro iliaj ekzakte konataj trajektorioj kaj pozicioj relative facile atingeblaj kaj detrueblaj celoj. Ekde jaroj ili estas uzataj por la kontrolo de la observado de kontraktoj, por la reciproka prigardado kaj por la longdistanca radiokomunikado.

Planludoj de Usono projektas dum serioza kriza situacio kaj por neobservata preparo de unuafrapo „surdigi, mutigi kaj blindigi" la kontraŭulajn satelitojn. Sed kio okazus, se en streĉa situacio grava skoltada satelito pro tute normala teknika eraro fariĝus malkapabla funkcii? Ĉu ne la koncernata flanko povus miskompreni tion kiel „militan deklaron"? Kaj: Pro tio ke post instalado de SDI-sistemo la antaŭavertaj kaj reagaj tempoj ŝrumpas al minutoj ĝis sekundoj kaj multaj reagoj – ĉar ĉio estas aŭtomatigita – okazas eĉ sen influeblo de la homo, la sekvoj povus esti katastrofaj.

Heinz Kautzleben: Mi deziras aldoni jam ĉiloke, ke la unue por la kosmo planitaj novaj armilsistemoj kaŭzus malekvilibron ankaŭ ĉe la tiel nomataj konvenciaj armiloj. Lasera armilo, kiu ankaŭ sen atombombo kiel energifonto povas detrui sateliton estas uzebla ankaŭ surtere, ekzemple por kontraŭbatali tankojn. Tia lasero povus esti radiita de plialtigita loko – eble de aviadilo – kun tre longdistanca efiko. La sama validas ankaŭ por partiklaj armiloj kaj aliaj sistemoj. Oni povus do rezigni pri la atombombo. Oni ŝanĝus unu amasmortigilon kontraŭ alia. Pro tio nia pritakso estas bone motivita, se ni diras ke per la planita militigo de la kosmo fare de Usono estus kreata tute nova situacio. Malarmadaj intertraktoj, ekzemple, devus inkludi ĉiujn ĉi novajn armilojn, kio preskaŭ malebligus malarmadan sukceson. Unu el la ruzaĵoj de usona administracio kaj de la NATO-strategiuloj konsistas en la deklaro: „Sed ni ja estas por intraktoj!" Reagana administracio volas ekzemple intertrakti pri strategiaj atomarmiloj. Samtempe kun tiu „preteco" ĝi oferas tamen ĉiam antaŭ aŭ dum la intertraktoj novan armilon, kiu vere egaliĝas al laŭtradicia amasmortiga armilo, kaj ebla intertrakta sukceso denove estas neniigita. Antaŭ nelonge parolistoj de NATO deklaris ke oni konsentiĝis kun la enkonduko de novaj ĥemiaj armiloj – kaj tio dum la intertraktoj en Ĝenevo!

„Sonntag": Multaj, ankaŭ fakspertaj elstaruloj de la tekniko de raketaj armiloj dubas pri tio ke raketa defendo iam plene funkcios. Vi jam menciis ke la intencita de Usono armado de la kosmo, spite al eblaj eraraj kalkuloj koncerne ĝian funkciadon, kaŭzus danĝeran militan malekvilibron inter la grandpotencoj Sovetunio kaj Usono. Tamen ni traktu la demandon, ĝis kiom povas funkcii raketa defendo kaj ĝis kiom ne.

Knuth: Oni vere rajtigite povas dubi pri la fizika-teknika funkciado kaj la ekonomia realigeblo de multaj komponantoj de SDI-koncepto, sed ankaŭ ne estas naturaj leĝoj kiuj ilin farus maleblaj. Kaj unuopaj armilaj sistemoj povas sendube esti uzeblaj, se eble nur post pli longa tempospaco. La funkcion de aŭtomate poststirebla adaptiĝa optikaĵo, kiun batala lasero nepre bezonas, Usono jam sukcese testis pere de reflektoj ĉe la Shuttle-fenestro. Celserĉantaj kaptoraketoj lanĉitaj de F-15-ĉasaviadiloj jam pruvis sian uzokapablon por la detruo de tersatelitoj. Ekzistas teknikoj por la forkapto de raketaj kapoj dum ilia lasta flugfazo post la reemergiĝo en la teratmosferon. Pluraj el la „konvenciaj" armilsistemoj por SDI, kiel elektromagnetaj kanonoj por la plirapidigo de malgrandaj metalgloboj al pli ol 10 km/s kaj satelitoj kun kugletaĵopafraketoj laŭ la revolvera principo, estas esence nur ekonomia problemo. Jam la per ili atingebla armilteknika antaŭiĝo havas malstabiligan efikon kaj necesigas ĝustatempajn kontraŭreagojn.

Ankoraŭ iom ekzotikaj ŝajnas la konceptoj de Usono detrui sovetiajn raketojn pere de laseraj radioj jam dum la startfazo. Se pro la necesa enorma elektra povumo tia batala lasero estos starigita sur la teron, ĝia forsendita radiado devos esti direktita al granda, stirebla spegulo en orbito kaj kongrua al la tera rotacio, kaj plue al pli malgranda batalspegulo en alteco de ĉirkaŭ 1 000 kilometroj, kaj de tie al la celo. Ĉar tio teknike ŝajnas nerealigebla, restas kiel alternativo por la realigo de la projekto nur la uzo de tiuj laseroj sur orbitaj satelitoj kun maso de pli ol 100 tunoj. Sed ĉar satelitoj rivoluas ĉirkaŭ la tero dum 90 minutoj kaj pro tio havas donitan celregionon nur dum malmultaj minutoj en la vidsfero, la laŭnombra bezono de tiuj satelitaj batallaseroj estus granda. Unua takso de antaŭ kelkaj jaroj rezultigis bezonon de almenaŭ 532 tiuj batalstacioj. Intertempe en Usono daŭrigitaj taksoj pri la efikoj de kunigo de la raketaj siloj en malgranda teritorio kaj de samtempa

amasa lanĉo rezultigis multe pli altan nombron de necesaj batalstacioj, nome 1 400. Krome jam nun ekzistas multaj konataj kaj relative facile realigeblaj militteknikaj reageblecoj kontraŭ tiu lasera koncepto, kiel la plimallongigo de la bruldaŭro de la lanĉraketoj de 300 al 50 sekundoj, speguligo de la raketa surfaco, surmeto de keramikaj protektaj tavoloj kontraŭ fandiĝo, aŭ ankaŭ ŝajna plimultigo de la en la kosmo lanĉataj raketaj kapoj per konvenaj, de la originala eksploda substanco apenaŭ distingeblaj imitaĵoj. Sed ĉiuj ĉi ebloj ne povas luli USSR en senzorgeco. Ĉe daŭrigo de la SDI-koncepto ĝi estus devigita ellabori por si mem konojn pri la potencoj de ĉiuj planitaj armilsistemoj. Se iu nokte direktas al mi en tenebra aleo pistolon, ja mi tiam ankaŭ ne povas unue certiĝi ĉu ĝi estas funkcikapabla aŭ nur ludilo. Mi devas agi laŭ la plej malagrabla eblo.

Kautzleben: Mi deziras ankoraŭ iom kompletigi la lastan frazon de kolego Knuth. La danĝero en tiuj planoj, por kies realigo oni ja intense laboras, konsistas inter alie en tio ke la antaŭkalkulebla risko estas forigita, tio estas, nenio estas plu detale kalkulebla. Usonaj fanatikuloj ekzemple vere povus opinii ke ili estus kreintaj sistemon kiu permesas malebligi duan frapon de la kontraŭulo. Kaj lando kiel Sovetunio kiu havas tiom da spertoj kun imperiismaj reĝimoj povas en tia situacio fari sian defendan kalkulon ne laŭ la plej malgranda el la ebloj. Estus necesaj optimumaj kontraŭpaŝoj. Kia ŝarĝo tio estus ne nur por Sovetunio, ne nur por la socialismaj landoj, sed por la mondo entute, tion ĉiu povas imagi. La solvon de tutmondaj problemoj kiel la nutrado de la mondloĝantaro, la prigardo de la ĉirkaŭaĵo kaj alio estus prokrastata, la paco fariĝus tute ne pli sekura. Oni ne povas garantii la estonton de la tero per ĉiam pli da amasmortigiloj kaj konfrontado, sed nur per radikala malarmado kaj konfidoplena kunlaboro. Tiu ĉi kunlaboro trovas bonan grundon, se Usono finfine akceptas la proponon de Sovetunio forigi ĝis la jaro 2 000 ĉiujn atomarmilojn, se ĝi nun sekvas la ekzemplon de Sovetunio kaj ĉesigas siajn subterajn atomarmilajn testojn.

„Sonntag": Niaj fakuloj kaj politikistoj diras ke ĉe SDI temas ne pri defenda sistemo, sed pri sistemo de novaj atakarmiloj. Ĉu tio kompreniĝas tiel ke oni el de la kosmo povus ankaŭ pli bone ataki surterajn celojn en Sovetunio, ekzemple raketajn bazojn?

Kautzleben: Tio certe ankaŭ estas intencita, sed nuntempe ebla nur en limigita mezuro. Lasero kiu el de la kosmo povus malfunkciigi sovetian raketosilon ankoraŭ ne ekzistas. Se ni parolas pri atakarmiloj, tiam nia pritakso koncernas precipe la eblan kaj intencitan detruon de skoltadaj kaj observadaj satelitoj kaj ankaŭ aliaj porsekurecaj instalaĵoj en la kosmo. Tiuj ĉi satelitoj apartenas al la defendosistemo de la koncerna lando, kiu ilin detruas, estas atakanto. Malantaŭ la intenco detrui tiun ĉi sekurecsistemon dum provo de surpriza preno sin kaŝas la ideo de „malkapiga bato". Oni volas malebligi al la kontraŭa flanko reagi ĝustatempe kaj en ĝusta mezuro.

Asertoj pri tio ke Usono neniam farus tion post plena instalo de siaj kosmaj armiloj ne estas fidindaj. Estas en Pentagono ĉe kelkaj militistoj, ĉe homoj de industria-milita komplekso, eĉ ĉe kelkaj obstinaj sciencistoj – mi pensas pri Edward Teller – sufiĉe da revadoj de tiu speco. Certaj teknologiaj sukcesoj grimpigas la fantazion de ne malmultaj revuloj pri unua frapo en neracionalajn sferojn – ni konas tion el la historio. Kaj tiu kredo pri la ĉiupovo de certaj teknologioj danĝerigas SDI ankaŭ flanke de ĝiaj ordonodonantoj.

Knuth: Armiloj kun pure defenda karaktero en la praktiko ne ekzistas. Decidaj ĉiam estas la intencoj kiuj estas la bazo por la uzo de la armiloj. Se en la antikva epoko du militistoj staris vid-al-vide kun glavoj, kaj unu el ili pluse ricevis ŝirmilon, tiam li ja restis ankaŭ estonte vundebla, sed la sento de plibonigita sekureco plifortigis sendube lian atakemon pro dumtempa pli oportuna pozicio.

La origina celo de la SDI-programo konsistas ja ankaŭ laŭ la vortoj de prezidanto Reagan en tio, malefikigi kaj superfluigi atomraketojn kaj ricevi ŝirmon de la tuta Usona teritorio. Nu, la unua celo povus esti realigebla per akcepto de la proponita de kamerado Gorbaĉov iom-post-ioma forigo de ĉiuj nukleaj armiloj ĝis la jaro 2000 rapide kaj malmultekosta. La alia celo, nome ricevi ŝirmon por la tuta usona teritorio estas plene neracia, ĉar eĉ ĉe plene funkcianta SDI-sistemo trapasus ankoraŭ tiom da procentoj de interkontinentaj raketoj, ke ili sufiĉus neniigi Usonon. Krome – kaj pri tio oni volonte silentas okcidente – SDI tute ne ŝirmas kontraŭ mallongdistancaj raketoj de submarŝipoj, kontraŭ malalte flugantaj direkteblaj flugilraketoj kaj bombaviadiloj! Kaj por la eventuale planita defendo de la propraj raketosiloj oni ne bezonas armilsistemojn en la kosmo. Kio do povas resti kiel racia celo por SDI, se oni forŝovas de sur la tablo ankaŭ la tutan sensencan parolaĉon pri la tiel nomata civila teknologia flanka utilo? Tiuspeca kosmo-armilsistemo nur donas sencon, se oni intencas plimalgrandigi la tre malfortigitan respondan baton de la kontraŭulo en ĝia efiko post masiva nuklea unua frapo. La aserto ke SDI „respondas al sovetia minaco" aŭ la alia imputo ke oni volus milite respondi al sovetiaj „atakaj emoj" estas tute simple konsciaj mensogoj al la nacia kaj internacia publiko. Klarigi la verajn faktojn kaj bremsi la enorme malstabiligan SDI-programon laŭeble ĉekomence, tio estas nuntempe tutmonda klopodo de multaj engaĝitaj sciencistoj. Tute prave kamarado Erich Honecker karakterizis tiun ĉi batalon kiel „ĝis nun ne ekzistintan leviĝon de la monda konscienco".

„Sonntag": Antaŭ nelonge novaĵagentejoj de GDR sciigis ke Pentagono disdonis konsiderindan komision por SDI al Messerschmitt-Bölkow-Blohm. Tute evidente la negoco kun SDI vigle komenciĝas . . . Oni asignis novan monon, kvankam prezidanto Reagan antaŭ kelka tempo aludis ke Usono pretus sub certaj cirkonstancoj prokrasti SDI dum kelkaj jaroj.



Virinoj en Düsseldorf/FRG
Kontraŭ astromilito

Foto: Zentralbild

Kautzleben: Nuntempe oni ne povas rimarki ke Usono bremsus SDI-programon en iu maniero. Tiu ĉi disdono de komisio al Messerschmitt-Bölkow-Blohm estas ja nur eteta parto de la komencita programo. Kaj ĝi estas samtempe refuto de la fabelo pri tio ke la civila industrio povus transpreni de SDI multajn novajn teknologiojn. Messerschmidt-Bölkow estas armada konzerno kun konata tradicia sperto. Oni povas diri: Por certaj firmaoj kaj politikistoj evidente ne ekzistas politika-morala bremso por la partopreno al tiu danĝera programo. Per tio ke oni pre-

cipe en Usono faras lukrajn kontraktojn kun firmaoj de la milita-industria komplekso komenciĝas nova, fatala ekonomia diabla cirklo. Tiuj firmaoj kiuj foje komencis partopreni, kiuj plirapidigis siajn esplorojn, kiuj akiris la koncernajn teknologiojn, kiuj koruptas laboristojn per bona pago, kiuj enkasigas por la akciuloj altajn kaj certajn profitojn, ne tiel facile ĉesas. Kaj se ili povas oferti al la militistoj iun novaĵon de kiu atentas la profesiaj militistoj „miraklojn", tiuj ĉi tutcerte akceptas. Politikaj „motivoj" por tiuj investoj rapide troveblas. Oni do trovas la malnovan-novan mensogan aserton ke oni devus „postarmadi". SDI estas la plej granda kreska industrio de la mondo. En 1984 oni „nur" elspezis 900 000 dolarojn por la SDI-esplorado, en 1985 tio estis jam 1,4 miliardoj da dolaroj, en 1986 tio estos 2,8 miliardoj da dolaroj. La elspezoj kreskas progresive. Baldaŭ ili transpaŝos la limon de 10 miliardoj da dolaroj en ĉiu jaro.

„Sonntag": Ni interparolis prioritate pri teknikaj kaj ekonomiaj problemoj de la SDI-koncepto. Kiel vi, profesoro Knuth kaj profesoro Kautzleben, juĝus tiun ĉi programon en ĝia efiko al la internacia politika klimato?

Knuth/Kautzleben: La SDI-koncepto karakteriziĝas per tio ke militaj, teknikaj, natursciencaj, ekonomiaj, juraj kaj politikaj demandoj nedivideble miksiĝas unu kun la alia. La esencaj politikaj efikoj estas:

1. La plulaboro pri SDI kaj ĝia pli posta instalo kondukus al rapida, sentebla perturbo de la militstrategia ekvilibro inter USSR kaj Usono. Sovetunio estus devigita apliki konvenajn kontraŭrimedojn, kaj nova rondo de vetarmado estus neevitebla.
2. SDI ne estas, kiel Usono asertas, „pura defenda koncepto", sed kompleksa milita sistemo kun novspecaj armilteknikoj kiuj sen iu limigo povas esti uzataj por atako kaj por „senkaptiga bato".
3. Ĉe tiu armadnegoco kiu sekurigas al la produktantoj de la novaj armiloj por multaj jaroj altajn profitojn estas garantiata al la milita-industria komplekso de Usono ĝia potenca pozicio kaj ĝia reakcia interveno en la internacian politikon.
4. Multaj formoj de la internacia kunlaboro por esplorado, por transigo de teknologio kaj por ekonomia subteno estus eksterordinare malhelpataj aŭ malebligataj.
5. La solvo de tutmondaj problemoj prokrastiĝus aŭ venus eĉ tro malfrue. La saniĝo de la internacia atmosfero, kies kerno estas konfidoplena paca kunlaboro longtempe prokrastiĝus.

La revuo „Sonntag" parolis kun profesoro d-ro sc. nat. Robert Knuth, direktoro de la Instituto por kosma esplorado ĉe la Akademio de sciencoj de GDR, profesoro d-ro sc. nat. Heinz Kautzleben, estro de la esplorsekcio Geo- kaj Kosmoscienco ĉe la Akademio de sciencoj de GDR.

El „Sonntag" 36/1986 trad. U. Becker

Sciencistoj ne estas aĉeteblaj

La kampanjo por malebligo de „Milito de astroj" ricevis signifoplenan akceladon per la promeso de pli ol 6 500 usonaj sciencistoj, ke ili ne partoprenos en la programo de Reagan-administracio pri kosma armado. Inter la subskribintoj estas 15 laŭreatoj de Nobel-premio kaj la plimulto el la instruantoj de fizikaj fakultatoj de la 20 plej grandaj universitatoj.

La klopodoj de Pentagono varbi por la esplorado de kosmaj armiloj direktas sin al la sciencaj fakultatoj de universitatoj kaj aliaj akademiaj organizaĵoj, estantaj tiurilate la plej gravaj celobjektoj. La perspektivo ricevi konsiderindajn subtenojn de la registaro allogis al kunlaboro en la SDI-programo jam multajn akademiajn centrojn, ĉar la sciencistoj ankaŭ konsciiĝis, ke rifuzante komisiojn por la astro-milito, ili riskas la perdon de aliaj subvencioj flanke de la ministerio pri defendado. Ĝuste tian minacon aŭdigis Donald Hicks, la vicministro por defendado kaj kompetenta pri esplorado kaj tekniko, en intervjuo kun la gazeto „Science", kiam li aludis la eblecon redukti la rimedojn al tiuj universitataj fakultatoj, kiuj kontraŭstaros la „militon de astroj". Pro apliko de tiaj trudrimedoj laŭtiĝis voĉoj pledantaj por eksigo de Hicks.

Tamen la movado de la sciencistoj kontraŭ la kosmaj armiloj restas neskuebla. Kiam la deputito de la Kongreso, George Brown la pli juna (Demokratia Partio, Kalifornio) ricevis la subskribitan devoligan dokumenton, li diris: „En tempo, kiam la registaro provas subaĉeti al si la laŭleĝecon rilate al SDI, tiu ĉi bojkoto atestas, ke la plimulto de la gvidaj sciencistoj de tiu ĉi lando ne estas aĉeteblaj. Por la kredinteco de la programo tio prezentas egan fiaskon."

El Friedenskurier, Helsinki n-ro 6/86.
Tradukis Renate kaj Dieter Berndt

KVIN MITOJ

En parolado farita en la Nacia Gazetara Klubo en Washington, klarigis antaŭ nelonge senatano Josef Binden:

Ĉe la provo pravigi la bankrotan politikon de la Reagan-administracio en la sfero de armadkontrolo, ĝiaj oficialuloj uzas memfaritajn legendojn.

La **unua** mito konsistas en tio, ke laŭdire USSR havis strategian superecon super Usono, kiam la Reagan-administracio venis al potenco. Antaŭ ol ebligi kontrolon de armado, ĝi devis unue agi por kreskigi la armadon.

La **dua** mito diras, ke tiu kreskigo, inkluzive de la programo pri „Astromilito", devigis Kremlon, reveni al la traktotablo. Sed Sovetunio ĉiam montris sian pretecon al intertraktadoj. Ĝia insisto pri inkludo de la programo de „Astromilito" en la traktadon, estis la unusola logika reago je la minaca intenco de la usona administracio, deturni sin unuflanke de la principoj de la ABM-kontrakto. Dum la administracio ŝajnigas, ke ĝi nur armas, por ebligi intertraktadon, ĝi uzas la intertraktadojn por pluarmado.

La **tria** mito estas, ke la administracio fanfaronas pri iuj seriozaj proponoj. En realo ĝi prezentas al Sovetunio neakcepteblajn proponojn, kiuj malebligas intertraktadojn.

Laŭ la **kvara** mito Sovetunio detruas „grave" la interkonsentojn, kiuj ekzistas inter ambaŭ landoj. La administracio uzas tiun miton, por pravigi sian deturnon de tiuj ĉi interkonsentoj.

La **kvina** mito enhavas la aserton, ke la programo de „Astromilito" estas por la usona popolo alternativo, kiu permesas rezigni pri la armadkontrolo kiel rimedo por malebligi la danĝeron de nuklea neniigo. Sed ĝuste tiu ĉi programo estas la obstaklo por redukti tiun ĉi minacon. La persisto de la prezidento je tio estas unu el la plej malprudentaj kaj senrespondecaj agoj de nia tempo.

El „Horizont" n-ro 10/86
Tradukis Renate kaj Dieter Berndt

Sed mi kredas je la paco kiel supera ordono kaj plej alta neceso, kiel antaŭkondiĉo por ĉiu efektiva kaj honesta plenumo de la devo de la popoloj, de la homaro.

Thomas Mann

Bernard Lown

Kuracistoj kaj nuklea minaco

La usonano Bernard Lown estas profesoro por kardiologio ĉe la Harward School for Public Health. Li kaj la ruso Ĉazov estas kun-prezidantoj de la Internacia Unuiĝo de Kuracistoj por Preventado de Nuklea Milito, kiu ricevis en la jaro 1984 la Premion de UNESKO por Paca Edukado kaj en 1985 la Nobel-Pacpremion. Tiu ĉi artikolo estas fragmento el lia parolado okaze de UNESKO-aranĝo pri pacdemandoj en Ateno en januaro 1986.

En decembro 1980 kunvenis en Ĝenevo ses kuracistoj – tri el Sovetunio kaj tri el Usono – por fondi la „Internacian Unuiĝon de Kuracistoj por Preventado de Nuklea Milito" (International Physicians for the Prevention of Nuclear War, IPPNW). Kaj en decembro 1985 la samaj ses kuracistoj vojaĝis al Oslo, por akcepti la Nobel-Pacpremion. Mi kredas, ke tiu ĉi eksterordinara sukceso kaj tiu ĉi rekono baziĝas sur la signifo kaj urĝeco de la problemaro, kiun ni diskutigas. La komitato por Nobel-premioj substrekis pro tio ankaŭ, ke IPPNW per disvastigado de fidindaj informoj sukcesis „krei konscion pri la katastrofaj sekvoj de atoma milito".

Ni neniam lasis nin deviigi per aliaj demandoj, kiel ajn gravaj ili estis. Ni konsideris la batalon kontraŭ la nuklea minaco ĉiam kiel nian ekskluzivan zorgon, ĉar estas nia konvinko, ke la konservado de la vivo povas esti garantiata nur per la redukto de mortigaj armiloj. Laŭ nia opinio oni devas finfine komprenigi al la homaro, ke ne temas pri batalo inter diversaj naciaj sortoj aŭ kontraŭaj ideologioj, sed pri la mortiga katastrofo kaj la transvivo. Ĉiuj nacioj havas komunan sorton, komunan malamikon: la atomarmilojn.

IPPNW akcentis vicon da kritikaj konkludoj:

– Super la homaro ĝis nun ankoraŭ neniam ŝvebis danĝero komparebla kun atoma milito. Ĝis hodiaŭ la homo ankoraŭ neniam posedis la rimedojn, igi nian planedon neloĝebla kaj detrui ĝin.

– En kazo de atoma milito la moderna medicino povas proponi absolute nenian helpon, eĉ ne simbole.

– Eĉ se atoma milito neniam povus esti pravigita per nacia intereso, oni devas reale vidi, ke per la nuklea eksplodforto estis kreita teknologio, kies efikoj ju pli longe des pli malmulte estas kontroleblaj. Atombomboj, robotoj kaj komputiloj rabos de la homoj finfine la decidpovon kaj disponos pri ili.

– Eĉ se oni sukcesos preventi militon, la vetarmado postulas tamen enorman ekonomian, psikologian kaj moralan tributon.

La aktuala ekonomia krizo en la mondo baziĝas plejparte sur tio, ke la limigitaj krudmaterialoj de nia planedo estas uzataj por militarismaj celoj. Metaforo servu ĉi tie kiel ilustraĵo: Ni imagu metronomon kun takto de 60 batoj en unu minuto, do po unu bato en sekundo. Ĉe ĉiu dua bato mortas infano pro malsano, kiun oni povus preventi per adekvata vakcinado, sufiĉa nutrado kaj provizado per trinkakvo. Ĉe ĉiu kontraŭbato de la metronomo, do denove ĉiun duan sekundon, unu infano estas difektata korpe aŭ spirite por la tuta vivo kaŭze de same evitebla malsano. Ĉiujn tri tagojn mortas 120 000 infanoj – tio estas nombro, kiu egalas al la nombro de la viktimoj de la unua eksplodigita atombombo.

Sed ĉiu sekunda bato de la metronomo diras ankaŭ ion pri la disipaj armadelspezoj: Dum unu sekundo oni elspezas 25 000 dolarojn por armiloj, tio estas 1,5 milionoj da dolaroj en minuto.

Tio estas tragika, ĉar se oni uzus nur etan sumon de tiuj ĉi porarmadaj elspezoj por sanitaraj kaj socialaj celoj, oni helpus longdaŭre al la tuta homaro. La sumo, kiu estas elspezata en tri fazoj por armiloj, egalas al la plenaj kostoj de la kampanjo por ekstermado de variolo, kampanjo, kiu daŭris dudek jarojn kaj kiu apartenas al la grandaj sukcesoj de la medicino en la 20-a jarcento. Per la armadelspezoj de unu duontago oni povus vakcini ĉiujn infanojn de la mondo kontraŭ la ordinaraj infektaj malsanoj, kiuj postulas jare 3,5 milionojn da vivoj. La armadelspezoj de kvar tagoj sufiĉus por financi kvinjaran kampanjon kontraŭ la malario, estanta nuntempe plej verŝajne la ĉefa mortokaŭzo en la mondo. Kaj la sumoj, kiuj estas elspezataj mondvaste dum unu duonjaro por la militarisma armado, sufiĉus por kovri dum dudek jaroj la esencan bezonon je nutraĵoj kaj higieno en ĉiuj evolulandoj.

La metronomo en mia rakonto, kiu batas en sekunda takto, disvastigas ankoraŭ trian informon: la informon de la eksterordinara danĝero, en kiu la mondo mem ŝvebas. La enhavo de la nuntempaj nukleaj armilaj arsenaloj konformas al 16 miliardoj da tunoj de TNT. Supozite, ke ĉiu bato de la metronomo signifas eksplodon de unu tuno da dinamito, la eksplodbruo senĉese estus aŭdebla dum 500 jaroj.

Al specialisto pri kormalsanoj la metronomo diras eble ankoraŭ ion alian: Ĝi memorigas pri la homa korbato. Kaj ni vere devas demandi nin, ĉu ni volas permesi, ke la homa koro por ĉiam ĉesos bati, aŭ ĉu ni volas batali por tio, ke ĝi batos ankoraŭ en fora estonteco.

El „UNESCO-Kurier" n-ro 8/86
Tradukis Renate kaj Dieter Berndt

Al miaj pacientoj:

Kiel kuracisto mi estas devigata informi miajn pacientojn pri ĉiu serioza danĝero, kiu minacas ilian vivon aŭ ilian sanon. Atomarmiloj estas tia danĝero.

Eĉ se nur unusola atombombo eksplodus super urbego, centmiloj da homoj pereus. Medicina helpo estus apenaŭ ebla.

Mondvasta atoma milito detruus ĉiun ajn civilizacion, la pluekzistado de la homaro estus en danĝero. Medicina helpo, kiu meritas tiun ĉi nomon, jam ne ekzistus. La unusola, kio povas helpi, estas prevento.

Mi petas miajn pacientojn subteni min en la informado de niaj kunloĝantoj pri la danĝeroj de la atoma vetarmado. Komune ni devas konvinki la respondecajn politikistojn ĉie en la mondo pri tio, ke oni devas haltigi la marŝon al la pereo.

(Deklaro de la Internacia Unuiĝo de Kuracistoj por Preventado de Nuklea Milito – IPPNW – sendependa kaj senpolitika unuiĝo, al kiu apartenas pli ol 150 000 kuracistoj el 50 landoj. En la jaro 1985 ĝi estis distingita per la Nobelpremio por paco. Ĝia ĉefsidejo troviĝas en Usono.)

Adel Karaŝoli

La amikoj

La fajro petas Bejruton
al la lasta tango.

Sur la lima linio
inter bombosplitoj
kaj kugloj
inter angora kriego de infano
kaj la atenta okulo de l'pafilo
inter morto kaj morto
vi staras nun,
esperas mi,
Vivantaj.

Trad. Uwe Werner

Demando

Sed kiu
donas la rajton
al la persekutantoj de hodiaŭ
paroli
en la nomo de la persekutatoj
de hieraŭ.

Kaj kiu dio
sanktigis
la idojn de la sanktuloj
por ĉiama eterneco.

Trad. Uwe Werner

La armadelspezoj de la mondo

Pli ol 1,5 milionoj da dolaroj en unu minuto!

En la evolulandoj vivas 800 milionoj da homoj en plena mizero kaj malriĉeco. 500 milionoj el ili estas malbone nutritaj. Multaj milionoj ne povas havigi al si taŭgan trinkakvon kaj ne havas enspezojn, por aĉeti la necesajn nutraĵojn.

Pritaksadoj montris, ke en la hodiaŭa mondo ekzistas pli ol 50 000 da nukleaj eksplodkapoj . . . La tuta eksplodforto de ĉiuj nukleaj armiloj en la mondo konformas proksimume al milionoblo de tiu atombombo de Hiroŝima, kiu havis eksplodforton de 13 kilotunoj. Unu kilotuno egalas al konvencia eksplodforto de 1 000 t da TNT; unu megatuno egalas al 1 000 000 t da TNT.

Laŭ antaŭ nelonge farita studaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj pri malarmado, ĉiuj arsenaloj de la mondo kune enhavas pli ol 140 000 pezajn tankojn, pli ol 35 000 batalaviadilojn, pli ol 21 000 helikopterojn, pli ol 1 100 pli grandajn militŝipojn kaj pli ol 700 batalajn submarŝipojn. Oni taksas la armadelspezojn de la mondo por konvenciaj armiloj kaj armefortoj je proksimume kvar kvinonoj de ĉiuj armadkostoj.

De post la Dua Mondmilito oni laŭtakse uzis konvenciajn armilojn en ĉirkaŭ 150 konfliktoj. Ne eblas diri, kiom da mortintoj estis dum tiuj bataloj; iu studaĵo taksas ilin je proksimume 20 milionoj. Armadaj elspezoj signifas esencan ŝarĝon por la financa budĝeto de industri- kaj evolulandoj, kaj en la evolulandoj ili povas sumiĝi averaĝe je 20 % de la ŝtataj elspezoj. Laŭ taksadoj la elspezoj por armado estas en industriaj landoj proksimume same altaj kiel la elspezoj por edukado kaj sano. En evolulandoj ili sumiĝas je la trioblo de la elspezoj por saneco, kaj ili superas la elspezojn por klerigado je triono.

Laŭ fidindaj indikoj la elspezoj por armadaj celoj plialtiĝis mondvaste en la jaro 1983 ĝis proksimume 800 miliardoj da dolaroj, kio signifas pli ol 1,5 milionoj da dolaroj en unu minuto. Elirante el la sama prezfundamento tio estas pli ol la duoblo de la elspezoj de 1960 kaj preskaŭ la kvaroblo de la elspezoj en 1949. Tiamaniere kreskante la armadelspezoj atingas mondvaste en 15 tagoj kaj 15 horoj ĝuste la sumon de 34 300 milionoj da dolaroj, kio egalas al la tuta oficiale efektivigita evoluhelpo en la jaro 1983. Se la hodiaŭa ĝenerala tendenco daŭrus, la mondaj armadelspezoj povus – laŭ studaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj – en la jaro 1990 atingi aŭ eĉ superi 1 000 miliardojn da dolaroj.

Industrilandoj elspezas dudekoble tiom por armadaj celoj, kiom ili disponigas por ekonomia helpo.

70 % de la armadaj elspezoj de la mondo dispartiĝas sin inter la ses ĉefaj potencoj kaj 15 % inter la aliaj industrilandoj. La restantaj 15 % venas el la evolulandoj.

Unu miliardo da dolaroj egalvaloras hodiaŭ al 28 000 laborlokoj en la sektoro de armiloj kaj soldatservoj aŭ al 57 000 laborlokoj en la konsumvara industrio aŭ 71 000 laborlokoj en la instruado.

Por ĉiu soldato oni elspezas en la mondo meznombre 20 000 dolarojn. La sektoro de publikaj lernejoj bezonas 380 dolarojn por unu lernanto en la lernejdeviga aĝo.

El 100 000 homoj 556 estas soldatoj, sed nur 85 kuracistoj. Helpe de unu kvinono de la jaraj elspezoj por armado oni povus forigi la malsaton en la mondo ĝis la jaro 2000.

El „UNESCO-Kurier" n-ro 8/86.
Tradukis Renate kaj Dieter Berndt

INICIATOJ ĈE LA EVOLUIGO DE NOVAJ ARMILAJ SISTEMOJ

	USA	USSR
NUKLEAJ ARMILOJ	meze de la 40-aj jaroj (uzita dum aŭgusto 1945)	fine de la 40-aj jaroj
INTERKONTINENTAJ STRATEGIAJ BOMBAVIADILOJ	meze de la 50-aj jaroj	fine de la 50-aj jaroj
NUKLEAJ SUBMARAJ ŜIPOJ	meze de la 50-aj jaroj	fine de la 50-aj jaroj
NUKLEAJ AVIADILEJAJ ŜIPOJ	komence de la 60-aj jaroj	neniuj
PLUROPE, UNUOPE STIREBLAJ EKSPLODILOJ	fine de la 60-aj jaroj	meze de la 70-aj jaroj
NEŬTRONA MUNICIO	fine de la 70-aj/ komence de la 80-aj jaroj	neniuj

Por povi sukcese batali por la paco, oni devas esti pruvinta, ke oni tion ne faras pro malkuraĝo, pro nenionfaremo, sed ke oni pretas morti por la afero de la paco, se estas neceso.

Lion Feuchtwanger

Thomas Schrecker

Vivaj radiomezuriloj

En Usono kuracistoj fiuzis homojn kiel nukleajn eksperimentajn bestojn

„La laborkapablo en batalo estos relative bone konservebla ankaŭ en kazo de radioŝarĝo de 200 Rad" (Rad = Radiation absorbed dosis = absorbita radia dozo), skribis la medicinisto Eugene Saenger en raporto. La batalkampo, sur kiu li kolektis siajn sciojn, estis malsanulejo, liaj soldatoj estis pacientoj. Li „esploris" en la Ĝenerala Hospitalo de Cincinnati, Usono. La „kuracisto" tie radioaktive priradiis 87 pacientojn.

La esploroj de Saenger ja falas el la kadro, tamen ili ne estas ununura devojiĝo de usona sciencisto. Pli ol 30 jarojn oni fiuzis senhejmulojn, malliberulojn, malsanulojn, maljunulojn kaj senhavulojn por radioeksperimentoj. „Usonaj civitanoj tiamaniere fariĝis mezuriloj por radioaktiveco." Tiel parlamenta esplorkomitato de la usona senato karakterizis eksperimentojn, okazintajn sub la titolo „Manhattan-projekto". En raporto, ĵus publikigita de la komitato, tutmonde konatiĝis la maĥinacioj, lokoj kaj ankaŭ unuopaj sortoj de viktimoj de tiaj provoj. Dum 3 jaroj la membroj de la komitato traserĉis tutajn aktomontojn. Ili konstatis: Minimume 700 homoj estis radioaktive priradiitaj. La aktoj entenis jenajn faktojn:

Metodoj:

1. Injekto de radioaktivaj substancoj en la homan korpon
2. Terapio per radioaktivaj preparaĵoj
3. Inhalado de radioaktivaj venenoj

Esplorejoj:

- malsanulejoj
- malliberejoj
- la dezerto de Nevado
- la naturo

Viktimoj:

– En la 40-aj jaroj: La Handford-Plutonio-Instalaĵo en la nordokcidento de Usono regule, kvazaŭ rutine, priradiis la medion. La dozoj estis tiom altaj, ke nuntempe oni konsiderus ilin grava nuklea akcidento. La homoj, proksime vivintaj, scias nenion.

– 1945–1947: Al 18 personoj, deklaritaj nekuraceble malsanaj, oni injektis en usonaj malsanulejoj altgrade venenan plutonion. La medicinistoj scias pri la ekstreme kancerogena efiko de tiu substanco.

– 1947: En la kliniko de Rochester oni injektis al ses personoj kun tute sanaj renoj uraniajn salojn. Gravaj malsaniĝoj de la renoj estis la sekvo. Unu paciento ricevis terapion pro halucinoj, alia estis en la kliniko pro depresioj kaj tria venis en la manojn de la kuracistoj, ĉar li estis senhejma.

– Inter 1945 kaj 1963: Dum tiu ĉi tempo en Usono okazis 235 atombombaj testoj en la atmosfero. Oni taksas, ke minimume 250 000 homoj, plejparte soldatoj, restadis ofte en nur kelkkilometra distanco de la eksploda centro. Sen protektaj vestaĵoj aŭ iaj aliaj helpiloj oni intence elmetis ilin al radioaktivaj dozoj same altaj kiel tiuj post la ĵeto de la atombomboj super Hiroŝimo kaj Nagasako. Posta esplorado de 3 224 „atomveteranoj" donis i.a. jenan timigan rezulton: Ĉiu kvara havas sangokanceron. La nombron de tiuj, kiuj jam estis mortintaj pro la sekvoj de la priradiado, oni ne povis eltrovi.

– Komence de la 50-aj jaroj: Same kiel eksperimentajn bestojn oni elmetis usonajn soldatojn post nuklea eksplodo en la dezerto de Nevado en priradiitan teritorion.

– 1953–1957: En la Ĝenerala Hospitalo de Massachusetts 12 malsanuloj ricevas uraniajn injektaĵojn. Ĉe ili estis diagnozitaj cerbaj tumoroj. Parto de la viktimoj dum la „terapio" estis en komato.

– 1960–1964: En la Oak-Ridge-Kliniko en la usona federacia ŝtato Tennessee oni radioaktive priradiis 89 kancermalsanajn homojn. Oni ne traktis celdirektite la tumorajn zonojn, sed la tutajn korpojn. En aluminia kuvo ili ricevis radioaktivan banon per dozoj de ĝis 250 Rad. La usona defendministerio financis la eksperimentojn per 650 000 dolaroj.

– 1963–1965: Proksime de atoma testreaktoro en Idaho homoj surpaŝis kontaminitan herbejon. Ili devis trinki lakton de la tie paŝtiĝantaj bovinoj.

– En la 60-aj jaroj: En la nuklearmila testcentro de Los Alamos oni donis al 57 homoj nutraĵon, preparitan kun uranio kaj radioaktiva mangano. En la Teknologia Instituto de Massachusetts dum tiu tempo oni donis radiumon kaj torion.

– 1963–1973: En la ŝtata prizono de Vaŝingtono oni elmetis la testikojn de 131 malliberuloj kontraŭ ties volo al radioaktivaj dozoj ĝis 600 Rad. Ke ĉi-kaze minimume ne okazis senpera morto, tion unu el la „esplorkuracistoj", Carl G. Heller, per harstariga cinikismo klarigis jene: „La testikoj estas la ununura interna homa organo simple izolebla kaj elmetebla al laŭŝtupa priradiado." Mendantoj de la Eksperimento estis la spacinstanco NASA kaj la atomenergia instanco.

„Tiuj eksperimentoj estas ŝokaj", skribis la prezidanto de la parlamenta esplorkomitato, Edward Markey, al la usona energiministro, John Herrington, kaj komparis ilin kun „tiuj frenezaj eksperimentoj je homoj, faritaj de la nazioj". La usonaj eksperimentoj estis ordonitaj kaj financitaj de la atomenergia komisiono de la instanco pri energiesplorado kadre de ŝtataj projektoj.

La viktimoj de tiuj barbaraj eksperimentoj en Usono intertempe ricevis komunan nomon: „homaj kobajoj". Ili estas civitanoj de Usono, de kiuj oni forprenis la unuan homan rajton, la rajton je vivo.

El „Berliner Zeitung", 1986/11/20
trad.: Dieter Dungert

Asen Grigorov (1903–1985)

Mia Kanto

Mi ne kantos pri steloj, pri amo kaj rozoj,
kun mistera, tenera amar' –
ja ni vivas tempeste en temp' grandioza,
mi trumpetas per kupra fanfar'!

Nun – la korsentimentoj formortas velkante
en la tagoj de sanga batal'.
Mi galopas antaŭen kaj vokas flamkante
kaj alarmas per fajra signal'.

Mi forgesas prikanti la mildajn animojn
kaj sopiri kaj plori per larm'...
Mia kanto funebras la karajn viktimojn,
sed samtempe tamburas: a l a r m'!

Ho, ni estas milmiloj kaj niaj armiloj
ne estas el ŝtalo kaj fer' –
ni batalas per glavoj ankoraŭ pli brilaj:
per justeco, per lumo kaj ver'!

Kaj en tiu ĉi tempo unike majesta
mia kant' estas kupra fanfar',
kiu vekas kaj vokas per voĉo tempesta:
Al batalo, vi, granda homar'!

En Centra Malliberejo de Sofio,
Novembro 1941

Günther Rose

Ses paragrafoj por nova pensado

Rimarkigoj al kategorie imperativa postulo en la atomepoko

Ĉe la sojlo al, la jaro 2000 la situacion de la homaro karakterizas fasko da tutglobaj defioj. Ni travivas profundajn ŝanĝojn en la homara historio. Iliaj ĉefaj simptomoj estas la nova dimensio de la milito, la kreskanta misproporcio inter industriaj kaj evoluantaj ŝtatoj kaj la grava endanĝerigo de la ekvilibro inter socio kaj naturo. Pro sinkonservo la homaro devas malfunkciigi tiujn tri prokrastajn bombojn. En la preskaŭ nemezurebla tempo de ĉirkaŭ 600 000 jaroj, dum kiu la homo povis definitive sukcese defendi sin sur la tero, ĝia ekzisto ĝis nun nur unufoje estis en danĝero, nome pro la pesto en la 14-a jarcento, katastrofo de ĝis tiam ne konita danĝereco. La dua endanĝerigo de ĝia ekzisto rezultas nuntempe el la akumulado de amasneniigaj armiloj.

Faktoj

La epoko, en kiu ni vivas, estas turnopunkto de la mondhistorio en duobla senco. La produktivaj fortoj unuafoje atingis nivelon, ebligantan kontentigi la fundamentajn vivbezonojn de ĉiuj homoj, forigi malsaton, mizeron kaj la timon antaŭ la morgaŭo. Hodiaŭ, dum tiu ĉi jarcento proksimiĝas al sia fino, ni ekkonas, ke tiu nivelo same povas alporti la teruran finon de la homaro.
El kalkuloj kaj taksoj de UNO kaj el esploroj de sciencistoj de multaj landoj sekvas, ke la nuntempe ekzistanta neniiga potencialo egalas al 1,3 milionoj da Hiroŝimo-bomboj. Jam fine de la 70-aj jaroj tio signifis ekvivalenton de 15 tunoj de la tradicia eksplodaĵo TNT (trinitrotolueno) por ĉiu homo. Milite rigardate hodiaŭ ekzistas plurfoja reciproka neniiga potencialo, la „overkill capability". Sekve la nukleaj armiloj ne donas transvivoŝancojn. Laŭ taksoj de sciencistoj jam post apliko de malpli ol unu procento de la nukleaj armiloj okazus „nuklea vintro".
Unuafoje en la historio la neniigo de la homa specio iĝis teknike „farebla". La alternativo, konstatita por la klasbataloj de la pasinteco de Karl Marks kaj Friedrich Engels en la „Komunista Manifesto", nome ke ili „ĉiufoje finiĝis per revolucia transformo de la tuta socio aŭ per la komuna pereo de la batalantaj klasoj", validis por la ĝisnuna historio. Hodiaŭ la alternativo unuafoje estas aŭ pluekzistado de la homaro kaj socia progreso aŭ pereo de la vivo kaj fino de la civilizacio. La japana filozofo kaj pacbatalanto Ŝingo Ŝibata provis difini la taskon de la filozofio en tiu ĉi situacio per aliformulita tezo de Karl Marks (11-a Feuerbach-tezo): „La filozofoj nur diversmaniere interpretis la mondon; la ĉefaĵo estas, **protekti la mondon kontraŭ neniigo** kaj ŝanĝi ĝin".

Transvivo-logiko

En la atomepoko pens- kaj kondutmanieroj, elformiĝintaj dum jarcentoj, se ne eĉ dum jarmiloj, estas fundamente ŝanĝendaj. Certaj pens-skemoj de la pasinteco, precipe tiuj, kiuj koncernas la kunvivadon de la popoloj kaj la solvadon de konfliktoj per militoj, povas fariĝi ege danĝeraj. Albert Einstein konstatis, ke la senkatenigita forto de la atomo ŝanĝis ĉion – escepte de nia pensado. Jam en 1946 li postulis „novan pensmanieron, se la homaro pluekzistu kaj pluevoluu al pli alta nivelo". La tiama kanada ministro de eksteraj aferoj, Lester Pearson, rimarkigis en 1957: „Ni preparas militon kiel frumaturaj gigantoj, sed la pacon ni traktas kiel spirite postrestintaj nanoj". Fakte hodiaŭ ekzistas nur la alternativo inter reciproka akceptado de la sistemoj kun ĉiuj sociaj kaj ideologiaj kontraŭdiroj aŭ konfrontado ĝis la ambaŭflanka neniigo, kio signifus la finon de la tuta homa ekzistado.
Ankaŭ ni marksistoj kaj la reprezentantoj de la socialismaj ŝtatoj prijuĝas la problemon pri paco kaj milito en la atomepoko en nova maniero. Estis kompreneble, ke Stalin ne lasis timigi sin de Hiroŝimo kaj la kun tio ligita minaca gesto de Usono. Ekzistis tiam nur malmultaj atombomboj kaj USSR nepre povis dum mallonga tempo produkti la novan armilon kiel kontraŭpezon. Tamen la taksado pri la aplikebleco ŝanĝiĝis kun la amasigo de la nuklea potencialo kaj la sperto pri la efiko de tiuj bomboj.
Hodiaŭ ni taksas la sekvojn de atommilito tute alie, ĝuste tial, ke pro la amasigo kaj kvalita pluevoluigo de la amasneniigiloj ankaŭ la esenco de atommilito prezentiĝas alie. En la Politika Deklaro de la ŝtatoj de la Varsovia Traktato tekstas jene: „Ĉiuj konsideroj pri gajno de atommilito estas malprudentaj. Post atommilito ne ekzistus venkintoj." Nek venkintoj, nek venkitoj!
Kompreneble ni starigas la demandon, kiu politiko kaŭzas la danĝeron de atommilito. Sed tio estas du malsamaj demandoj. Temas pri la kategoria tezo, ke per atommilito politikaj celoj ne plu estas realigeblaj. Tio estus la fino de ĉia politiko. La Ĝenerala Sekretario de KPSU, Miĥail Gorbaĉov, deklaris dum la gazetara konferenco post la sovetia-usona kulmina renkontiĝo en novembro 1985: „Dum la lasta jarcento en la mondo okazis fundamentaj ŝanĝiĝoj, postulantaj novan aliron. ... Sub la nunaj kondiĉoj ne nur temas pri konfrontado de du sociaj sistemoj, sed ankaŭ pri la elekto inter transvivado aŭ reciproka neniigo. Alie dirate: Pro la objektiva evoluo de la tutmondaj okazaĵoj la demando pri transvivado ŝovis sin en la centron de la mondpolitiko".

Novaj pens- kaj kondutmanieroj

Ni provu prezenti kelkajn bazajn trajtojn de la nova politika pensado en la atomepoko. Ni eliru de tio, kion la komunistoj kaj pacamikoj en la tuta mondo, kiel ankaŭ la pligrandiĝanta nombro de tiuj politikistoj de la okcidento, kiuj reale taksas la situacion, komprenas sub nova pens- kaj kondutmaniero:
Unue tio estas la agnosko de la fakto, ke la paco meritas plej altan prioritaton. Se la alternativo al la paco ne estas tutsimple milito, sed la pereo de la homaro, tiam la pacon ni ne plu povas konsideri kiel havajon, elekteblan apud aliaj havaĵoj. En la atomepoko la paco ne plu estas **unu** variaĵo de la ekstera politiko apud aliaj, sed ĝi fariĝis „Ultima ratio", baza kondiĉo de la homa ekzistado. La amasigo de la nuklea neniiga potencialo metis la homaron antaŭ la Hamlet-demandon: „Esti aŭ ne esti".
Due atommilito ne plu povas esti racia rimedo por solvi politikajn problemojn aŭ realigi politikajn celojn. La nova dimensio, troviĝanta en atommilito, postulas, ke ĉiu politiko submetiĝu al la imperativa postulo preventi atommiliton. La proporcio inter politikaj celoj kaj militaj rimedoj fundamente ŝanĝiĝis, la rimedoj superis la celojn. La tasko de la militistoj nuntempe do ne estas **gajni** militojn, sed **preventi** militojn, ne estas la venko **en** atommilito, sed la venko **super** atommilito.
Trie el tio sekvas, ke nuntempe interŝtataj konfliktoj devas esti solvataj senescepte pace. La paca kunekzistado hodiaŭ ne plu estas nur celenda kaj dezirinda, sed la ununure ebla maniero de la rilatoj inter diversaj sistemoj. Al ĝi ne ekzistas prudenta alternativo. Ĝi fariĝis prioritata universala leĝo de la

mondpolitiko. „Ĉu ni plaĉas unu al la alia aŭ ne, ni devas kune vivi sur tiu planedo. Kaj pro tio nia plej grava tasko estas . . . regi la arton vivi kune. Tio validas por longa tempo, pro tio ni devas lerni fari tion humane kaj civilizite", diris Miĥail Gorbaĉov antaŭ la usona-sovetia Komerca Konsilantaro. La objektive ekzistantaj kaj neeviteblaj ideologiaj antagonismoj ne devas esti obstaklo por bonaj interŝtataj rilatoj.

Kvare sekureco en la atomepoko ne plu eblas kontraŭ, sed nur kun la alia. La propra sekureco jam nur eblas per la sekureco de la alia flanko – tiu ĉi frazo estas fundamenta renverso de la politika pensado. Robert McNamara kaj Hans Bethe skribas en sia rimarkinda artikolo „Reducing the Risk of Nuclear War": „All our technological genius and economic prowess cannot make us secure if they leave the Soviet Union insecure. We can have either mutual security or mutual insecurity". Tiu ekkono, ke la sekureco de unu ne povas lasi sen konsidero la sekurecon de la alia, intelekte preparita fare de paceploristoj kiel Bert Röling kaj Johan Galtung, hodiaŭ realiĝis en la koncepto de la sekurecpartnereco, praktikata i.a. en la intertraktoj kaj interkonsentoj de SPG (= Socialdemokrata Partio de Germanio/FRG) kaj SUPG (= Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio/GDR) pri la forigo de kemiaj armiloj el ambaŭ germanaj ŝtatoj aŭ pri zono sen nukleaj armiloj en Mezeŭropo.

Kvine la vetarmado estas tiom malmulte gajnebla kiom la atommilito. Ĝi estas grava ŝarĝo por ambaŭ flankoj kaj efikas hodiaŭ kiel malvarma eluza milito. Eĉ la hodiaŭ ankoraŭ ekzistanta sekureco, baziĝanta sur armea egaleco, kun la daŭrigo de la vetarmado daŭre fariĝas pli problema, ĉar ĝi plialtigas la danĝeron de nekontrolita militeksplodo. La strebado de Usono pri reakiro de armea supereco per la „Strategia Defenda Iniciativo (SDI)" i.a. ja kaŭzas, ke observado, kontrolo, operativaj decidoj kaj tiel plu ligiĝas pli kaj pli al teknikaj aparatoj, kio en kazo de malgrandaj eraroj en la programado, malkonformeco de teknikaj sistemoj, teknikaj perturboj kaj hazardoj povas fariĝi fatala. La kontrolo do povas gliti el la manoj de la politikistoj. Ĉio ĉi rezultigas la devigan postulon, daŭre redukti la militstrategian ekvilibron, kiu pasintece kontribuis al la konservo de la paco, sur pli malaltan nivelon. Ni konsideras tion transira stadio al la ĝenerala senarmigo. Sub neniu kondiĉo povas esti permesate, ke tiu ĉi ekvilibro estas reproduktata sur daŭre pli alta nivelo, ekzemple per realigo de SDI.

Sese ekzistas daŭre pligrandiĝanta reciproka dependeco de la ŝtatoj. „En la interligo de konkurado de la du sistemoj kun la pligrandiĝanta tendenco al reciproka dependeco de la ŝtatoj de la mondkomunumo kuŝas la reala dialektiko de la nuntempa evoluo. Ĝuste tiamaniere – per la batalo de la antagonismoj, kun malfacilaĵoj, kvazaŭ palpante – formiĝas kontraŭdira, tamen en reciproka interdependeco homogena, multspece tuteca mondo", tekstas en la Politika Raporto de Centra Komitato de KPSU por la 27-a Partia Kongreso. En tiu procedo pli kaj pli estiĝas komunaj tutmondaj kaj tuthomaraj interesoj. La mondo pli kaj pli fariĝas komuna domo. Kompreneble ankaŭ estonte ekzistos konfliktoj. La detruo de nia komuna domo ja ĉesigus ilin, sed samtempe ĝi signifus la pereon die ties loĝantoj. Jam sur la tutmonda packongreso en Helsinki en 1955 Jean-Paul Sartre diris, ke „la negativa universaleco de la hidrogena bombo" devus havi kiel kontraŭpezon la pli fortan kaj pli efikan „pozitivan universalecon de la unueco de la homa specio rilate al la problemo pri la paco". La nocio „homa specio" nun jam ne nur estas biologia nocio, sed sinonimo por la „kolektiva volo de la popoloj" en nova paca mondo.

El: „Sonntag", n-ro 47/1986, Berlin (GDR)
trad.: Dieter Dungert

M. Waller

Ĉernobil kaj la pacmovado

Du katastrofoj sur la kampo de alta teknologio – la eksplodo de la spacveturilo Challenger kaj la liberiĝo de radioaktivaj substancoj en Ĉernobil – demonstris al la pacmovado tute klare diversajn realaĵojn.

Dum la eksplodo de la spacveturilo Challenger evidentigis la danĝerojn de la absurdaj planoj pri astromilito, Ĉernobil donis al ni etan antaŭguston pri radioaktiva katastrofo, kiun povus kaŭzi la nuklearmilaj arsenaloj, kies stokoj senĉese kreskas en la procedo de la vetarmado.

Se ĉiuj registaroj kaj amasmedioj sammezure maltrankviliĝus pri la militdanĝero, Ĉernobil prezentus al ili amplekasan materialon por pripensado pri rapida neniigo de la danĝero, kiu emanas de la nukleaj armiloj. Kiel alie ne supozeble, Usono kaj kelkaj ĝiaj aliancanoj reagis per torento de malamikecaj klarigoj kaj reportaĵoj, kiuj preskaŭ ekskluzive baziĝas sur troigoj kaj spekulaĵoj. Nur de tempo al tempo, kiam oni donis la parolon al ekspertoj pri nuklea energio, kelkaj objektivaj informoj pri Ĉernobil penetriĝis al la publiko. Sed tio okazis nur rare.

Per la informoj, kiujn la okcidenta flanko disvastigis pri miloj da mortintoj en Sovetunio kaj pri la kontaminado de vastaj teritorioj en orienta Eŭropo, oni volis atingi, ke la zorgo de la publiko pro la akcidento ne transiros en trankvilan pripensadon pri la interligoj. Ĉernobil fariĝis ĉefa instrumento por delogi la atenton for de la demandoj, kiuj rezultas senpere el tiu ĉi katastrofo. Per la senfina incitado de histerio eĉ la problemo de sekura utiligo de nuklea energio estis misprezentita.

Por si la pacmovado vidas la gravecon de la katastrofo en Ĉernobil ne en spekuladoj kaj mensogoj, kiuj tiriĝas tra multaj komentoj pri la katastrofo. Sed Ĉernobil evidentigis en eta kadro la teruran forton, kiun entenas la nuklea vetarmado. Per tiuj mensogoj, disvastigitaj de Usono kaj ĝiaj plej intimaj aliancanoj, oni volis deturni la atenton de la plej novaj klopodoj de Sovetunio pri finigo kaj deturno de la vetarmado, kiuj komenciĝis per la stopo de nukleaj testoj. Plue oni volis per tio silentigi la kreskantan publikan kritikon pri la militinstiga konduto de Usono en internaciaj aferoj.

Post kiam nun la vero pri Ĉernobil estas konata, la absurdaĵoj estas evidentaj. (La usona gazetara agentejo United Press International [UPI] raportis komence, ke pro liberiĝo de nuklea materialo 2 000 homoj perdis sian vivon, sed poste ĝi dementis, fine de majo, sian aserton. Laŭ vortoj de UPI-raportisto ekestis la informo el „neklarigeblaj kaŭzoj".)

Refoje oni atendas de Usono, reagi pozitive al la propono, farita de la sovetia ĝenerala sekretario Miĥail Gorbaĉov kaj ripetita la 14-an de majo, pri renkontiĝo kun prezidanto Reagan kun la celo ĉesigi la nukleajn testojn. Sovetunio ankoraŭfoje plilongigis sian unuflankan moratorion pri testoj je 3 monatoj ĝis la 6-an de aŭgusto. La pordo por la nuklea malarmado restas malfermita.

El „Friedenskurier", Helsinki n-ro 6/86
Tradukis Renate kaj Dieter Berndt

Genadi I. Gerasimov

Novaj vojoj al pensado

Genadi Ivanoviĉ Gerasimov estas konata sovetia ĵurnalisto kaj spertulo en internaciaj rilatoj. Nuntempe li estas ĉefredaktoro de la semajna gazeto „Moscow News", kiu aperas en rusa, franca, angla, hispana kaj araba lingvoj.

Antaŭ tridek jaroj Bertrand Russell kaj Albert Einstein postulis de ni, ke ni lernu „pensi "alie". La kvereloj inter Oriento kaj Okcidento ne estu decidotaj per milito. En la tiel nomata Russell-Einstein-Manifesto ambaŭ filozofoj instigis, ke la homoj antaŭ ĉio rigardu sin kiel tiajn, egale ĉu ili vivas kiel laboristoj, komercistoj, agrikulturistoj, grandaŭ etbienuloj. „Rigardu vin simple kiel anojn de la homa gento".

Dum miaj esploroj mi konstatis, ke Russell kaj Einstein ne estis la unuaj, kiuj esprimis sin en tiu ĉi senco, kvankam por ili ekzistis speciale urĝaj kaŭzoj fari tion. Jam en 1928 Romain Rolland alvokis fondi Pacan Internacion kaj venki ĉiujn politikajn, socialajn, religiajn, filozofiajn kaj intelektajn antaŭjuĝojn, kiuj disigas la homojn. La homoj lasu sin gvidi nur de la klara kaj senpera konscio pri la komuneco de ĉiuj vivantoj.

Rolland estis indignita pri la tranĉea milito, dum kiu la homoj estis forbuĉitaj en same terura kiel sistema masakro. Russell kaj Einstein estis maltrankviligitaj de nova danĝero – la atombombo – kiu mortigas sendiference la batalantojn kaj ĉiujn aliajn. Hodiaŭ tiu ĉi danĝero, pri kiu ili atentigis, superis ĉiujn iliajn prognozojn. Ilia mesaĝo atingis novajn dimensiojn, ĉar multaj faktoj indikas, ke milito kun nukleaj armiloj alkondukus neeviteble la atoman vintron.

Antaŭ la starigo de la teorio pri la atoma vintro, la strategoj multe cerbumis pri la atoma eskalado, pri la atoma armeo kaj la eblecoj, ĉe certaj antaŭkondiĉoj venki la kontraŭulon en atoma milito. Sed oni nutras danĝeran iluzion, se oni forĝas planojn por fulma milito, neniiganta la politikan kaj armean potencon de la kontraŭulo, dum ke oni sin mem kaŝus malantaŭ kontraŭraketa defendŝirmilo, kiu povus haltigi la kontraŭatakon de malfortigita malamiko. Hodiaŭ oni scias, ke polvo, fulgo kaj cindro, kiuj estiĝos per kelkaj nukleaj eksplodoj, malheligos la sunon de la venkinto. Kiu etendos la manojn al tiu ĉi glavo, mem suferos la baton, kiun li iniciatis. Ĉu tio ĉio ne postulas de ni, ŝanĝi nian pensadon?

La atoma minaco atingis hodiaŭ dimension, kiu inkluzivas la finon de la homa historio, la morton de Klioa, de tiu muzo, kiu en la greka mitologio devis gardi la daŭrigon de la homa historio. Tiu ĉi daŭrigo riskas ĉesi, ĉar la milito, kiu ĝis nun minacis unuopulojn, endanĝerigas hodiaŭ la tutan homan genton.

La morala demando pri la celo kaj la rimedoj fariĝos abstrakta pro la nukleaj armiloj. Ĉar ĉiu provo apliki ilin por atingi la aspiratan celon per militado estos nula, ĉar ambaŭ kontraŭstarantaj malamikoj pereos. Oni agus kvazaŭ oni bruligus sian domon por ripari ĝin, aŭ mortigus homon por ŝanĝi ĉe li unuopan karakteran trajton. Rilate al atoma milito la skemo pri gajno kaj malgajno estas neaplikebla.

Tiu ĉi armilo, produkto de la homa spirito, minacas nuntempe haltigi la iron de la historio per nekonsekvenco kaj per konfuziĝo de la politika pensado. Se la grandaj militoj de iam forbalais urbojn kaj tutajn popolojn, atoma milito finus la kronikon de la homa historio. Post la atoma milito jam neniu ekzistus, kiu povus legi ĝin.

Heredinte tiun ĉi planedon de niaj antaŭuloj, ni mem estas respondecaj pri ĝi antaŭ niaj posteuloj, kiuj siaflanke devas transdoni tiun ĉi heredaĵon al la venontaj generacioj. Alie dirite, ni ĉiuj per ĵuro ŝuldas al Klioa daŭrigi la homan historion.

Se oni volas gardi la pacon, oni nepre devas doni al ĝi prioritaton. La komuna intereso devas rangi antaŭ la intereso de grupoj aŭ klasoj. Laŭ Lenin, el severe marksisma vidpunkto, la intereso de la ĝenerala evoluo rangas antaŭ tiu de la proletaro, ĉar akirante la potencon, la proletaro ne agas pro potencavideco, sed pli ĝuste por liberigi la socion de ekspluatado, starigi egalecon kaj krei kondiĉojn por la evoluo de ĉiu unuopulo.

Marx ekvidis en la fundamenta transformado de la rilatoj inter laboro kaj kapitalo necesan kondiĉon por la mondpaco. En la Inaŭgura Adreso de la Internacia Laborista Asocio (1864) li substrekis la neceson krei kondiĉojn, sub kiuj la fundamentaj leĝoj pri moralo kaj justeco, regantaj la rilatojn inter la unuopuloj, ekvalidos ankaŭ inter la popoloj.

La malarmado signifas la sole eblan vojon starigi novan kaj justan mondan ordon, kiu tiamaniere garantias sekurecon. Nur ĝi permesas uzi la grandegajn intelektajn kaj materiajn helpfontojn, liberigitaj de ĝi por la celoj de la ekonomia evoluado kaj de la prospero. La homaro atingas turnopunkton de sia historio, kie ĝi devas elekti inter du vojoj. Ĝi povas venki la ĝisnunan inertecon kaj rezigni pri nocio de sekureco, kiu baziĝas sur konceptoj de potencekvilibro kaj de arme-teknikaj solvoj. Sed ĝi povas ankaŭ resti ostaĝo de la vetarmado sur la kampo de nukleaj kaj kemiaj armiloj kaj aliaj, same teruraj neniigiloj. Pri tiu ĉi alternativo povas decidi nur ĉiuj ŝtatoj kune, sen konsidero de sia socia sistemo kaj de la stato de sia ekonomia evoluo. Tiu decido postulas kuraĝon, sed ĝi estas ebla. Hodiaŭ oni jam ne rajtas kontentiĝi sin per duonaj paŝoj, kaj partaj solvoj, kiuj limigas la vetarmadon nur sur certaj kampoj, dum en aliaj sferoj ĝi estas akcelata.

Estas tempo, likvidi ĝis la fino de tiu ĉi jarcento por ĉiam la mortminacon, kiu pezas sur la popoloj de post la tragedioj de Hiroŝima kaj Nagasaki. Ŝajnus al ni konvena, ke Sovetunio kaj la Unuiĝintaj Ŝtatoj, kiuj disponas pri la plej grandaj stokoj de nukleaj armiloj, farus la unuan decidan paŝon kaj la aliaj atompotencoj sekvus ilian ekzemplon.

La mondan opinion pli forte instigi al nova pensmaniero estas unu el la esencaj taskoj de la Internacia Jaro de Paco. Se la membroŝtatoj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj iliaj popoloj forte subtenas tiun ĉi pacjaron, tio certe povas kontribui al tio, ke Klioa ne devas morti.

El „UNESCO-Kurier" n-ro 8/86
Tradukis Renate kaj Dieter Berndt

Klaus Steiniger

„Mi volas ilin mortaj", diris Calley

Leŭtenanto, kiu en Vjetnamio masakris 507 homojn, nun estas rigardata kiel modela civitano de Columbus en Georgio

En Columbus (en la usona federacia ŝtato Georgio) la magazeno de la juvelisto V. V. Vick apartenas al la plej renomaj vendejoj. Kvin belaspektaj vendistinoj priservas la pretendeman klientaron. Ilia ĉefo, mode vestita viro kun fruntkalvo, duobla mentono kaj akvecaj okuloj malantaŭ la orrandaj okulvitroj diskrete movas sin en la malantaŭo. Li parolas duonvoĉe, kiam li de tempo al tempo prenas la telefonaŭskultilon aŭ ridetas amike, kiam li donas instrukcion. Neniu konjektus, ke ĉe tiu ĉi nur 1,60 metrojn alta direktoro de la firmao temas pri la iama leŭtenanto William Calley la juna – unu el la plej kruelaj murdistoj de la vjetnama milito.

Sanga „herostrata ago"

Fine de la 60-aj jaroj lia nomo trairis la kolumnojn de la gazetaro, en Usono oni skribis librojn pri Calley. Antaŭ ol atingi hontigan famon per sia tiel nomata herostrata ago – aparte abomena krimo – li estis tio, kion oni ĝenerale nomas „griza muso". Inter 731 samaĝaj lernantoj de la supera lernejo li atingis laŭ scipovo nur la 666-an rangon. La armean lernejon Fort Benning li finis kiel 120-a el 156 edukitoj. Antaŭ eniri en la armeon li provis sin kiel telerlavisto, aŭtobusa konduktoro kaj asekura detektivo. Li povis nek establiĝi profesie nek akiri personajn amikojn.

La milito, kiu postulis laŭ usonaj indikoj tri milionojn da mortaj vjetnamoj kaj 58 721 batalmortigitajn usonanojn, tiam donis al li la ŝancon, venĝi sin por ĉiuj malvenkoj de sia vivo. En Vjetnamio li plenumis „mision".

Kiam la de li gvidita kompanio la 16-an de marto 1968 ricevis la ordonon „pacigi" la vilaĝon Son My (la invadintoj nomis ĝin My Lai), Calley instinkte flaris sian ŝancon. La loko situis en unu el la „Free Fire Zones" (zonoj de libera pafado) en suda Vjetnamio. En la memkompreno de la agresintoj tio signifis, ke oni rajtis mortpafi sendistinge ĉion, kio moviĝis.

Ideologio en celilo

Poste Calley mem raportis, kio tie okazis. „Ĉe akvofoso miaj viroj havis antaŭ si aron da vjetnamoj kaj pafis al ili. Mi aliĝis kaj ankaŭ pafadis." La soldato Paul Meadlo el la sama kompanio protokoligis: „Ni havis kune 30 ĝis 40 vilaĝanojn kaj gardis ilin. Leŭtenanto Calley alvenis kaj diris: ‚Mi volas ilin mortaj.' Li reiris kelkajn paŝojn, enŝaltis la aŭtomatikon de sia mitraleto kaj ekpafis ... Ses- aŭ sepfoje ni ŝanĝis la magazenojn ... Post tio ni pelis 70 ĝis 100 homojn en foson. ‚Jen atendas nin ankoraŭ alia laboro, Meadlo', diris la leŭtenanto. Calley pafadis en la foson kaj mi ankaŭ." La mitralisto Olsen aldonis: „En la foso ĉefe estis virinoj, infanoj kaj beboj."

Skrupulojn Calley tiutempe kaj ankaŭ poste ne konis. „Ni ne estis en My Lai por mortigi homojn", li klarigis siajn motivojn. „Ni estis tie por neniigi ideologion, por ekstermi la komunismon." 507 homoj mortis en ĉi tiu tago en Son My, inter ili 76 beboj kaj 123 infanoj.

Malgranda arĉo el bambuaj stangoj hodiaŭ memorigas pri Son My, kie Calley kaj lia trupo murdis.

Foto: Zentralbild



Nur 4 loĝantoj transvivis la masakron. La tiam 10-jaran Phan Thi Trinh, kiu nun en la memorejo en la sudo de Vjetnamio raportas al aliaj pri sia sorto, oni savis grave vundita post dumhora kuŝado sub ŝia mortinta onklino. La soldatoj de Calley, kiuj informis siajn superulojn pri „mortigo de 128 malamikoj en batalo", mortpafis ŝian tutan familion.

La vero evidentiĝis nur 18 monatojn poste, kiam la soldato Ridenhour letere komunikis la okazintaĵon al 30 reprezentantoj de la usona publiko. Sekve de tio la konata publicisto Seymour Hersh skribis sian multlande aperintan raportaĵon, iama frontfotografo vendis Son-My-fotojn por 55 000 dolaroj al la gazetaro.

„Ĉiu brigado en Vjetnamio havis sian My Lai, sed ne ĉiu havis iun Ridenhour, kiu malkaŝis ĝin", rimarkigis brigadkomandanto kolonelo Henderson lakone. Pro masivaj protestoj en la usona publiko oni komencis oficialan ekzamenadon. La 5-an de septembro 1969 la usona armea justico akuzis leŭtenanton Calley pro multobla murdo. Meze de novembro 1970 en Fort Benning komenciĝis la proceso. Jam tiutempe la akuzito en kelkaj rondoj estis rigardata kiel „viktimo" kaj „popola heroo", en Columbus ekzemple li povis senpage manĝi en ĉiuj restoracioj. Urbestro Mickells konfesis, ke li ĉiam admiris sinjoron Calley.

En separitaj procesoj oni absolvis la senperan ĉefon de la murdisto-leŭtenanto, kapitanon Medina, kiu estis komencinta la „pacigon" kaj la divizian komandanton kolonelo Koster. La solan kulpon oni ŝovis al Calley kaj kondamnis lin je dumviva aresto pro 22 murdoj.

Glaceaj gantoj por murdisto

Post tio dekstraj organizaĵoj mobilizis la publikan opinion, pli ol 100 000 telegramoj de „patriotaj" usonanoj inundis la Blankan Domon. Prezidento Nixon tuj ordonis hejmareston en la propra loĝejo ĝis la decido de la dua instanco.

Post la konfirmo de la decido de la milita tribunalo la armeo reduktis la punon al 20 jaroj. La armea ministro Callaway tiam ankoraŭfoje duonigis la puntempon kaj post tri kaj duona jaroj la murdisto de Son My libera iris hejmen.

Li restis en Columbus, aĉetis de siaj intervjuo-honorarioj grandan domon kaj edziniĝis la filinon de la bonstata juvelisto Vick.

Tiel li fariĝis „modela civitano" – 19 jarojn poste.

El „Neues Deutschland", 1987-02-14/15
trad.: D Dungert

Mil papergruoj

La sekva artikolo estas fragmento el la broŝuro, kies aŭtoroj kaj eldonantoj estas lernantoj de la Internacia Lernejo en Hiroŝima, Japanio. Ĝi priskribas la mallongan vivon de malgranda japana knabino, kiu kaŭze de postsekvoj de la atombombo en Hiroŝima malsaniĝis je leŭkomio, kaj ĝi rakontas pri la infanklubo fondita post ŝia morto, kies celo estas agi por la paco.
Por pli detalaj informoj pri la klubo kaj ĝia agado skribu al The Hiroshima Center for Global Education, 2–6, 2-Chome, Ushita-naka, Higashiku, Hiroshima-Shi, T 30 Japanio.

Tiu ĉi historio komenciĝas en la jaro 1945. En la japana urbo Hiroŝima vivis, kune kun duonmiliono da aliaj homoj, knabino kun la nomo Sadako Sasaki. Kiam la knabino estis du-jara, la unua atombombo uzata kontraŭ homoj, estis faligita super Hiroŝima. La plej granda parto de la urbo estis plene detruita kaj forbrulis komplete. Sadako troviĝis proksimume du kaj duonan kilometrojn for de la loko, kie eksplodis la bombo, sed ŝi suferis nek brulvundigon nek aliajn lezojn, almenaŭ ne laŭ la komencaj konstatoj.
Kelkajn semajnojn post la bombeksplodo mortis en Hiroŝima homoj je malsano, kiun la kuracistoj ne konis. Tute sane aspektantaj homoj subite iĝis malfortaj kaj malsanaj kaj fine mortis. Tiu ĉi fenomeno estis tiel stranga kaj novspeca, ke neniu sciis, kion fari kontraŭ ĝi. Fakte ankaŭ hodiaŭ ankoraŭ neniu scias precize, kian efikon la priradiado havas kaj kiel oni estas de ĝi afekciata.
Kiam Sadako fariĝis dek du jara, ŝi estis normala, feliĉa knabino, kiu vizitadis la lernejon en sia urbkvartalo kaj lernis kaj ludis kiel ĉiuj aliaj. De post la bombeksplodo forpasis dek jaroj, kaj Sadako havis en sia kapo aliajn aferojn. Pri kio ŝi plej multe pensis, estis la rapidkurado.
Iutage, post kiam ŝia teamo ne laste dank'al Sadako gajnis gravan stafetan kuron, la knabino sentis sin subite tre laca kaj vertiĝis. Post mallonga tempo la atako pasis, kaj Sadako pensis, ke la kurado simple tro lacigis ŝin. Dum la sekvaj semajnoj ŝi penis, jam ne plu pensi pri tio, sed la vertiĝatakoj ripetiĝis, ĉefe dum la kurado. Ŝi parolis kun neniu pri tio, eĉ ne kun sia plej bona amikino Chizuko. Finfine iu matene ŝi sentis sin tiel malbone, ke ŝi falis teren kaj restis por momento kuŝanta. Nun rimarkis ĉiuj, ke io ne estas en ordo. Oni venigis Sadakon en malsanulejon de Ruĝa Kruco por esplorado. La rezulto estis por ĉiu ajn nekomprenebla. Sadako suferis je leŭkemio, iu speco de sango-kancero. Tiam oni konstatis ĉe sufiĉe multaj infanoj leŭkemion, kaj oni nomis ĝin „la malsano de la A-bombo". Preskaŭ ĉiuj malsanuloj mortis je la sekvoj, kaj Sadako ege timis. Ŝi ne volis morti.
Mallonge post ŝia enhospitaligo ŝia amikino Chizuko vizitis ŝin. Ŝi kunportis por ŝi specialan paperfolion, el kiu ŝi faldis gruon. Poste Chizuko rakontis legendon. La gruo estas rigardata en Japanio kiel sankta birdo. Ĝi vivas, laŭdire, mil jarojn, kaj se malsanulo faldas el papero mil gruojn, li resaniĝos. Sadako decidis faldi mil gruojn. Pro sia malsano ŝi ofte estis tro laca, por senĉese labori. Tamen ŝi faldis ekde tiu tago ĉiam, kiam ŝi kapablis, papergruojn.
Tiel finfine Sadako finpretigis siajn mil gruojn, sed ŝi ne estis resaniĝinta. Anstataŭ ĉagreniĝi pro tio kaj rezigni, ŝi decidis faldi ankoraŭ pliajn papergruojn. Ŝi komencis sian duan milon. Ŝia kuraĝo kaj ŝia pacienco mirigis ĉiujn. Ĉirkaŭita de sia familio, de kiu ŝi estis tiom amata, ŝi endormiĝis la 25-an de oktobro 1955, por ĉiam en paco.
Sed nia rakonto ne finiĝas per la morto de Sadako. La malgranda knabino havis multajn geamikojn, kiuj tre amis ŝin kaj al kiuj ŝi tre mankis. Kaj Sadako ne estis la unusola kaŭzo de ilia malĝojo. Granda nombro de aliaj infanoj el Hiroŝima mortis aŭ estis mortontaj, ĉiuj ili estis viktimoj de la atombombo. La amikoj de Sadako deziris nepre fari ion por ili. Tial tridek naŭ de ŝiaj kunlernejanoj fondis klubon kaj komencis kolekti monon, por dediĉi al ilia memoro monumenton. Tre baldaŭ ĉiu ajn estis informita pri tio. La gelernantoj de 3 100 japanaj lernejoj kaj tiuj el naŭ aliaj landoj donacis monon, kaj la 4-an de majo 1958, preskaŭ tri jaroj post la forpaso de Sadako, estis disponeblaj la necesaj rimedoj kaj la monumento estis starigita. Tiu ĉi pacmonumento de la infanoj troviĝas en la Pacparko en la centro de Hiroŝima, precize sur tiu loko, kien falis la bombo.
La agado de tiuj infanoj, kiuj volis krei monumenton, fariĝis tiel konata, ke ĝi kondukis al pretigo de filmo kun la titolo „Mil papergruoj". En ĝi partoprenis 60 infanoj el Hiroŝima kaj 20 el Tokio, kaj kiam la filmo estis preta, ili volis daŭrigi sian agadon kaj kuniĝi en nova klubo. Temas pri la hodiaŭ preskaŭ 30-jara „Klubo de mil papergruoj". Ĝia celo estas, helpi al la infanoj, kunvenigi ilin por mediti pri la paco kaj agi por ĝi. Ĝiaj membroj flegas la monumenton de Sadako, vizitadas postvivantojn de la bombatako, tiujn, kiuj dum la eksplodo troviĝis en Hiroŝima kaj estas hodiaŭ maljunaj kaj malsanaj, kiel ankaŭ ĉiujn, aliajn, kiuj pro iu ajn kaŭzo bezonas helpon.
Sed ili faras ankoraŭ ion alian: Ĉiam ankoraŭ ili faldas papergruojn. Tiujn birdojn ili uzas diversmaniere. Kelkfoje ili pendigas ilin sur la monumenton de Sadako aŭ sur aliajn monumentojn de la Pacparko en Hiroŝima. Kelkfoje ili sendas la papergruojn al gvidaj personoj de la grandpotencoj, por memorigi ilin, ke la infanoj de la tuta mondo ne plu deziras nukleajn armilojn. Kaj ĉiam, se eminentaj politikistoj, postvivantoj de la atombomba atako aŭ personoj, kiuj agas por la paco venas al Hiroŝima, membroj de la „Klubo de mil papergruoj" akceptas ilin kaj metas ĉirkaŭ ilian kolon ĉenon el papergruoj, bonvenigas ilin kaj vekas ilian komprenon por tio, kion signifas Hiroŝima.
La plej bona klarigo pri la senco de tiuj faldlaboroj de la urbo Hiroŝima kaj de la Klubo de papergruoj troviĝas sendube en la vortoj engravuritaj en la soklo de la pacmonumento de la infanoj:

TIO ESTAS NIA KRIO
TIO ESTAS NIA PREĜO
KREI PACON EN TIU ĈI MONDO

El „UNESCO-Kurier" n-ro 8/86
Tradukis Renate kaj Dieter Berndt

RECENZO

Germana Antologio. Trad. de Wilhelm Herrmann kaj Helmut Rössler. Redaktis Ortwin Brodt. Gerlingen: Bleicher-Verlag. 1985, 327 p.

La volumo enhavas tradukojn el la unua jarmilo de la germana literaturo, t.e. ekde la plej frua epoko ĝis ĉ. 1700. Tio ampleksas la fruĝermanan epokon (– 763 post Kristo) kun la sorĉformuloj de Merseburg (Merseburger Zaubersprüche) kaj la Hildebrand-Kanto. La tempo de la Karolidoj kaj Otonidoj (763–1024 p. Kr.) i.a. estas reprezentita de specoj el la Heliand-Eposo kaj la Valtharo-Eposo. Pli ampleksa estas la literaturo de la tempo de la trobadoroj (Minnesänger) kun kantoj de i.a. Heinrich von Morungen, Walther von der Vogelweide, Hartmann von der Aue, Wolfram von Eschenbach, Gottfried von Straßburg. Ni trovas partojn de la Nibelunga Kanto. La Malfrua Mezepoko (ĉ. 1250–1400) estas reprezentita i.a. per Majstro Eckhart. La Renesanco kaj

(daŭrigo p. 37)

Aprezo de la kontribuo de UNESKO al la sekurigo de la paco

Festaranĝo en la berlina dramteatro okaze de la 40-a datreveno de la fondo de la organizo

La mondvasta agado de la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (UNESKO) en la intereso de paco kaj interpopola amikeco estis aprezita la 4-an de novembro 1986 en Berlin en festaranĝo okaze de la 40-a datreveno de ĝia fondo. Al la aranĝo en la berlina dramteatro invitis la UNESKO-komisiono de GDR. Ĉeestis ankaŭ la vicĝeneraldirektoro de UNESKO, Julio Labastida Martin del Campo.

Julio Labastida Martin del Campo en sia parolado emfazis la esperon, ke la homoj per komuna agado konservos la pacon. En la pasintaj 40 jaroj UNESKO pli kaj pli vastigis sian reprezentan karakteron precipe per la eniro de la ŝtatoj de la Tria Mondo, kiuj enportis siajn historian kaj kulturan spertojn en la organizon. Konsidere al la evolustato de la detruiloj la parolanto avertis pri la danĝero de neniigo de la homaro. Li pledis por defendo kaj fortigo de la multflanka kunlaboro kaj akcentis, ke por la homaro ekzistas nenio pli grava ol vivi kune, labori kune kaj progresi kune. La UNESKO-reprezentanto dankis al GDR pro ĝia kunagado en multaj aktivaĵoj de la organizo.

Antaŭe festparolis la ministro pri kulturo de GDR, d-ro Hans-Joachim Hoffmann. En sia parolado li diris i.a.: „Same kiel UNO ankaŭ UNESKO estiĝis kiel rezulto de la venko de la ŝtatoj kaj popoloj de la kontraŭhitlera koalicio super la faŝismo sub la impreso de la detruoj kaj viktimoj, kiujn postulis la ĝis nun plej kruela milito en la historio de la homaro de multaj ŝtatoj kaj popoloj. Tiel la novestiĝinta tutmonda organizo sur spirita kaj kultura kampoj apartenis al la sistemo de internaciaj korporacioj, establitaj fine de Dua Mondmilito sub konsidero de la historiaj instruoj cele al malebligo de nova genocido, cele al evoluigo de multflanka internacia kunlaboro kaj kreo de la antaŭkondiĉoj por paca futuro de la homaro.

La aprezo de la agado de UNESKO pro tio necesigas unualoke trakti tiun bazan orientiĝon de ĝia agado, la plenumon de la sindevigo pri efika kontribuo al paco kaj sekureco laŭ ĝiaj specifaj rimedoj kaj eblecoj. Ĉiu malgrandigo de tiu ĉi eminente politika agado, ĉiu postulo pri t.n. „senpolitikigo" de la organizo signifus subfosadon de la konstitucia misio, transprenita de la fondomembroj de la organizo.

Hodiaŭ en la mondo ne ekzistas pli grava problemo ol la konservado de la paco. Por la malhelpo de nuklea inferno batalas milionoj da homoj sur ĉiuj kontinentoj, en potencaj pacmovadoj, en internaciaj ŝtataj kaj neŝtataj organizoj. Estas do tute nature, ke UNESKO dum la pasintaj kvar jardekoj pli kaj pli konsideris tiun ĉi evoluon kaj metis la kontribuon al sekurigo de la paco en la unuan lokon de ĉiuj siaj multflankaj sciencaj, edukaj kaj kulturaj aktivaĵoj.

Al tia evoluo kontribuis ankaŭ la aliĝo de multaj aziaj kaj afrikaj ŝtatoj, liberiĝintaj el sub la kolonia jugo. Se UNESKO en la jaro 1954, kiam aliĝis Sovetunio kaj pluaj socialismaj ŝtatoj, havis 63 membrojn, ĝis nun la nombro kreskis ĝis 158 ŝtatoj.

La granda plimulto de tiuj en la 60-aj kaj 70-aj jaroj en UNESKO akceptitaj ŝtato-membroj serĉis kaj trovis en UNESKO konfirmon de sia post la liberiĝo de la koloniismo elformiĝinta dezirego al paco, al malhelpo de imperiisma superregado, al forigo de rasismo kaj apartismo, al respektado de suvereneco, de la rajtoj de la popoloj kaj al internacia subteno en la venko super la materia kaj spirita heredaĵo de la koloniismo.

La apero de reprezentantoj de tiuj ĉi junaj ŝtatoj sendube estis gajno por la organizo. Novaj ideoj kaj kreskantaj devoj fariĝis videblaj.

Tio kompreneble okazis en proceso de multflankaj diskutoj kaj de la penado pri intereskompromiso. Sed tio tute ne povas okazi alimaniere en organizo de ŝtatoj, kiu apartenas al la plej grandaj en la mondo kaj kiu entenas tiom da ŝtatoj kun diferencaj sociordoj kaj politikaj ordoj. Por la progreso oni devas batali. Interkompreniĝo premisas la prezenton de kontraŭaj opinioj same kiel la pretecon preni la partneron serioza, pacience aŭskulti lin kaj serĉi komunajn solvojn.

Krei breĉon por nova pensmaniero en la mondo – en tio ni vidas grandan, ĝis nun verŝajne neniam spertitan defion por la estonta laboro de UNESKO.

Mi rajtas emfazi ĉi tie, ke Germana Demokratia Respubliko kiel ĝis nun tiel ankaŭ estonte kune kun multaj ŝtatoj de la mondo defendos UNESKO-n. Ni volas laŭpove aktive kaj konstruive partopreni la agadon de UNESKO, respondantan al la postuloj de la epoko. Ni povas kaj devas fari multon por vivi kune kaj ĉe tio ankaŭ helpi unu al la alia.

Germana Demokratia Respubliko akceptiĝis en UNESKO la 24-an de novembro 1972 kiel 130-a ŝtato-membro. Tamen ni rajtas diri okaze de ĉi tiu jubileo, ke ni estas ligitaj kun la baza deziro de UNESKO, la akcelado de paco kaj kompreniĝo inter la popoloj per kunlaboro sur spirita kaj kultura kampoj, pro la deklarita registara politiko de Germana Demokratia Respubliko jam de ĝia fondiĝo. Jam en 1955 ni fondis nacian UNESKO-komisionon de GDR, kiu multflanke aktivis por sekvi la laboron de UNESKO, analizi ties decidojn kaj publikigi ilin en GDR. Nia UNESKO-laboro plene kongruas kun la politiko de nia ŝtato, celanta la prosperon de la popolo, pacon kaj malarmadon.

Tute en la senco de la UNESKO-konstitucio GDR ebligas al ĉiuj siaj civitanoj alpropriĝi al si la trezorojn de scienco kaj kulturo. La rajto je kleriĝado kaj partopreno en la kultura vivo, sendepende de la socia pozicio, de raso aŭ sekso, por niaj civitanoj estas ne nur konstitucie garantiata, sed estas viva realeco. La respektado de la homa digno, de la kulturaj atingaĵoj de aliaj popoloj kaj la strebado al paco kaj internacia kompreniĝo en nia respubliko estas devigaj edukceloj, kiuj estas tre gravaj por ni kaj por kiuj ni elspezas konsiderindajn rimedojn. La scienca kaj kultura politiko de Germana Demokratia Respubliko celas al pliigo de la materiaj kaj spiritaj havaĵoj de la popolo. Per la rimedoj de la kulturo kaj de la scienca esplorado nia respubliko ankaŭ volas kontribui al la evoluigo de pacaj internaciaj rilatoj.

GDR pledas por ekvilibro inter intelektaj kaj agadrilataj aktivaĵoj de UNESKO. Ĝi pledas por pligravigo de la sociaj kaj humanaj sciencoj, kiel tio reliefiĝis ankaŭ en la 125-a kunsido de la ekzekutiva konsilantaro, kies membro GDR estas. Pro tio GDR pledas por la intensigo de la esplorado pri tuthomaraj problemoj, pro tio ĝi kunlaboris por intelekta antaŭeco en komunikadaj problemoj, ĉe teoriaj analizoj sur la kampo de la universitataj instruaferoj, de popoledukado kaj profesia edukado kaj en specifaj demandoj de la eŭropa kunlaboro.

UNESKO nun komencis novan projekton. Nome ĝi proponis al UNO, proklami tutmondan jardekon de kultura evoluigo, komencante kun la jaro 1988. GDR nemiskompreneble pledis por la organizado de tia tutmonda jardeko de kultura evoluigo.
Por ni kulturpolitiko estas kaj flegado de la kultura heredaĵo de la homaro kaj stimulo por la nuntempa artisma kreado kaj la kultura agado de ĉiuj civitanoj. Por ni internacia kultura kunlaboro estas kontribuo al reciproka estimado de kulturaj valoraĵoj, al la sciiĝo pri la unikeco kaj valoro de la vivo, por transpreno de respondeco en la bataloj de nia epoko.
GDR dum la pasintaj jardekoj laŭpove kontribuis al la subteno de la evoluantaj ŝtatoj per senpera solidara helpo, per perado de spertoj kaj edukado de ekspertoj kaj faros tion ankaŭ estonte.
GDR enportos en la agadprogramon por la tutmonda jardeko siajn spertojn pri internacia kunlaboro kun ŝtatoj de diferencaj sociordoj. Ĝi estas preta por interŝanĝo de opinioj kaj spertoj kaj por reciprokaj konsultoj kun ĉiuj ŝtatoj, kiuj deziras tion.
Malgraŭ la graveco de la diskutado pri buĝetaj problemoj, pri la neceso de pli granda ŝparemo, pri la altigo de la efektiveco de la agado de la UNESKO-aparato, pri la ekvilibrita reprezentado de la unuopaj ŝtatogrupoj en la UNESKO-sekretariejo, pri pli bona kunlaboro inter UNESKO kaj internaciaj neŝtataj organizoj ktp. laŭ nia opinio la unua tasko de la tutmonda organizo por edukado, scienco, kulturo kaj komunikado restas videbligi la spiritajn defiojn kaj mobilizi la popolojn de la mondo por paco kaj socia progreso, por kreo de humana kaj homdigna vivmedio.
La responskonscia sinteno de Sovetunio rilate al la vivproblemoj de la homaro, la historiaj proponoj pri malarmado fare de la Ĝenerala Sekretario de la Centra Komitato de KPSU, kamarado Miĥail Gorbaĉov, donas al la homaro la eblecon grave redukti la danĝeron de nuklea inferno en la daŭro de 10 jaroj kaj tute forigi la atomarmilojn ĝis la fino de la jarcento, ĝisfunde fini la vetarmadon sur la tero kaj ne etendigi ĝin en la kosmon. La prudento ne havas argumentojn kontraŭ tiaj iniciatoj. Kiom da materiaj kaj spiritaj fortoj estus liberigeblaj!
Pro tio necesas intensigi la politikan dialogon, la kontaktojn kaj intertraktojn por tamen realigi ĉion, kio konturiĝis en Reykjavik. La volo de la popoloj kaj ŝtatoj devas esti realigata ankoraŭ pli decide, pli pacience kaj pli bataleme. Ni devas ebenigi la vojon al la prudento.
Post ĉiuj spertoj atendeblas, ke la tutmonda organizo UNESKO aktive partoprenos en la granda disputo pri la futuro de la homaro kaj mi estas certa, ke la popoloj aŭdos kaj komprenos ĝian voĉon."

El „Außenpolitische Korrespondenz", n-ro 49/1986
trad.: D. Dungert

Letero el Potsdam

Karaj kolegoj artistoj kaj kulturagantoj!
Ni vivas en mondo disŝirita de militoj, rasismo, malsato kaj ekstrema neegaleco. Tiuj fenomenoj akriĝas.
Por multaj el ni la batalo kontraŭ tio estas demando pri vivo kaj morto.
Sed nin ĉiujn minacas katastrofo, kiu per unu fojo finus vivadon kaj mortadon: la nuklea neniigo. Ĝi estus la fino de ĉiuj bataloj kaj venkoj.
Malgraŭ la diferencoj en niaj kredkonfesoj, niaj kulturaj tradicioj kaj niaj mondkonceptoj ni artistoj kaj kulturagantoj el Afriko, Azio, Latinameriko kaj Eŭropo kunvenis en la kadro de la UNESKO-laboro en Potsdam, en Germana Demokratia Respubliko al simpozio „Kulturagantoj kaj artistoj por la paco". Ni interparolis senkaŝe, sen antaŭjuĝoj kaj pripensis komune, kion ni povas fari.
En la pasinteco artistoj ofte, en multaj diversaj situacioj faris ĉion eblan por eviti sociajn tragediojn, sed oni ne aŭskultis ilin.
Nun oni devas aŭskulti nin. Niaj vortoj kaj agoj devas esti tiel klaraj, ke ne eblas ignori nin.
La mondo ne povas transvivi nuklean militon.
Ni renkontiĝis en la urbo de la Potsdama Traktato, kiu definitive ĉesigis la Duan Mondmiliton.
Ni, kunestantaj ĉi tie en Potsdam, apelacias al vi, kiuj ne estas ĉe ni:
Ni per nia arto, niaj kulturaj aktivecoj kaj nia persona engaĝiĝo efike kontribuu al la savo de la homaro!
Potsdam, la 19-an de decembro en la UNO-jaro de la paco 1986.

trad.: D. Dungert

Desmond Mpilo Tutu

„Ĉi-tie ne ekzistas paco, ĉar ne ekzistas justeco"

Desmond Mpilo Tutu, ekde 1985 anglikana episkopo en Johannesburg, estis distingita en la jaro 1984 per la Nobel-pacpremio, pro sia rolo en la opozicio kontraŭ la rasa apartigo. Kiel ĝenerala sekretario de la sud-afrika eklezia konsilantaro, episkopo Tutu estas gvida parolanto por la rajtoj de la nigraj sudafrikanoj. Li ĉiam pledis por senperforta protesto. Sekvas fragmento el lia parolado okaze de la solena transdono de la premio, la 11-an de decembro 1984 en Oslo.

... Temas pri lando, al kiu mankas ĉiu ajn senso de justeco kaj kiu tial konas nek pacon nek sekurecon. La maltrankvileco estas endemia kaj restos por ĉiam karakterizaĵo de Sudafriko, ĝis finfine la origina kaŭzo, la rasa apartigo, estos malaperigita. En Sudafriko ne estas paco. Ĝi ne ekzistas, ĉar ne ekzistas justeco. Ne povas ekzisti vera paco kaj sekureco, antaŭ ol ne regos justeco por ĉiuj loĝantoj de tiu ĉi bela lando.
Mi parolis amplekse pri Sudafriko, ĉar mi konas tiun ĉi landon plej bone, sed ankaŭ ĉar ĝi estas kopiaĵo de la mondo kaj ekzemplo por tio, kio en aliaj landoj validas en diversa grado – tie, kie regas maljusteco, la paco ankaŭ estas endanĝerita.
Pro tio, ke mondvaste ekzistas necerteco, la nacioj implikiĝas en sovaĝa armada vetkurado kaj forĵetas miliardojn por neniigaj armiloj, dum milionoj da homoj suferas malsaton...
Ni havus rimedojn ĉiutage bone nutri la mondan loĝantaron. Sed tamen ni ĉiutage estas turmentataj per la dramo de malgrasiĝintaj, senrajtigitaj homgrupoj, kiuj en senfinaj vicoj staras tenante ujojn por kolekti, kion postlasis al ili la kompatemo de la mondo – tro malmulte kaj tro malfrue! Ĉu ni neniam ŝanĝiĝos? Kiam finfine leviĝos la popoloj de la mondo por diri, ke oni finu, ĉar sufiĉas?
... Kiam ni finfine komprenos, ke vetarmado nur akcelas la necertecon? Hodiaŭ ni estas al nuklea plena neniigo pli proksime, ol ni estis antaŭe kun pli malgrandaj scioj kaj pli malgrandaj rimedoj.
Ni fariĝu metiistoj de la paco! Ni pledu por justeco, se ni volas pacon! Ni forĝu el niaj glavoj sokojn!

El „UNESCO-Kurier" n-ro 8/86
Tradukis Renate kaj Dieter Berndt

Aleksandr Gorbovski

Enigmoj de Antikveco

Averto pri la „terura armilo", kiu neniigas ĉiun vivon

La sekva artikolo bazas sur libro de la sovetia popularscienca verkisto Aleksandr Gorbovski, en kiu li montras laŭ malnovaj legendoj, ke multnombraj aspektoj de la moderna scienco – inter ili ankaŭ astronaŭtiko – estis konataj jam en la antikveco. Vere, ke el neklarigeblaj kialoj tiu ĉi scio perdiĝis, sed la rememoroj pri ĝi pluvivas en mitoj kaj legendoj.

En sia verko kun la titolo „Libro de hipotezoj" Gorbovski atentigas pri du malnovhindaj epopeoj, „Mahabarato" kaj „Ramajano", kiuj enhavas la vivan priskribon de „terura armilo", neniiganta ĉiun vivon sur la Tero. Tiu ĉi priskribo ege similas al la sciencaj prognozoj pri la „nuklea vintro", kiu ekestus post apliko de nukleaj armiloj.

En la malnovhindaj epopeoj oni klare avertas kontraŭ la apliko de tia armilo.

La aŭtoro de la libro, aperonta en la moskva eldonejo „Znanije", traktas multajn faktojn kaj fenomenojn, pri kiuj parte ekzistas tute klaraj sciencaj klarigoj, dum aliaj ĝis nun nur stariĝas demandojn.

La aŭtoro ne atendas, ke la leganto konsentu senpripense kun ĉiuj liaj hipotezoj, sed antaŭ ĉio li volas instigi al pripensado. Sekvas fragmentoj el la baldaŭ aperonta libro.

Esplorante la plej fruajn surterajn civilizaciojn, la sciencistoj renkontas ĉiam denove tiun saman enigmon. Multo el tio, kion ni rigardas hodiaŭ kiel ion novan – hodiaŭ kiam ni troviĝas sur sufiĉe alta branĉo de la arbo de scienc-teknika progreso – estas nenio alia ol la forgesita malnova. La informfluo, kiu atingas nin el trans tiuj foraj jarmiloj, eĉ devigas nin starigi al ni la demandon: De kie posedis la antikvuloj tian ankaŭ laŭ niaj hodiaŭaj skaloj modernan scion?

Krome estas tute evidente, ke ili ricevis ĝin jam en uzpreta formo. Ĉu eble ekzistis iam sur nia planedo altevoluinta pracivilizacio, kiu dum la tempoj malaperis aŭ trovis sian finon pro naturkatastrofo? Tia hipotezo ne estas tre fantazia. La historio de „homo sapiens" montras, kiel pruvas la plej novaj trovaĵoj kaj esploroj, ke ĝi daŭras jam pli longe, ol oni ĝis nun supozis. Kiaj scioj perdiĝis, por post jarmiloj denove atingi nin? Pri kiaj scioj disponis la antikvuloj? Pri tio mi volas sekve raporti.

Scioj de la antikvaj astronomoj

Unu turniĝo de la Tero ĉirkaŭ la Suno daŭras laŭ la Gregoria Kalendaro 365,242 500 tagojn. La Majaoj elkalkulis, ke tiu ĉi periodo havas 365,242 129 tagojn. Nuntempe oni fiksis la daŭron de unu jaro helpe de astronomiaj precizaj aparatoj je 365,242 198 tagoj. Plej proksime atingis tiun ĉi rezulton la Majaoj, kiuj konis nek teleskopojn nek aliajn, hodiaŭ kutimajn, helpilojn.

La periodon de plenluno al plenluno la Majaoj elkalkulis kun aberacio de 0,0004 (34 s) por unu tago. La aberacio en la turniĝciklo de Venuso sumiĝis ĉe ili nur je tutaj 7 (!) sekundoj por 50 jaroj. Tian precizecon atingis la eŭropa scienco nur fine de la pasinta jarcento.

En nia epoko la Suno troviĝas dum la ekvinokso en la konstelacio de Fiŝoj. Antaŭ 2000 jaroj ĝi troviĝis en la konstelacio de Ŝafo kaj antaŭ tio – en la tempo de la frua Sumero – en la konstelacio de Ĝemeloj. Plena movciklo de la firmamento daŭras 25 920 jarojn. Tiun ĉi nombron ni trovas en multnombraj tekstoj de Sumeroj, ekzemple en la templaj bibliotekoj de Nippur kaj Sippar.

Pri la fruhistoria astronomia scio atestas ĉiam denove la trovaĵoj de la arkeologio. Ekzemple oni trovis en Ukrainio dentegon de mamuto kun noĉoj, kiuj signifis la tagojn de la luna monato, inkluzive de la luneklipso. Tiu ĉi trovaĵo estas rigardata kiel pruvilo por astronomiaj observoj, realigitaj antaŭ 30 000–35 000 jaroj. Kaj supozeble eĉ tio tute ne estas la plej frua dato, ekde kiam la homo interesiĝas pri la steloj.

La 17-an de februaro 1600, post ok jaroj de karcerpuno, Giordano Bruno estis mortigita sur la ŝtiparo de la inkvizicio. Li estas la aŭtoro de la panteisma doktrino pri Dio kiel la mondanimo de la senfina universo kaj pri la ekzisto de loĝataj mondoj ekstere de la nia. Sed jam jarmilojn antaŭ li tiu ĉi ideo troviĝis ne nur kiel supozo, sed kiel neskuebla vero en la piramidaj tekstoj kaj ankaŭ en la Sanktaj Libroj de Malnov-Hindio kaj Tibeto. En la antikva sanskrita poemo „Viŝnu-Purana", tekstas ke la Tero estas nur unu el milionoj kaj milionoj de similaj, loĝataj mondoj. En iu tibeta teksto oni diras, ke en la universo ekzistas tiom da mondoj, ke eĉ Budho ne scipovas nombri ilin.

Kiel niaj antaŭuloj imagis al si la Teron

Aliaj faktoj atestas pri tre frua kaj neklarigebla scio pri la formo kaj dimensio de nia planedo. En la jaro 1633 la inkvizicio devigis Galileo Galilei-on, unu el la plej signifaj naturesploristoj de ĉiuj tempoj, sin deturni publike de la mondkoncepto de Koperniko, laŭ kiu la Tero estas globo, turniĝanta ĉirkaŭ la Suno.

Kaj denove ni povas konstati, ke tiuj astronomiaj leĝoj, kiuj kostis al la moderna scienco tiom da peno kaj oferoj, jam troviĝas en fruaj postlasitaj tekstoj el Hindio, Egiptio, el la antikva Oriento kaj Ameriko. Tiel la ideo pri globa formo de nia Tero estis konata jam al la antikvaj egiptoj. La Diino de la Suno diras en la demotika skribo de Leiden: „Rigardu, la Tero antaŭ mi estas kvazaŭ skatolo. Tio signifas, la Tero de Dio antaŭ mi estas ronda pilko."

La egiptoj ankaŭ supozis, ke la Tero moviĝas laŭ la samaj leĝoj kiel la planedoj Jupitero, Saturno, Marso, Merkuro kaj Venuso. La Suno, kiun la mezepoka eŭropa scienco dum longa tempo rigardis kiel senmovan estas priskribita en antikvaj egiptaj tekstoj kiel moviĝanta astro, kiu ŝvebas kiel globo en la sino de la Diino Nut (la Diino de ĉielo).

En Kabalo, mistike-esotera doktrino pri la sekretoj de la kreado el la 9-a ĝis 13-a jarcentoj, tekstas en la libro Sohar: „La tuta loĝata Tero turniĝas en cirklo. Iuj loĝantoj troviĝas supre, la aliaj malsupre. Se en unu regiono de la mondo regas la nokto, en alia la tago, se por la homoj en iuj lokoj estas mateno, en aliaj lokoj estas vespero." Ĉi tie la hebrea-mistika sekreta doktrino rilatas al fruepokaj libroj.

Ĉu ne estas imageble, ke Platono, kiu parolis pri la Tero kiel ronda korpo, kies moviĝo estas la kaŭzo de la ŝanĝo inter tago kaj nokto, ĉerpis sian scion el tiuj fontoj?

Tiujn spurojn de astronomiaj ideoj ni trovas ankaŭ en la fruaj bibliaj tekstoj, kie oni diras: „Li etendis la nordon super la malpleno. Li pendigis la teron sur nenio". (Ijob 26,7)

Tiuj fruepokaj scioj retroviĝas pli poste ankaŭ ĉe kelkaj kristanaj teologoj. Beda Venerabilis („la respektinda") kaj Guillaume de Conches parolas pri la

Tero kiel korpo, havanta la formon de globo. En la leningrada Saltikov-Sĉedrin-biblioteko konserviĝas Biblio el la 14-a jarcento, kiu apartenis iam al la reĝdomo de Navarra. La koloraj ilustraĵoj en ĝi montras la Lunon kaj la Sunon same kiel globojn.
Sed ne nur la formo, ankaŭ la grando de la Tero estis konata al la popoloj de la Antikveco. Eratosteno de Kireno, kiu kiel la unua elkalkulis la cirkonferencon de la Tero, kaj Aristotelo indikis en siaj verkoj valorojn, kiuj mirinde proksimiĝis al la efektivaj datumoj. Sed ne sufiĉe. La stadio, malnovgreka mezurunuo por distancoj (1 olimpia stadio = 192,27 m) rilatas ĝuste al tiu ĉi grando, tio estas la cirkonferenco de la Tero. Do, 1 stadio egalas al $1/60^3$ de la cirkonferenco de la ekvatoro, aŭ alie dirite al $1/216\,000$ de tiuj 40 076 km.
Rameno – mezurunuo por distancoj en antikva Egiptio – egalas al $1/108\,000$ de la sama elirvaloro, okulfrapa estas la interligo inter la du ciferoj 216 kaj 108 (216 = 108 × 2).
Diference de la profana mezurunuo, piramida futo estas tiu, kiun la pastroj en antikva Egiptio uzis por mezuri distancojn. Ĝia longo (0,63 566 m) estas nenio alia ol $1/10\,000\,000$ de la terpolusa radiuso. La aberacio de la hodiaŭaj datumoj estas nur 0,003 mm.
Kiam en la pasinta jarcento estis necese starigi unuecan internacian mezurunuon por distancoj, tiuj ĉi faktoj ne estis konataj. Sed la homa intelekto revenis denove al la sama modelo, la cirkonferenco de la meridiano de nia planedo. Tiel la metro, kiun ni hodiaŭ uzas, estas la kvardek miliona ono de la ekvatora cirkonferenco de la Tero.

Pri la komenco de ĉiu komenco

Same precizaj, neatenditaj kaj ampleksaj ŝajnas esti ankaŭ kelkaj aliaj kosmologiaj scioj de niaj antaŭuloj. Ekzemple la koncepto pri la origina aspekto de la mondo. La antikvaj sumeranoj pensis, ke iam ekzistis en la mondo nur unu maro, el kiu pli poste leviĝis la firma tero. La saman asertas ankaŭ la atestoj de la fenicoj. En ĉiuj antikvaj egiptiaj tekstoj oni parolas pri praoceano, kiu estis kovrinta la mondon kaj en kiu naskiĝis ĉiu vivo.
La hinda dia himno „Rigvedo" diras pri tio, ke la mondo estiĝis el granda akvo, kiu plenigis la kosmon. Similan asertas ankaŭ antikvaj ĉinaj fontoj – komence de ĉiu komenco la tuta Tero estis inundita.
En la Biblio tekstas: „Kaj Dio diris: Estu firmaĵo inter la akvo, kaj ĝi apartigu akvon de akvo" (1-a Moseo, 6). Simila koncepto ekzistis ankaŭ ĉe la indianoj en Ameriko. En la Sankta Libro „Popol-Vuh" ni legas, ke la tersurfaco tiam ankoraŭ ne estis videbla. Ekzistis nur la malvarma maro kaj la granda firmamento.
Estas en la plej alta grado nekredeble, ke tiel similaj konceptoj pri la kosmo povis estiĝi en diversaj kontinentoj, sendepende unu de la alia. Prefere oni povas supozi, ke ĉi tie – kiel ankaŭ konsidere al aliaj ekkonoj – devis ekzisti komuna fonto de tiuj ĉi konceptoj.
Favore al tiu ĉi hipotezo parolas ankaŭ iuj multsignifaj koincidoj kun la kalendaroj. En Antikva Oriento, en Egiptio kaj Hindio la jaro estis dividita en dek du monatojn. Sed kial ekzistas la sama dividprincipo ankaŭ transe de Atlantiko kaj eĉ en Suda Ameriko?
La zodiakaj signoj estas unu el la plej malnovaj stelaj simboloj. Jam de la plej praaj tempoj ili estis konataj al la Sumeranoj, Hindoj kaj Ĉinoj. Kaj kio plej multe mirigas, ankaŭ en Ameriko. Cetere el la entute dek du eŭroaziaj zodiakaj signoj, naŭ konformas kun la amerikaj: (rigardu la suban tabelon!)

Pri la estiĝo de-la diversaj lingvoj

En la Libro de Moseo tekstas: „Sur la tuta tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero . . . Kaj ili diris: Venu, ni konstruu al ni urbon, kaj turon, kies supro atingos la ĉielon, kaj ni akiru al ni gloron, antaŭ ol ni disiĝos sur la supraĵo de la tuta tero . . . Kaj la Eternulo diris: Jen estas unu popolo, kaj unu lingvon ili ĉiuj havas; kaj jen, kion ili komencis fari, kaj ili ne estos malhelpataj en ĉio, kion ili decidis fari . . . Ni malleviĝu do, kaj Ni konfuzu tie ilian lingvon, por ke ne komprenu unu la parolon de alia . . . Tial oni donis al ĝi la nomon Babel, ĉar tie la Eternulo konfuzis la lingvon de la tuta tero kaj de tie la Eternulo disigis ilin sur la supraĵon de la tuta tero." (1-a Moseo, 11)
Similan mesaĝon enhavas ankoraŭ pli malnova sumera mito. Ankaŭ en la legendoj de la amerikaj popoloj troviĝas tiaj sciigoj. Tiel ekzemple tekstas en iu legendo el la regno de la Toltekoj (Meksikio): „Post la diluvo, kiam restis vivaj nur malmultaj homoj kaj post kiam ili denove plimultiĝis, ili decidis konstrui altan turon . . . Sed iliaj lingvoj subite konfuziĝis, ili ne plu komprenis unuj la aliajn kaj disiĝis en ĉiujn partojn de la tero."
La ideon pri unueca pralingvo defendis ankaŭ la sovetia akademiano N. J. Marr (1864–1934). Gvidaj lingvistoj revenis en la lasta tempo ankaŭ al tiu ĉi koncepto. La tri lingvofamilioj de Eŭroazio – do la hindoeŭropa, la urala kaj la altaja lingvofamilioj – laŭ ilia opinio originas de unu pralingvo, kiu siaflanke devenas el ankoraŭ pli malproksima tempo de komuna prahistoria lingvo. Uzanto de tiu ĉi lingvo estis laŭ la opinio de la sveda lingvisto Wessen iu prapopolo – iu antaŭulo de ĉiuj modernaj popoloj kaj lingvoj de Eŭroazio. Similan koncepton, kiel ĝi nun estas postulata de kelkaj esploristoj, jam konis la antikvaj popoloj, kiel ni do vidis. Ĉu tiu ĉi okulfrapa analogio estas klarigebla nur per pure hazarda koincideco?

La doktrino pri la materio

La moderna scienco reprezentas la vidpunkton pri la senfineco de la materio, t.e. ĝia nekreebleco kaj nedetruebleco. Tiun ĉi ekkonon la sciencistoj atingis per multnombraj eksperimentoj, disputoj, teoriaj kaj filozofiaj ĝeneraligoj, kiuj okupas generaciojn. Tute ne malmultaj komunaj ideoj estas troveblaj en la difinoj pri materio el la komenco de nia erao. Ĉe Diadoro (Siculus) ni legas, ke la ĥaldeoj opiniis la materion eterna kaj nedetruebla.
De la semidaj ĥaldeoj, kiuj asimiliĝis kun la babilonanoj kaj regis ĉefe inter 625–538, originas eble ankaŭ alia doktrino – tiu pri la atomo kiel la plej malgranda ero de materio. Tiu ĉi ideo ekzistis ankaŭ en du aliaj civilizacioj, multajn mil kilometrojn malproksimaj unu de la alia. Nome en Antikva Hindio kaj Grekio.
La sovetia filozofo Kostjuĉenko, kiu komparis ambaŭ tradiciojn, trovis vicon da komunecoj inter ili. En ambaŭ temas pri la nedividebleco de la atomoj rigardataj dum longa tempo kiel la plej malgrandaj eroj de materio. Kaj la grekaj kaj la hindaj filozofoj kredis la atomojn pro ilia eteco nepercepteblaj. La atomoj estis por ili eternaj, nekreeblaj kaj nedetrueblaj. Kaj finfine la atomoj formas la materian bazon de ĉiuj objektoj kaj

Sumera-akada civilizacio	Antaŭkolumba Ameriko	
	Peruo (Inkaoj)	Jukatano (Majaoj)
ŝafo	lamo	–
taŭro	cervo	cervo
ĝemeloj	viro kaj virino	du militestroj
kankro	sepio	sepio
leono	pumo	oceloto
virgo	diino de maizo	diino de greno
skorpio	mumio	skorpio
sagitario	sago kaj lanco	sago kaj lanco
amforo	akvo	akvo

de ĉiuj mondoj, kiuj en la universo estiĝas kaj malaperas.
Ĉi tie du cirkonstancoj estas same gravaj – unue la ekzisto de tiaj konceptoj en la antikveco kaj due ilia ekzisto en du civilizacioj tiel malproksimaj unu de la alia.

De kie devenas la mapoj de la antikveco?

Atentigante pri la alta precizeco de iuj mapoj el la antikveco kaj ilia simileco, kelkaj sciencistoj esprimas la ideon, ke temas pri kopioj de iu praa kaj perdiĝinta originalo. La antikvaj kartografoj mem indikis, ke ili kopiis praajn mapojn, kiuj estis konservitaj en la biblioteko de Aleksandrio.
Kelkaj de tiuj mapoj montras kun ega precizeco landojn kaj kontinentojn, kiujn oni malkovros nur jarcentojn pli poste.
La vojo al Ameriko ekzemple ne kondukis nur trans Atlantikon. Atentigante pri malnovĉinaj manuskriptoj, la rusa esplorvojaĝisto Biĉurin rimarkigis, ke la ĉinoj jam konis vojon al Ameriko almenaŭ 1 000 jarojn antaŭ Kolumbo. Sciigojn pri Ameriko oni ankaŭ povas trovi en ankoraŭ pli malnovaj skriboj, ekzemple en tibetaj tekstoj el la jaro 1500 a.K. Tion konigis la sovetiaj orientalistoj Gumiljov kaj Kuznecov.
Konata estas ankaŭ mapo de Antarkto de Orontius Finaeus, farita en la jaro 1532. Ĝi estas rimarkinda almenaŭ laŭ du vidpunktoj. Unue la konturoj de la ĉeflando sur lia mapo memorigas ege al jenaj, kiujn ni vidas sur la nuntempaj mapoj. Kiel tio estas klarigebla? La Antarkto estis malkovrita ja nur en 1819/21 de diversaj ekspedicioj, post kiam James Cook kiel la unua en 1772 dum siaj antaŭenpenetroj malantaŭ la sudan polusan cirklon supozis teron malantaŭ la glacibarа limo. Sed la kartografado kaj malkovrado de novaj antarktaj regionoj daŭris ĝis la komenco de nia jarcento.
De kie do niaj antaŭuloj povis esti ricevintaj informon pri Antarkto? Marcus Tullius Cicerono, kiu parolis pri la Tero kiel pri globo, diris ekzemple, ke ĝiaj randregionoj, tra kiuj pasas la finaĵoj de la ĉiela akso, estas neĝkovritaj. Tio estis skribita preskaŭ 2 000 jaroj antaŭ tiu evento, kiam la unua rusa sudpolusa ekspedicio malkovris Petro I-a insulon kaj Aleksandro I-a landon.
Due ni rimarkas sur la mapo de Orontinus Finaeus la figuradon de riveroj kaj profundaj fjordoj, en kiujn ili enfluas. Sed nek riveroj nek fjordoj estas hodiaŭ konataj en Antarkto. Sur tiuj lokoj, kie estis markitaj riveroj, anstataŭ ili troviĝas nuntempe glaĉeroj, kiuj malrapide migras en la maron. Tiu ĉi fakto tuj redatigas la mapon en tempon, kiam ĉi tie antaŭ la apero de glacimontoj ankoraŭ devis ekzisti riveroj. Tio povis esti proksimume 4 000 jaroj antaŭ nia erao, kiam ega glacikrusto kovris la tutan kontinenton.
Alia atesto. Ekzistas mapo de Claudius Ptolemeno, sur kiu estas registritaj en norda Eŭropo diversaj blankaj regionoj. Post pli nova rekonstruo de la pasado de la lasta glaciepoko evidentiĝis, ke la konturoj de tiuj zonoj estas identaj kun tiuj ĉi regionoj, kie ankoraŭ estas troveblaj restaĵoj de glaĉeroj. Se tiu ĉi supozo estas ĝusta, tiam la mapo de Ptolemeno montras la geologiajn cirkonstancojn el ĉirkaŭ la 8-a jarmilo a.K.
Turka mapo el la jaro 1559, kiu estas kopio de pli malnova, impresas per la precizeco, per kiu ĝi prezentas la orientan marbordon de la hodiaŭa Norda Ameriko kaj Alasko. Spite al la cetere tiel ekzakta prezentado, mankas sur ĝi la Beringa markolo. Anstataŭ ĝi ekzistas inter Siberio kaj Ameriko firmtera ponto. Verŝajne tiu ponto, trans kiun la homo en la frua ŝtonepoko iris de la azia tero al la amerika kontinento. Sed tiu ĉi peco de firma tero malaperis antaŭ minimume 30 000 jaroj.
La usona esploristo pri historio kaj geografo Prof. Charles Hapgood kolektis ampleksan materialon, kiun li kunigis en monografio kun la titolo „La mapoj de la antikvaj maristoj". En ĝi li venis al la konkludo, ke dum tre foraj tempoj devis ekzisti unu civilizacio ĉirkaŭprenanta la tutan mondon, kies kartografoj desegnis perfektajn mapojn de la tuta terglobo. Tiuj ĉi mapoj baziĝis sur la sama nivelo de efektivigo, la tute sama nivelo de la matematika scio kaj la samaj metodoj. Eble oni uzis eĉ samspecajn instrumentojn por starigi ilin.

La metalurgio de la antikveco

Kiel konate bronzo estas alojo de kupro kaj stano. Dum jarmiloj la homoj uzis objektojn el kupro, antaŭ ol ili malkovris, ke la aldono de 10 % da stano estigas alojon de rimarkebla firmeco. En Eŭropo la bronzo ekaperis malfrue (proksimume 1300 a.K.) kaj disvastiĝis ĉie. Laŭ opinio de fakuloj jam la unuaj objektoj el bronzo atestis pri la alta majstreco de iliaj kreantoj. Tiu ĉi subiteco kaj alta artlerteco permesis konkludi pri manko de tutaj evoluetapoj.
Paul Rivet, unu el la plej signifaj esploristoj de la kulturoj de popoloj en Ameriko, observis ion similan en Meksikio. Ankaŭ tie komenciĝis la produktado de bronzo tuj je teknike alta nivelo. Antaŭaj evoluetapoj ankaŭ ĉi tie ne estis pruveblaj.
Ĉu la arto de bronzfandado venis de malproksime? La egipta kaj mezopotamia civilizacioj, kiuj estas rigardataj kiel pioniroj de la bronzo, mem ne posedis la necesan krudmaterialon. Tial ili elsendis ĉien ekspediciojn por havigi al si stanon: al Kaŭkazio kaj al la Pirenea duoninsulo. Tie troviĝis la plej proksimaj trovejoj. Pli malproksime en la nordo ekzistis la riĉaj stantrovejoj sur la Britaj insuloj, kiujn la fenicoj nomis ankaŭ Staninsuloj.
Eble la scio pri la bronzo estis parto de tiu konservita scio, kiu dum longa tempo estis rigardata kiel monopolo de esoteruloj. Ne hazarde oni rigardis en Eŭropo kaj alie la produktadon kaj prilaboradon de metaloj dum longa tempo kiel kampon de magio. En praslavaj tekstoj nin renkontas forĝisto ofte kiel mistera sorĉisto.
En la perua altebenaĵo oni trovis antaŭ certa tempo malnovan platinan ornamaĵon. Tiu ĉi valormetalo havas fandopunkton de 1 730 °C. Por la fandado oni bezonas teknologion, kiu devas esti relative proksima al la hodiaŭa. Kaj ankoraŭ alia kohera fakto. En Norda Ameriko estis malkovritaj spuroj de metalurgio, kiu devis ekzisti antaŭ 7 000 jaroj. La ĝis nun nekonataj loĝantoj de tiuj ĉi regionoj scipovis fandi ŝtalon en grandaj fornegoj ĉe 9 000 °C.
Ĝis antaŭ nelonge oni datis la komencon de la epoko de elektro per la jaro 1786, kiam Luigi Galvani malkovris la tiel nomatan galvanan elektron ĉe ranaj femuroj. Sed kelkaj arkeologiaj trovaĵoj lasas nin dubi pri tio. Ekzemple oni trovis dum elfosadoj ĉe la bordo de Tigriso, en la ruinoj de antikva urbo, malgrandajn glazuritajn argilajn ujojn. En ili troviĝis feraj stangoj kaj lutitaj kupraj cilindroj, kiuj estis videble koroditaj de acido. Oni esprimis la supozon, ke tiuj ĉi neklarigeblaj instrumentoj eble servis kiel speco de galvana elemento. Kaj fakte post ilia zorgoplena riparo tiuj ĉi elementoj liveris kurenton.
En Ĉinio troviĝas la tombejo de la konata armeestro Chou Chu (265–316 a.K.). Spektra analizo de kelkaj ornamaĵoj montris, ke ili enhavis ĝis 85 % de aluminio. Sed oni malkovris aluminion nur en 1808. La tiam aplikita fandelektrolizo restis ĝis hodiaŭ la ĉefa metodo por ĝia produktado.

Kaŝita scio

En la antikveco gravaj ekkonoj estis tenataj en plena sekreto. Nur adeptoj posedis ilin. Siamaniere tio ankaŭ konfirmis, ke la homoj jam tiam sciis: depende de la celoj scio povas servi al la bono aŭ al la malbono.
Konekse kun tio Newton skribis: „Ekzistas aliaj grandaj sekretoj krom tiu de la transformado de metalo, pri kiuj la grandaj adeptoj silentas . . . Oni ne povas malkaŝi ilin sen elmeti la mondon al granda danĝero."
La adeptoj severe atentis pri la plenumado de la silentdevo, por ke neniu eksciu de ili, kion ili gardis. „Kiu ekscios pri la sorĉaj sekretoj de la vorto,

gardu ilin kontraŭ ĉiuj kaj kaŝu ilin en la doktrino", tekstas en „Rigvedo". Unu el la magiaj egiptaj papirusoj komenciĝas kaj finiĝas per la alvoko: „Fermu la buŝon! Bridu la langon!"
Klemento de Aleksandrio (2-a ĝis 3-a jc. p.K.) skribis pri la 42 Sanktaj Libroj de Hermeso Trismegisto, kies okultaj saĝecoj pri religio, astrologio, magio, medicino kaj mistiko prezentas paganan paralelon al la kristana gnostiko. Laŭdire li eltrovis kiel magiisto nealireblajn (hermetikajn) ujojn.
En judaismo la mistika religia filizofio „Kabalo" estas transdonata nur buŝe, por malhelpi, ke ĝi atingu fremdajn manojn. El la sama kaŭzo la druidoj (paganaj oferpastroj) en la antaŭkrista Gallujo kaj Britujo faris neniujn ajn notojn. Sian scion ili kunprenis en la tombon.
Kiel ni vidas, unu vojo por konservi la sciojn estis, ke la plej grandajn sekretojn oni ne konfidis al papero. Alia vojo estis la kodado. Ekzemplo por tio estas la multnombraj skriboj pri alkemio.
En la jaro 1585 Rudolf II., ekde 1575 germana reĝo kaj imperiestro, ricevis valoran donacon. Laŭdire temis pri skribo el la plumo de Roger Bacon (1214–1294), kiu vidis la bazojn de la scienco en la sperto, eksperimento kaj matematiko. Li antaŭdiris la inventon de ter- kaj aerveturiloj, de optikaj instrumentoj, de la telefono kaj aliaj pli. Tion ni scias el liaj publikigitaj verkoj. La skribo donacita al la imperiestro neniam aperis en iu el la monografioj de Bacon. Ĝiaj 204 paĝoj konsistis nur el kolumnoj de ciferoj, kiujn ĝis hodiaŭ oni ne sukcesis deĉifri. Certan tempon laboris pri tio grupo konsistanta el matematikistoj, historiistoj, astronomoj kaj armeaj deĉifristoj. Sed ankaŭ ili ne sukcesis. Kelkaj sciencistoj pensas, ke en la proporcioj de kultaj konstruaĵoj same estas koditaj certaj informoj. Ekzemple rezultoj el la mezurado de la Keopsa piramido allasis konkludon pri signifo de la steljaro, pri la periodo de la Tero ĉirkaŭ la Suno kaj pri alia.
Laŭ opinio de la franca astronomo Moreau la origina alto de la piramido kun 148,208 metroj estas proporcia al la distanco de la Tero al la Suno. (Pro la moviĝo de la Tero tiu distanco varias inter 147 milionoj kaj 152 milionoj da kilometroj. La averaĝa distanco al la Suno estas 149,5 milionoj da kilometroj). Se tiu ĉi kalkulo ne estas hazardo, se ĝi vere estis la bazo por la konstruado de la piramido, tio estus plua miriga fakto.
La moderna scienco bezonis multajn jarojn por trovi tiujn ĉi nombrojn. Ankoraŭ Koperniko kaj Tycho Brahe indikis la distancon de la Tero al la Suno per 9 milionoj da kilometroj. Kepler asertis, ke ĝi estas 58 milionoj da kilometroj. Kaj nur fine de la pasinta jarcento oni difinis tiun ĉi distancon precize.
Ĝi estas malfacile elkalkulebla. Por tio estas bezonataj almenaŭ du observantoj, kiuj troviĝas sur kontraŭaj punktoj de la planedo kaj devas samtempe mezuri la incidan angulon de la Suno. Farante tion necesas la plej granda precizeco, ĉar jam el aberacio de nur 1° rezultas eraro de 2 milionoj da kilometroj.

La armiloj de la dikolero

En la malnovhindia eposo „Mahabarato", kiu aĝas pli ol 3 000 jarojn, ekzistas, indiko pri terura armilo. Por ni, vivantaj en la erao de la atombombo, la priskribo de eksplodo per ĝi ekfunkciigita ne ŝajnas esti troigo. Oni priskribas la starton de pafaĵo ĉirkaŭita de fajro. La tuta horizonto malheliĝis. La senfulma flamo disvastiĝis al ĉiuj flankoj. Ĉiuj naturfortoj ekfuriozis. Ŝajnis, ke eĉ la Suno ŝanĝis sian moviĝon. La universo, brulsignita de fajro, skuiĝis kvazaŭ en febro.
La sekvoj de tiu ĉi eksplodo elvokas senintence certajn asociadojn. Tiu ĉi armilo, „destinita por mortigi tutan popolon", ŝanĝis la homojn al cindro. El ĝi rezultis „la morto de ĉio viva". Ĉe tiuj, kiuj restis vivaj, elfalis ungoj kaj haroj, ĉiu nutraĵo estis kontaminita. „Eĉ post kelkaj jaroj la Suno, steloj kaj ĉielo ĉiam ankoraŭ sin kaŝis malantaŭ nuboj kaj regis malbona vetero".
En Hindio tiu ĉi neniigilo estis nomata „armilo de Bramo" aŭ la „flamo de Indro", en Suda Ameriko „Maŝmak" kaj en la kelta mitologio la „arto de tondro". Tiu ĉi armilo naskis fajron, „kiu kapablis formanĝi tri mondojn samtempe". En iuj fontoj tekstis ankoraŭ pli klare: „Tio estas la flamo, kiu devoras la tutan universon en la horo de ĝia pereo".
Ĉu flamo, kiu akompanas la pereon, la ruinigon de la universo? Kion niaj praūloj povis scii pri tio? Ĉu tiuj ĉi priskriboj ne estas esprimo de veraj okazintaĵoj? Kelkaj arkeologiaj trovaĵoj ŝajnas tion konfirmi. La fortikaĵmuroj de Dundalk en Irlando montras tute klare spurojn de temperaturefikoj, kiuj estis tiom altaj, ke fandiĝis granitblokoj de la muro. La fandopunkto de granito estas ĉe 1 000–1 300 °C. Ĉu ĉi tie eble estis aplikita tiu terura armilo?
Alia spuro por la ebla apliko de tiu ĉi armilo estis malkovrita en Malgrandazio dum elfosadoj en Hattusas, la iama ĉefurbo de hititoj. Ĝi allasas la supozon, ke la urbo estis neniigita sekve de alta temperaturefiko, por kiu ne ekzistas klarigo.
En Babilono konserviĝis la restaĵoj de turo, kiu ankoraŭ hodiaŭ havas la imponan alton de 46 metroj. Tio estis la temploturo de la legenda reganto Nimrodo (1-a Moseo 10,8 kaj sekvaj), kiun Jozefo Flaviano opiniis konstruanto de la turo en Babelo. Iuj esploristoj el tio deduktis, ke temas pri postrestaĵoj de la legenda templa konstruaĵo. Pro ilia intenco konstrui la turon ĝis la ĉielo, Dio punis la aŭdacon de la homoj per konfuzo de iliaj lingvoj. Sed ne nur tiu ĉi aspekto interesis la arkeologojn. Ili trovis tie ankaŭ spurojn de arte produktita alta temperaturo. „Ankoraŭ ne ekzistas klarigo por tiu ĉi ardo", skribis unu el la esploristoj, „kiu fandis ne nur centojn da bakitaj brikoj, sed kiu elardigis la tutan skeleton de la ŝtupartemplo kaj ĉiujn argilajn murojn".
Oni ankaŭ ne povas ekskludi, ke Sodomo kaj Gomoro estis viktimoj de tiu ĉi terura armilo. En Biblio (1-a Moseo 19) pri tio tekstas: „Kaj la Eternulo pluvigis sur Sodomon kaj Gomoron sulfuron kaj fajron de la Eternulo el la ĉielo. Kaj li ruinigis tiujn urbojn kaj la tutan ĉirkaŭaĵon kaj ĉiujn loĝantojn de la urboj kaj la kreskaĵojn de la tero".
Dum longa tempo la esploristoj opiniis, ke Sodomo kaj Gomoro apartenas al la regno de legendoj kaj ke post ili restis neniuj postsignoj. Sed antaŭ nelonge sciencistoj trovis la nomojn de ambaŭ urboj, kies situon oni supozis ĉe la Morta Maro, sur la kojnoskribaj tabuloj de Ebla (hodiaŭa Tell Mardich). Tie ili estas menciitaj kune kun Damasko, Bejruto kaj Ĝebalo, urboj do, kiuj hodiaŭ por ni estas konataj.
Ankaŭ aliajn trovaĵojn oni povas rilatigi al tiu ĉi terura armilo. Ekzemple en Hindio oni trovis homan skeleton, kies radioaktiveco superis la normon pli ol 50-oble. Ĉe tia valoro la homo, kiu mortis antaŭ 4 000 jaroj, dum longa tempo devis sin nutri per altgrade kontaminita nutraĵo.

Ĉu la homoj scipovis flugi?

En la jaro 1898 oni trovis en Egiptio lignan skulptitan birdon. Ĝian aĝon oni taksis je 2 500 jaroj. Kiam antaŭ nelonge oni pretigis pli grandan, laŭskale fidelan, modelon de la faraona birdo, ĝi montriĝis kiel flugkapabla. Ĝia aerodinamika profilo permesis al ĝi libere ŝvebi kaj glisi kiel glisaviadilo. „La egiptoj neniam faris modelojn, kiuj ne estus havintaj originalon", komentis tiun ĉi surprizon eksperto pri egiptologio.
Sciigojn pri dioj kaj herooj, kiuj en flugilhavaj ĉaroj moviĝas en aero, oni trovas en la eposoj de multaj popoloj. En „Vedoj", kolekto de religiaj instruoj, la flugaparatoj havas eĉ sian propran nomon – „Vimana" kaj „Agnihotro". En vico da tekstoj oni priskribas la eksteraĵon kaj la konstruon de tiaj flugaparatoj pli precize.
En iu sanskrita skribo tekstas, ke la veturilo ĉe la starto ekmuĝis kiel leono. En aliaj fontoj oni male akcentas la senbruecon de la flugo. Tiuj priskriboj eble rilatis al diversaj flugfazoj aŭ diversmanieraj konstruoj.
Cetere unu detalo ĉiam denove ekaperas en la priskriboj. Jen brilas la ĉiela ĉaro kiel „fajro en somera nokto", kiel

„kometo sur la ĉielo" kaj „ĝi ardis kiel ruĝa fajro" (el Ramajano). Ĝi estis „movigata de flugilhava fulmo", „la tuta ĉielo brilis, kiam ĝi tie flugis" kaj „du fajrofulmoj eliris de ĝi", tekstas en la hinda nacia epopejo Mahabarato.

Sekvan priskribon ni trovas en la sanskrita epopeo Samarangano Sutradharo, konsistanta el 230 strofoj: „Ĝia korpo devas esti forta kaj firma, farita el malpeza materialo, kaj ĝi similas al tiu de granda birdo. En la interno devas esti instalita aparato kun hidrargo kaj sub ĝi antaŭvarmiga instalaĵo. Per la kaŝitaj fortoj de la hidrargo la aero estas kirlata, kaj la homo, kiu troviĝas interne de tiu ĉi veturilo, povas laŭ la plej mirakla maniero flugi grandajn distancojn sur la ĉielo."

Laŭ aliaj fontoj ekzistis „Vimanoj" havantaj la grandon de templo. „Je ĉiuj kvar flankoj troviĝis adekvate laŭ la reguloj, grandaj ujoj, plenigitaj de hidrargo", tekstas en iu fonto.

La vorto „hidrargo" estas diversmaniere tradukebla. En sanskrito ĝi signifas inter aliaj substancon, eleksiron kaj kvintesencon. Krome ĝi estas termino el la alkemio, pli precize dirite simbolo, kun la signifo, kiun nur scias tiu, kiu havas la ŝlosilon por tiu ĉi vorto.

Apenaŭ, ke ĝi ekleviĝis, la „Vimano" ŝanĝiĝis al „perlo sur la ĉielo". Tibetaj sanktaj libroj komparas la flugaparatojn ankaŭ al „perloj sur la ĉielo".

Mi parolis jam pri tio, ke la praulojretenis por si certajn sciojn. Estus strange, se ili ne estus farintaj tion ankaŭ konsidere al la flugaparatoj kaj ties makanismoj.

Dum la regado de la ĉina imperiestro Cheng-Chang (1800 a.K.) iu Ki Kung-shi amatore konstruis flugĉaron kaj leviĝis en la aeron. La vento portis lin en la najbaran provincon. Kaj kion faris la regnestro? Laŭ ĉina kroniko, „li ordonis neniigi la ĉaron, por ke (la sekreton) ne eksciu la popolo".

Sanskrita fonto skribis pri la sekretigo sekvan: „La konstruado de tiuj aparatoj restu sekreto, por ke ĝi (la kono) ne atingu malkompetentajn manojn. Pro tio oni devas gardi la scion, kiu portas tiajn fruktojn, kontraŭ fremdaj okuloj, kaj oni ne rajtas disvastigi ĝin."

Estas tute eble, ke ekzistis kaŭzoj por tiu ĉi timo. En kelkaj malnovaj tekstoj oni parolas pri utiligo de la flugaparatoj por militaj celoj. Kaj la priskribo de tiaj batalscenoj estas en tia grado reala, kiel nur vid-atestantoj povis pri tio rakonti. Ekzemple tekstas en la epopeo Mahabarato, libro Karnaparvano:

„La ‚Vimano' proksimiĝis al la tero kun nekredebla rapideco kaj elpafadis sennombrajn pafaĵojn, kiuj brilis kiel oro kaj mil fulmoj. Poste sekvis egaj eksplodoj kaj centoj da fajroŝtormoj. La armeon atakis paniko; ĉevaloj, batalelefantoj kaj multaj soldatoj, kiujn la eksplodo mortigis, falis teren. La armeo ekfuĝis, kaj la terura Vimano persekutis ilin, ĝis ankaŭ la lasta estis mortigita.

Tiun ĉi priskribon oni donis antaŭ proksimume 4 000 jaroj.

En Ameriko oni trovas ankaŭ pripensigajn informojn. „Popol-Vuh", la sankta libro de Kiĉe-indianoj raportas pri la kvar prapatroj de tiu ĉi popolo, kiuj foje ekvidinte ion sur la ĉielo, adiaŭis siajn samtribanojn kaj foriris al montopinto.

„Ni reiras al nia popolo", ili diris. „Ni plenumis nian devon, nia tempo estas forpasinta."

Kaj la teksto daŭrigas: „ili malaperis tuj poste tie supre, sur la pinto de monto. Ili eĉ ne povis esti entombigitaj de siaj edzinoj kaj infanoj, ĉar ne estis videble, kiel ili malaperis."

En Centra Ameriko konserviĝis la sciigo pri potenca regantino, kiu estis nomata „Fluganta Tigrino" kaj kiu alportis scion al la homoj. Post certa tempo ŝi ordonis, ke oni konduku ŝin sur monton, „kie ŝi en fulmo kaj tondro malaperis".

Tiuj ĉi informoj mirige similas al tiuj el sudorienta Azio. En ambaŭ oni parolas pri klerigantoj, kiuj moviĝis per flugaparatoj kaj post finigo de sia misio denove per ili foriĝis. En la ĉina libro „Guandi" estas priskribitaj jam kvar tipoj de flugaparatoj, kiel informas la sovetia historiisto Liseviĉ. Unu el ili, kiun laŭ antikvaj ĉinaj fontoj uzis Guanju, estis muldita el metalo kaj havis flugilojn. Antaŭ la flugo ĝi estis „plenigita per akvo". Pri alia aparato oni diras, ke ĝia nazo, post kiam ĝi estis forlasita, daŭrigis elradiadi grandan varmon kaj estis enfosita kun ega singardemo. Al tiu ĉi loko, kie leviĝis vapornubo, pilgrimis la indiĝenoj ankoraŭ multajn jarojn poste.

Ĉu ekzistis kosmaj flugoj?

Ĉu estas permesata la ideo, ke surtera civilizacio longe antaŭ ni posedis la scion por atingi aliajn planedojn? La ideo ŝajnas fantazia kaj tamen . . . „Per tiuj aparatoj", informas sanskrita teksto, „la terloĝantoj povas leviĝi en la aeron kaj la ĉielloĝantoj veni sur la Teron." Plu oni diris en ĝi, ke oni per tiaj aparatoj povas moviĝi en la limoj de Surjamandalas (Sunsistemo) kaj Nakshatramandalas (stelsistemo?).

Antikvaj ĉinaj tekstoj asertas, ke ĉina kleriganto Guandi flugis kun kunuloj al Reguluso, le plej hela stelo en la konstelacio de Leono. La informoj pri tio enhavas interesan detalon. Unu el la kunflugintoj glutis ion, post kio li endormis por revekiĝi post 200 jaroj. Kiel iuj teoriistoj pri kosmaj flugoj supozas, ke dum flugoj, kiuj daŭras pli longe ol homa vivo, la anaroj de spacŝipoj falas en anabiotikan staton, ĉar la biologa tempo por ili maksimume malrapidiĝas. La distanco inter Reguluso kaj la sunsistemo estas 85 lumjaroj.

Inter la frukristanaj apokrifaj libroj troviĝas la „Libro de Ĥanoĥ", konata ankaŭ kiel „Libro de sekretoj de Ĥanoĥ". En ĝi oni rakontas pri tio, kiel Ĥanoĥ estis venigita en certan landon, kiu troviĝis en la universo. Tie oni instruis al li la fundamentajn sciojn pri astronomio: la moviĝon de la Suno, la kaŭzojn por la plilongiĝo kaj malplilongiĝo de la tagoj, la strukturon de la lunkalendaro, la fazojn kaj moviĝon de la Luno. Kaj denove kurioza detalo. Kiam Ĥanoĥ revenis al la Tero, liaj infanoj estis pli aĝaj ol li.

Hodiaŭ ni scias, ke io simila tute eblas, se spacŝipo flugas per rapideco, kiu proksimiĝas al la rapideco de la lumo: por la spacŝipa anaro pasas la tempo pli malrapide ol por tiuj, kiuj restis sur la Tero. Sed de kie niaj antaŭuloj povis scii pri tio?

Dum siaj esploradoj la sciencistoj apogas sin jam ne nur sole je transdonitaj tekstoj, legendoj kaj fabeloj, sed ili disponas ankaŭ pri materiaj pruvoj. En la jaro 1976 loĝantoj trovis ĉe la bordo de la rivero Vakŝa en Komia ASSR blankan peceton grandan kiel pugno. Se oni gratis ĝin, aŭ se oni frapis ĝin kontraŭ ion, ĝi elĵetis sparkojn ĉe la koncerna loko. Sciencistoj el la Vavilov-instituto por fizikaj problemoj, la Vernadski-instituto por geokemio kaj analitika kemio de la Akademio de Sciencoj de USSR, la Moskva instituto pri ŝtaloj kaj alojoj kaj ankaŭ el aliaj institucioj esplorekzamenis la trovaĵon pli profunde.

Temis pri parto de ringo, cilindro aŭ globo kun diametro de 1,2 metro kaj de nekonata determino.

Analizo montris, ke la fragmento konsistas antaŭ ĉio el raraj surteraj metaloj: cerio 67,2 %, lantano 10,9 %, neodimo 8,78 %, plu el fero kaj magnezio. Inter la almiksaĵoj oni trovis ankaŭ uranon kaj molibdenon. Ĉar oni konstatis la mankon de radioaktivaj malkombiniĝaj produktoj, la trovaĵo povis havi aĝon de maksimume 100 000 jaroj.

La sciencistoj konkludis el tio, ke temas pri artefarita alojo. Sur la Tero ne ekzistas naturaj materialoj de simila sintezo kaj eco. Kun ega probableco oni povas supozi, ke la alojo estis fandita sur nia planedo (respektive en nia sunsistemo) el pulvoro, kies plej etaj eroj konsistas el kelkaj centoj da atomoj. Eble oni aplikis por la produktado la metodon de malvarma muldado ĉe premoj de pluraj centmiloj da atmosferoj. Sed instalaĵo, kiu laboras per tiaj egaj premoj, ĝis hodiaŭ ne povis esti inventita kaj ankaŭ ne estas baldaŭ atendebla.

El „neue perspektiven" n-ro 1/87
tradukis Renate kaj Dieter Berndt

Rudolf Hahlbohm

BERLIN

ĉefurbo de Germana Demokratia Respubliko

La jaro 1987 estas jubilea jaro por Berlin. Antaŭ 750 jaroj (1237) ĝi estis menciita la unuan fojon per dokumento kiel urbo. La multokaze solenata kaj omaĝata jubileo vekas mondvaste intereson pri la urbo, pri ĝia historio kaj nuno.

Kompreneble la teritorio de Berlin jam pli frue estis loĝata loko, jam dum ŝtonepoko homoj setlis ĉe la bordo de la rivero Spree, nutrante sin per fiŝado kaj ĉasado.

Poste dum mezepoko estiĝis du ĝemelaj urboj Cölln kaj Berlin, ĉe travadejo de la rivero, ĉar komerca vojo tie krucis la riveron. La du ĝemelaj urboj ambaŭflanke de la rivero akiris urban suverencon, estis membroj de la urboligo „Hanse" kaj unuiĝis en la 14-a jarcento por sin ŝirmi kontraŭ malamikoj.

Depost la 15-a jarcento Berlin estis rezidejo de la Hohenzollern-Dinastio. Tio daŭris kvincent jarojn. Militoj, incendioj, epidemioj kaj malsato reduktis la loĝantaron dum la 17-a jarcento. Por fortigi sian absolutisman regadon, la Brandenburg-Prusiaj princoj malfermis la limojn por religiaj rifuĝantoj. Tiel ankaŭ al Berlin venis grupoj da hugenotoj el Francio kaj fuĝintoj el aliaj landoj. Dum la 18-a jarcento la loĝantaro kreskis de 10 000 ĝis 150 000. Speciale la hugenotoj kontribuis al prospero de manufakturoj, komerco kaj kulturo. Ili estiĝis privilegitaj per propraj justico, lernejo kaj preĝejo.

En la jaro 1709 la urboj Cölln kaj Berlin akceptis la komunan nomon Berlin. Ĉar oni ne akordiĝis pri lokigo de la komuna urbdomo, ĝi ricevis sian lokon sur la ponto inter la du urbopartoj. La Brandenburg-Prusia absolutismo estis karakterizita per militarismo; kvinono de la loĝantaro de Berlin estis soldatoj. La agresiva milit-politiko de la prusaj reĝoj pligrandigis Prusion kaj mizerigis la popolon. Tamen ekfloris scienco kaj arto dum la regadtempo de Frederiko la II-a, kiu prezentis kleran absolutismon. En Berlin estiĝis reprezentaj konstruaĵoj. La urbo ricevis sian barokklasicisman profilon. Per proklamo de la Germana Imperiestra Regno (1871) la prusia ĉefurbo fariĝis la metropolo de la imperiestra Germanio.

1917 kun fino de la I-a Mondmilito ankaŭ la Hohenzollern-Dinastio finiĝis. Germanio fariĝis respubliko kaj la lasta imperiestro fuĝis al Nederlando.

Post kunigo de la ses urbokvartaloj de Berlin kun pluaj sep urboj, 59 vilaĝoj kaj 27 bienoj estiĝis la milionurbo.

En la jaro 1933 la faŝismo akiris la potencon, kaj la urbo fariĝis la duan fojon elirpunkto de imperialisma agreso. Finfine la II-a Mondmilito revenis al Berlin, nun la lasta bastiono de la fiaskanta faŝisma reĝimo.



La Palaco de la Respubliko en Berlin Foto: Zentralbild

Post konkero de tiu-ĉi bastiono en majo 1945 per la sovetia armeo, komenciĝis nova ĉapitro por Berlin. Terura estis la heredaĵo, 60 % de la loĝdomoj estis detruitaj, en la centro eĉ 95 % de la konstruaĵoj. Preskaŭ ĉiu ponto estis detruita. La batalon pri Berlin partoprenis 2,5 milionoj da sovetiaj soldatoj, 100 000 el ili kaj el la pola armeo pereis.

Malfacila estis la komenco. Per nuraj manoj la laboristoj savis maŝinojn el la ruinoj. Virinoj forigis la ruinaĵmontojn. Same malfacile estis venki la faŝisman ideologion en la kapoj de la homoj. Dum somero 1945 taĉmentoj de Usono, Anglio kaj Francio okupis la interkonsentitajn urbopartojn de Berlin. 1949, post kreo de Federacia Respubliko Germanio el la tri okcidentaj okupadzonoj, fondiĝis Germana Demokratia Respubliko, kiel unua ŝtato de laboristoj kaj kamparanoj sur germana teritorio. Berlin fariĝis ĝia ĉefurbo kaj ricevis iom post iom sian historian vizaĝon. Komencis prosperi industrio kaj kulturo, arto kaj scienco, komenciĝis profunda solvo de la loĝproblemo per konstruado de novaj kvartaloj. El ĉiuj distriktoj venis laborbrigadoj, la prospero de la ĉefurbo fariĝis afero de la tuta respubliko. Al la ok kvartaloj aldoniĝis tri novaj kun tuta volumo de grandurboj.

Per tio komenciĝis la plej eminenta periodo de la 750-jara historio de Berlin, interrompiĝis la pereiga alterno de progreso kaj reakcio.

Ĉefaj industribranĉoj estas la elektra kaj la elektronika, la kabloproduktado kaj la ŝipfarejoj. Granda parto de tiuj-ĉi fabrikoj estas en la kvartalo Köpenick. Tamen la kvartalo ankaŭ estas etenda ripozejo kaj feriadejo. Pro siaj vastaj arbaroj, lagoj kaj akvovojoj ĝi allogas jare ses milionojn da ripozantoj.

La nova socialisma Berlin elkreskis el ruinoj, pli humana ol iam antaŭe. Ĝi unuigas en harmonio malnovan kaj novan, konservas kaj daŭrigas progresemajn tradiciojn. Depost la 5-a de februaro 1979 ĝi portas la honoran titolon „Urbo de la Paco", distingita de la Monda Packonsilantaro.

La nuna Berlin estas la politika, ekonomia kaj spirita-kultura centro de la respubliko kaj preferata ejo de internaciaj renkontoj. La vizaĝo de Berlin estas karakterizita per kontrastoj inter moderneco kaj idilio, inter industria centro kaj ripozejo. Por karakterizi oni

donis al la urbo diversajn nomojn. Jam dum la 18-a jarcento oni nomis ĝin „Spreeathen" pro ĝia klasicisme konstruita centro, speciale la bulvardo „Unter den Linden" (Sub la Tilioj). Iam ĝi estis rajdvojo inter la reĝa palaco kaj la reĝa ĉasregiono „Tiergarten" (Bestĝardeno).
Poste ĝi fariĝis pompa strato, flankita de reprezentaj konstruaĵoj, ĉefe princaj palacoj. Ili fariĝis viktimoj de la dua mondmilito, sed grandparte renoviĝis. Ankaŭ la tilioj (laŭ kiuj la bulvardo ricevis sian nomon) estas junaj. La kvar vicoj da tilioj, plantitaj en la jaro 1674, devis malaperi dum la faŝisma reĝimo, por ke la strato estu taŭga paradejo. La plej malnova konstruaĵo de la bulvardo estas la iama „Arsenalo por Armiloj kaj Milittrofeoj" (1695–1706, nomita „Zeughaus"). La ankoraŭ baroke influita konstruaĵo servis al glorado de la milito. Decide kontrastas al tio la 22 kaposkulptaĵoj de mortantaj soldatoj super pordoj kaj fenestroj, reflektantaj la mizeron de la milito.
Post la milita detruo kaj aŭtentika rekonstruo, ĝi nun estas Muzeo por Germana Historio. Komplika estis la rekonstruo de la ŝtata Operejo (1741–1743), laŭ aspekto ĝi nun analogas al la historia formo, sed laŭ teknika ekipo fariĝis moderna teatro. Pluaj eminentaj konstruaĵoj de la bulvardo Unter den Linden rekonstruitaj estas i.a. la nova Gardejo (1717–1718), nun Memorejo por la viktimoj de Faŝismo kaj Milito, la Humboldt-Universitato (1748–1766, iam princa palaco), la Universitata Biblioteko (1774–1780), laŭ sia baroke svingita frontlinio nomata „Komodo", kaj la nuna Opera Kafejo, konstruita 1733–1737 kiel Princina Palaco.
La okcidenta parto de la bulvardo ricevis modernajn domojn, inter alie plurajn ambasadejojn. La strato finiĝas per la Brandenburga Pordego (1788–1790). Ĝi troviĝas je la iama urbolimo, tie ankaŭ nun finiĝas la ĉefurbo de GDR. Malantaŭ la Brandenburga Pordego komenciĝas la memstara politika unuo Berlin-Okcidenta, apartigita insulo, kies interligoj kun la cetera mondo kondukas tra GDR, en la aero, sur stratoj, reloj kaj akvovojoj. Ĝian statuson reguligas kvarŝtata kontrakto.
Oni nomas Berlin „Urbo de Teatroj", ankaŭ ili ĉiuj novestiĝis el ruinoj. Sed Berlin ankaŭ estas „Urbo de Muzeoj", la plejmulto el ili troviĝas sur la „Insulo de Muzeoj". Inter la trezoroj de la mondkulturo, tie videblaj, troviĝas la fama Pergamon-Altaro. Multvizitata estas en la parko de Treptow la granda memorejo por 5 000 sovetiaj soldatoj, kiuj pereis dum la batalo pri Berlin.



La Nikolai-kvartalo, komplete fin-rekonstruita 1987 Foto: Zentralbild

Meze en la urbo staras la plej alta konstruaĵo, la 365 m alta televido-turo, kun belvida etaĝo kaj turniĝanta kafejo. Proksime de tie estas la Palaco de la Respubliko. Kun siaj salonegoj, gastejoj kaj aliaj instalaĵoj ĝi estas domo de la popolo, same ĝi estas ankaŭ sidejo de la parlamento.
En Berlin troviĝas la plej superaj instancoj, estas koncentrita kvinono de la scienca potencialo, batas la koro de la respubliko.
Iam formita per la kapitalismo, detruita per la Hitlerfaŝismo, releviĝinta al ruinoj, Berlin estiĝis simbolo pri venko de la socialismo.
Neniam antaŭe dum plurjarcenta historio ĝiaj civitanoj vivis en tiaj cirkonstancoj de homa digno, sociala sekureco kaj prospero.

La Societo por Konservado de Monumentoj en Kulturligo de GDR

Celo de la konservado de monumentoj estas la protektado de ĉio valora, kion la homoj en la pasinteco kreis aŭ kio atestas pri ilia agado. Tial por la konservado de monumentoj engaĝas sin en GDR ne nur ŝtataj institucioj, sed ankaŭ vastaj rondoj de civitanoj, kiuj havas intereson pri monumentoj kiel atestaĵoj de la historio, pri ilia kleriga valoro, iliaj karakterizaĵoj kaj beleco. Unuiĝintaj en la „Societo por Konservado de Monumentoj" ili povas en ties kadro agi por sia persona kaj samtempe socia celoj.
La plivastigitaj taskoj de la konservado de monumentoj en socialisma socio kondukis en 1975 al akcepto de la „Leĝo pri konservado de monumentoj en la Germana Demokratia Respubliko", kiu certigas ankaŭ al la membroj de kulturligo vastan socian kunagadon.
Por realigi tiujn celojn estis fondita en la jaro 1977 la Societo por Konservado de Monumentoj.
Nuntempe en la societo laboras 441 interesgrupoj kun 6 430 membroj.
Ili subtenas la ŝtatajn organojn kaj entreprenojn en la disvastigo de decidoj rilate al konservado de monumentoj, ili disvastigas ĝenerale kaj ĉe la objektoj, kie ili agas, li ideon de konservado de monumentoj kiel moralan kaj pedagogian sindevigon de nia socialisma socio, esploras la historion de monumentoj kaj peras la rezultojn al vastaj rondoj de civitanoj, helpas inventari kaj dokumentadi kaj partoprenas en la ellaborado de konceptoj por restaŭrado kaj socia uzado de unuopaj monumentoj en monumentaj ensembloj kaj de regionoj de protektataj monumentoj.
Por solvi specialajn demandojn pri konservado de monumentoj ĉe la Centra Estraro kaj ĉe la Distriktaj Estraroj ekzistas fakkomisionoj por teknikaj monumentoj, por urbkonstruado kaj arkitekturo. Fakkomisionoj por monumentoj de la politika historio estas starigotaj.
Per sia agado la Societo por Konservado de Monumentoj helpas al la ŝtataj organoj kaj al la Instituto por Konservado de Monumentoj protekti kaj evoluigi nian konkretan kulturan heredaĵon, por ke ĉiu unuopulo ĝuu ĝin kaj por ke la socio hodiaŭ kaj la venontaj generacioj morgaŭ profitu de ĝi.

Irene Runge

La vivo de la juda paroko en Berlino

Ni rememoru pri la „Kristalnokto". Per tiu ĉi krima antisemita pogromo la germanaj faŝistoj komencis historie senprecedentan persekutadon de judoj. Ses milionojn, du trionojn de la juda popolo oni murdis laŭ sistema plano. Nuntempe la nombro de la judkredaj civitanoj, vivantaj en nia ĉefurbo, ne estas granda. Tamen la historio de Berlino, tiel legeblas ankaŭ en la tezoj por la 750-a jubileo de la urbo, sen la kontribuoj de judaj kunloĝintoj al arto kaj scienco, al komerco kaj administrado, al politiko kaj ekonomio ne estas imagebla. Komence de la 30-aj jaroj ĉirkaŭ 170 000 judoj vivis en la urbo. Nur malmultaj transvivis la faŝistan barbarecon. La jaro 1945 estas cezuro por judaj vivhistorioj: Tiuj, kiuj naskiĝis antaŭe, konas la Flavan Stelon, fortransportadon, koncentrejon aŭ fuĝon kaj elmigradon aŭ kontraŭleĝecon, se la naskiĝloko estis ne malproksime de Germanio kaj de tiuj partoj de Eŭropo, kiujn konkeris la hitleraj armeoj. Kiu naskiĝis post 1945, tiu konas la sortojn de gepatroj kaj geavoj, scias pri la turmentoplena mortado de parencoj, devas tute individue identigi sin kun la historio.

Pri tio certe pensas d-ro Peter Kirchner, prezidanto de la Juda Paroĥo Berlino, parolante pri nedisigebla konekso inter antifaŝismo kaj judeco en GDR. La elektita estraro de la paroĥo zorgas pri internjudaj aferoj, defendas la interesojn de la membroj, flegas kontaktojn, konservas judajn tradiciojn, penas kunigi sub unu tegmento ĉiujn religiajn kaj kulturajn skolojn, de „ortodoksismo" ĝis „liberalismo". La nuntempa berlina paroĥo estas unu el ok, kiuj estas unuigitaj en la Ligo de Judaj Paroĥoj en GDR. Ĝi nombras preskaŭ 200 membrojn. Okaze de la judaj festotagoj la Ligo kvarfoje ĉiujare eldonas informilon, kiu raportas pri judaj problemoj kaj pri la vivo de la paroĥoj kaj peras sciindajojn pri la historio de la judoj. Oni ankaŭ povas legi pri iamaj berlinanoj, saksoj kaj meklenburganoj, pri judoj, kiuj post la hitlera faŝismo restis en tiuj landoj, kiuj savis iliajn vivojn.

Multo el tio, kio iam estis juda ĉiutago, kio estis normala kaj konata en la kunvivado de judoj kaj nejudoj, preskaŭ forgesiĝis sekve de la faŝista barbareco. Estas malmultaj, kiuj hodiaŭ ankoraŭ parolas pri la juda jaro, kiuj ankoraŭ konas judajn morojn kaj kutimojn kaj lasignifon de la vorto „koŝera". Dufoje monate venas la „buĉisto" el Budapeŝto por buĉi laŭrite, por fari koŝeran viandon. Kiu konas la paroĥan bibliotekon, kiu estas pli ol nur libropruntejo? Kelkaj judoj ĉi tie ligis unuajn novajn kontaktojn al tiu paroĥo, kiun la gepatroj kaj geavoj antaŭ jardekoj devis forlasi.

Tamen multaj konas la judajn tombejojn en Berlino kaj kelkaj la „Pacotemplon" en Ryke-strato, en kiu ĉiujare okazas sinagoga koncerto. Okaze de la 40-a datreveno de la „Kristalnokto" en 1978 ĝi estis rekonstruita per ŝtataj rimedoj.

„Kreskas la nombro de tiuj, kiuj deziras ekscii pli multe pri historio kaj nuntempo de la judeco", diras d-ro Peter Kirchner. „Ni ĝojas, ke la infanoj de transvivintoj, la posteuloj de judaj elmigrintoj kaj ties infanoj venas al ni. Tion ni konsideras malpli konfeso al la religio ol pli ĝuste serĉo de radikoj ofte malfacile troveblaj post la faŝismo." Kulturaj aranĝoj estas ebleco partopreni malgrandan parton de la vivo de la paroĥo. La pensoj de d-ro Kirchner direktiĝas ankaŭ en la estonton. „Ni devas krei infangrupon por teni vivantaj niajn tradiciojn." Al la futuro same apartenas la de Ministra Konsilantaro de GDR decidita rekonstruado de la „Nova Sinagogo" en la Oranienburga Strato, malsanktigita en 1938 kaj brulkonsumiĝinta post bombardado en 1943. Tiu ĉi konstruaĵo fariĝos Juda Muzeo, en ĝi la paroĥo disponos pri ĉambroj por religiaj kaj kulturaj aranĝoj. „Jam nun", raportas d-ro Kirchner, „ni ricevas de la loĝantaro donacojn por la muzeo". Kaj li montras ŝrankon, disponigitan de la muzeo pri la fondintotempo (tempo de ŝajna prospero en Germanio 1871–1873) en Mahlsdorf, kiu rilatas al la deportado de berlina juda familio.

„Ni estas transvivintoj", opinias d-ro Kirchner, „niaj infanoj estas infanoj de transvivintoj. Eble el tio rezultas nia forto kaj nia engaĝiĝo, nia atento kaj nia strikta volo, konservi judan vivon en Berlino."

El „DDR-Revue", n-ro 11/86.
Trad.: Dieter Dungert

Adass-Jisroel-tombejo en Berlin-Weißensee, finrekonstruita 1986 Foto: Zentralbild



Manfred Arnold

La influo de la hugenotoj je la evoluo de Berlin

En la jaro 1987 Berlin, la ĉefurbo de GDR, solenas la 750-an datrevenon de sia fondiĝo. Ke Berlin povis evolui al unu inter la plej eminentaj urboj en Eŭropo ĝi dankas – tio certe aŭdiĝas kurioza – ne malgrave al la francoj.

Ankoraŭ en la jaro 1648 – pli ol 400 jaroj post sia fondiĝo kaj je la fino de la 30-jara milito (1618–1648), kiu furiozis precipe en Germanio – Berlin nur estis urbeto kun ĉirkaŭ 6 000 loĝantoj, urbo, kiu preskaŭ falis al forgeso. Ĝi apartenis al tiel nomata Mark Brandenburg („Mark" signifas limlando, kaj Brandenburg estis ties ĉefurbo), malgranda regiono je la limo al orienta Eŭropo. Pli malfrue Mark Brandenburg fariĝis la kerno de Prusio. La tiama regento, Friedrich Wilhelm von Hohenzollern (esp. Fridriĥ Vilhelm de Hohencolern), estis tiel nomata balota princo, t.e. princo, kiu havis la rajton partopreni la balotadon de la germana imperiestro.

La intensaj disputoj, la batalo en Eŭropo inter la anaro de la katolika eklezio, ĝis tiam reganta, kaj la anaro de la protestanta, reformita eklezio – elvokitaj de Luther, Hus kaj Kalvin kaj kaŭze de la 30-jara milito – ekkaptis multajn landojn en Eŭropo.

En Francio, tiam unu inter la plej gravaj potencoj en Europo, en la jaro 1598 oni estis dekretinta religian tolerecon. Tiun ĉi dekreton la katolika franca reĝo Louis la Dekkvara aboliciis en oktobro 1685. Laŭ tiu abolicio oni ne plu agnoskis evangeliajn edzecojn, rigardis ties infanojn kiel eksteredzecajn. Nekatolikoj ne plu havis la rajton fariĝi juristoj, medicinistoj, libropresistoj aŭ instruistoj, kaj komenciĝis sangaj persekutadoj. Tio sekvigis amasan fuĝon de la hugenotoj (francaj protestantoj) el Francio al Anglio, Nederlando kaj Svisio.

La hugenotoj, franclingve *huguenots*, estis anoj de la Kalvinismo. La vorto „hugenotoj" ĝis nun ne estas ĝisfunde klarigita. Oni supozas, ke ĝi devenis de la germana vorto „Eidgenossen" (t.e. jurkamaradoj), ĉar ekzistis fruaj francaj nomoj „eignots" resp. „aignots" (kaj la h en „huguenots" ja ne estas parolata).

La brandenburga princo estis ano de la reformita eklezio, kiel la plej granda parto de la germana nordo. En Berlin ekde 1672 ankaŭ ekzistis malgranda paroĥo de francaj protestantoj. Impresita de la raportoj de francaj fuĝintoj – jam en 1677 ili estis pli ol 700 en Berlin –, pro la insistoj de siaj konsilantoj, sed antaŭ ĉio por la revivigo de sia lando dezertigita dum la 30-jara milito, la princo Friedrich Wilhelm decidiĝis akcepti francajn elmigrantojn.

Tri semajnoj post la dekreto de la franca reĝo la princo ordonis en sia palaco en Potsdam la tiel nomatan „edikton de Potsdam", kiu permesis al la hugenotoj enmigri. Tio havis grandan gravecon por la plua evoluo de Prusio. Dum malmultaj semajnoj oni disdonis en Francio pli ol 500 ekzemplerojn de la edikto. Sekve de tio ĉirkaŭ 20 000 hugenotoj venis al Brandenburg, kiu iĝis la plej granda enmigrada regiono por hugenotoj en Eŭropo. Ili ekloĝis en 60 urboj kaj vilaĝoj, kaj ĉirkaŭ 6 000 venis al Berlin. La franca alfluo al Berlin estis tiom forta, ke post la jaro 1685 ĉiu kvara berlinano estis franco!

Oni precipe varbis por metiistoj kaj komercistoj, kaj la plimulto de la enmigrantoj estis tiaj.

Cetere: la elmigrado de ĉirkaŭ kvin procentoj de la tiama franca loĝantaro estis tiom konsekvencoplena, ke Voltaire parolis pri „unu el la plej grandaj malfeliĉoj de Francio", la franca verkisto André Gide skribis pri „donaco, kiun Francio faris al eksterlando" kaj la germana verkisto Theodor Fontane (mem ido de hugenotoj) skribis pri „beno por urbo kaj kamparo (de Prusio, M. A.)".

En Francio la industrio estis evoluigita pli alta ol en Prusio, kaj la francaj enmigrintoj kunportis pli progresitajn metodojn de produktado kaj teknikajn novaĵojn. Tio sekvigis ĝis tiam nekonatan prosperon de la industrio, komerco, agrikulturo, kulturo kaj scienco en Prusio kaj fortan plialtiĝon de la berlina nombro de loĝantoj (en 1800 ili jam estis 150 000). El Francio venis i.a. lano- kaj ŝtrumpteksistoj, tinkturistoj, tajloroj, ganto-, ĉapelo- kaj ĉapofaristoj, horloĝistoj, seruristoj, kupristoj, stangisistoj, tranĉilo- kaj tondiloforĝistoj, pafilfaristoj, presistoj, librobindistoj, buĉistoj, tanistoj, ŝuistoj, bakistoj kaj sukeraĵistoj, lignaĵistoj, kuprogravuristoj, perukfaristoj, butikistoj kaj gastejmastroj. Entute kun la hugenotoj venis 46 novaj profesioj al Berlin.

La hugenotoj fondis en Berlin unuajn manufakturojn kaj enkondukis policon, pavimitajn stratojn kaj foirojn. Por subteni tiun evoluon, la prusa ŝtato koncedis al la hugenotoj pruntaĵojn kaj impostprivilegiojn kaj ne postulis de ili aktivan militservon (almenaŭ dum la unua tempo!). Tio kompreneble stimulis la penadon de la francaj enmigrintoj kaj efikis pozitive sur ĉiuj sferoj de la socia vivo.

En la agrokulturo ili diskonigis la tabakon, la terpomojn kaj la tritikon, kaj ili disvastigis la kultivadon de florbrasiko, asparago, burĝonbrasiko, salato, spinaco kaj ŝampinjonoj.

Inter la enmigrintoj el Francio krome estis multaj artistoj kaj sciencistoj, kiujn oni parte okupis ĉe la prusa kortego, ekzemple pentroartistoj, oraĵistoj, skulptaĵistoj, arkitektoj, botanikistoj, ĝardenarkitektoj, matematikistoj kaj aliaj scienculoj. La registro de iliaj nomoj estas tre longa.

La influo de la hugenotoj ankaŭ lingvohistorie estas tre interesa. Tia integrado de fremdlandaj homoj neeviteble kreis lingvajn problemojn. Iom

Berlin: Placo de la Akademio



post iom la novaj francaj ŝtatanoj de Prusio ja lernis la germanan lingvon, sed kun ili eniĝis torento de francaj vortoj en la germanan. Tio koncernas precipe vortojn de la modo, vestoj, manĝaĵoj, tekniko kaj metio.
La franca lingvo eĉ fariĝis por tre longa tempo la kutima lingvo de la prusaj reĝoj kaj de la tuta kortego. La troŝarĝo pere de la franclingvaj influoj estis tiom forta, ke iu tiutempe skribis:

Germane malaperi volas,
alia lingvo enŝteliĝas,
kaj kiu france ne parolas,
li certe naivulo iĝas.

Ĉirkaŭ dudek procentoj de la fremdvortoj, kiuj iam ajn enfluis en la germanan lingvon, venis el aŭ trans la franca. Tiun grandan porcion oni povas certaparte atribui al la hugenotoj.
Memkompreneble la influo de la franca lingvo estis precipe intensa je la berlinanoj. Ankoraŭ hodiaŭ ekzistas francdevenaj vortoj nur en la vortaro de la berlina ĵargono, parte en la origina formo, parte kiel pruntovortoj.
Estas sufiĉe malfacile, klarigi tiajn pruntovortojn en Esperanto, ĉar tiuj ofte inkluzivas vortludaĵojn. Ekzemple la berlinanoj nomas kafon el cerealoj aŭ cikorio „Muckefuck" (esp. mukefuk); tiu vorto devenas de la franca „mokka faux" (esp. mokafo, t.e. falsa mokao). Aliaj ekzemploj: el la malfacile prononcebla franca vorto „quincailleries" (esp. kenkeleris, t.e. bagateloj aŭ malgravaĵoj) la berlinanoj formis „Kinkerlitzchen" (esp. kinkerliĉhen, t.e. la sama senco, kunmetita el la franca quincaille kaj la germanaj diminutivoj -itz kaj chen); la franca esprimo „tout chic" (esp. tutŝik, t.e. tute eleganta) iĝis en Berlin „todschick" (esp. todŝik, tiu kunmetitaĵo enhavas la germanan vorton „tod" = „morto", kiu proksimume kaj ŝerce signifas „non plus ultra" kiel plej alta komparacio; la franca „Adieu!" (esp. adje!, t.e. adiaŭ! origine Al dio!) iĝis berline „aĉej, ĉej resp. ĉis", kiu sone similas al Esperanta „Ĝis!" kaj signifas la sama. Tio nur estis kelkaj ekzemploj el longa vico de tiaj pruntovortoj. Multaj berlinanoj uzas ankaŭ nuntempe tiajn vortojn, sen tio, ke ili scias la fremdan devenon.
Tiamaniere la hugenotoj postlasis ĉe ni, precipe en Berlin, sur multaj kampoj siajn spurojn, parte ankoraŭ hodiaŭ rimarkeblajn resp. aŭdeblajn.
En la ĉefurbo de GDR oni aranĝis por ilia memoro hugenot-muzeon, en kiu ilia pozicio en la historio de Berlin tre imprese estas honorata (kaj kiun ankaŭ mi kiel hugenotido – flanke de mia patro – volonte vizitas).

Fritz Wollenberg

La Berlinaj esperantistoj kaj la 750jariĝo de Berlin

La ĉefurbo de GDR en 1987 atendas gastojn el la tuta mondo. Certe la festo de la 750a jariĝo de Berlin ankaŭ allogas esperantistojn al la hodiaŭa „urbo de la paco". Ja akordiĝas la celo de la Berlin jubileo kun la progresemaj celoj en la internacia Esperanto-movado. „De tiu ĉi loko estu ĉiuj alvokataj, kiuj sentas sin proksime al Berlin, kune kun ni soleni la 750jariĝon de Berlin. Servu la memoriginda reveno de ĝia unua dokumenta mencio, kiun ni en 1987 festos en rondo de amikoj el la tuta mondo al la paco kaj al la interkompreniĝo de la popoloj", kiel oni legas en la tezoj pri la jubileo.
La berlinaj esperantistoj kontribuos laŭ siaj modestaj eblecoj al tiu jubileo sentante sin en la tradicio de tiuj esperantistoj, kiuj staris en la bataloj de nia jarcento je la flanko de la progreso kaj kunhelpis, ke tiu urbo, de kiu eliris sub imperiisma regado du mondmilitoj, estiĝis „urbo de la paco".

1. Unuaj berlinaj esperantistoj – aktivaj pacifistoj

La komencoj de Esperanto en Berlin estis ligataj kun la agado de konataj sciencistoj, kiuj ankaŭ agadis kiel pacifistoj enkadre de la burĝa pacmovado. Ili agadis kaj en la Esperanto-movado kaj en la pacmovado en la senco de la vortoj de Berta von Suttner: „Esperanto kaj pacifismo estas gefratoj".
Kiam la sviso Jean Borel fine de 1903 fondis la berlinan grupon Berlin estis la ĉefurbo de la Germana Imperiestra Regno. Ĉi tie la sociaj kontraŭdiroj evidentiĝis tre akraj. Berlin estis la centro de la germana financkapitalo kaj la elirpunkto de la imperiisma politiko de la subpremo en la lando kaj de la perforta ekspansio eksterlanden, la elirpunkto de la imperiisma militpreparo. Berlin ankaŭ estis la centro de la germanaj maldekstruloj ĉirkaŭ Karl Liebknecht, Rosa Luxemburg, Franz Mehring kaj Wilhelm Pieck kiuj gvidis heroan batalon kontraŭ imperiismo kaj militarismo.
La berlinaj laboristoj en sia batalo kontraŭ la reakcia triklasa balotrajto, kontraŭ altiĝantaj prezoj kaj mizero, kontraŭ armada politiko kaj imperiisma militpreparo kunagadis kun burĝaj-pacifismaj fortoj, ekzemple kun la „Germana pacsocieto", fondita en 1892 en Berlin laŭ iniciativo de Bertha von Suttner, de la fama aŭstria publicisto kaj esperantisto Alfred Hermann Fried. La fondintoj de la unua Berlina Esperanto-grupo estis viglaj partoprenantoj en la pacifista movado. Adolf Schmidt, esperantisto depost 1898, universitata profesoro en Berlin kaj direktoro de astronomia observatorio en Potsdam ĝis 1928 funkciis kiel grupa prezidanto. Tiu eminenta sciencisto estis prezidanto de la Internacia Scienca Asocio en 1907–08 kaj de la Germana Akademia Asocio 1905–1930. Alia kunfondinto, la gimnazia direktoro Wilhelm Wetekamp sekve de artikolo de Fried en pacifista gazeto aktiviĝis ankaŭ por Esperanto. Oni ne povas skribi pri tiu tempo sen mencio de Friedrich Wilhelm Förster, profesoro por etiko kaj sociaj sciencoj, kiu en 1914 kuraĝe defendis sian pacpozicion kaj kune kun Albert Einstein kaj du aliaj sciencistoj subskribis la alvokon „Al la Eŭropanoj". Tiu alvoko estis reago al la publikigo de la ŝovinisma „Alvoko al la kultura mondo", kiu defendis la militpolitikon kaj kiun subskribis multaj germanaj elstaruloj de scienco kaj kulturo.
Nehazarde precipe neproletaraj demokratoj fortoj fondis la Esperanto-movadon en Berlin. Zamenhof mem influis la fondon de tiu grupo. Pri tio Jean Borel okaze de la 25jara jubileo de GEA en 1931 memorigis. Li raportis pri interparolado kun d-ro Zamenhof je Pentekosto 1903 en Varsovio jenon: „Li (Zamenhof) konsilis krei en la ĉefurbo unue malgrandan centron, el kiu povus eliri pli vasta propagando en la tutan landon kaj per tiu grupeto de la tie ekzistantaj malmultaj esperantistoj aŭ pli vere amikoj de Esperanto sufiĉos, kondiĉe, ke oni laboru energie kaj antaŭ ĉio havu la necesajn propagandilojn . . ."
Estas konate, ke Zamenhof mem ligis la ideon pri lingvo internacia kun la ideo de paco kaj interkompreniĝo de la popoloj, kun la ideo de samrajteco de la popoloj kaj nacietoj kaj diversaj demokrataj postuloj.
Li ankaŭ turnis sin kontraŭ la privilegioj de unu klaso rilate al kulturo kaj lingvo kaj postulis ekzemple jam en 1900 en la artikolo „Esenco kaj estonteco", ke lingvo internacia ne nur estu „por la pli altaj klasoj de la societo".
Pro tio jam en aliaj landoj fortoj en la burĝa pacmovado akceptis Esperanton. En Ruslando Leo Tolstoi entuziasmiĝis por ĝi. En Parizo Gaston Moch en la sama jaro, en kiu li organizis la IX. Mondpackongreson, en 1900, fondis la Parizan Esperanto-grupon. La jam menciita Alfred Hermann Fried, kiu en 1911 ricevis la Nobelpacpremion, verkis en 1903 germanlingvan lernolibron de Esperanto. De la berlina grupo eliris

la iniciatoj por la disvastigo de la Esperanto-movado en Germanio. Borel ne nur iniciatis la grupon en Berlin, sed ankaŭ la firmaon Möller & Borel, kiu pretigis la plej urĝajn materialojn, propagandilojn, klarigojn, foliojn, libretojn por memlernado ktp., kaj la informilon „Esperantistische Mitteilungen" (Esperantistaj Informoj), pli malfrue ŝanĝita al „Der Deutsche Esperantist". De la berlina grupo ankaŭ eliris la impulso por fondi la Germanan Esperanto Asocion, la burĝan organizitan Esperanto-movadon, kies laŭjura sidejo estis en Berlin.

Zamenhof mem kelkfoje vizitis Berlinon, unuafoje survoje al la Unua Universala Kongreso en 1905. Tiam li kune kun sia edzino Klara venis la 24an de julio kaj vizitis Borel. Jam unu jaron poste antaŭ la kongreso en Genf li vizitis esperantistojn en Berlin survoje al Bad Reinerz. La plej grava vizito okazis post la 4a UK en Dresdeno. Ĝi okazis en ŝajne sukcesplena tempo. La internacia Esperanto-movado evoluis kontentige. La unuaj kongresoj pruvis la taŭgecon de la lingvo por la interkomunikado de diversnacianoj. Depost 1905 ekzistis lingvo-kontrola institucio – la Lingva Komitato. Ĵus en aprilo de 1908 estis fondita UEA, kaj en Dresden ĝi aranĝis sian unuan kunsidon. La Esperanto-movado stabiliĝis malgraŭ la ĵus travivita Ido-skismo. Aperis revuoj kaj libroj en Esperanto. La lingvo montriĝis taŭga por literatura kreado. En dresdena operejo estis prezentita de berlinaj aktoroj la tragedio de Goethe „Ifigenio en Taŭrido", tradukita de Zamenhof. Zamenhof kiel kelkcent aliaj esperantistoj venis de Dresden al Berlin. Ĉi tie en la civitana salonego de la nova urbdomo li partoprenis festenan kunsidon. Li ne povis antaŭvidi, ke 6 jarojn pli poste de tiu urbo eliros la milito, kiun li rigardis evitebla. En tiu jaro 1914 li lastfoje vidis Berlinon ankoraŭ en paco. Kiam li atingis sur sia vojaĝo al la Xa UK en Parizo la germanan urbon Köln eksplodis la unua mondmilito kaj Zamenhof devis forlasi tiun landon, kiun li en 1908 laŭdis kiel „lando de la filozofoj kaj poetoj, kiu estis iam la centro de la humanistoj". Dum Zamenhof per sia alvoko „Post la granda milito" en 1915 defendis sian kondamnon de la milito, la burĝa Esperanto-movado en Germanio ne unuanime kondamnis la militon. Ankaŭ esperantistoj el Berlin dissendis dum la milito militraportojn en la mondon, kiuj prezentis la militon laŭ vidpunkto de germanaj imperiistoj. Montriĝas diversaj, ja kontraŭaj tradiciaj linioj jam en tiu periodo.

2. Berlin – centro de la laborista Esperanto-movado

Kiel en aliaj grandaj urboj post la 4a Universala Kongreso de Esperanto en Dresden estiĝis ankaŭ en Berlin grupo de laboristaj esperantistoj. Ĝi estis unu de tiuj 45 laboristaj Esperanto-grupoj, kiuj partoprenis la fondon de la Germana Laborista Esperanto Asocio (GLEA).

Dum la dudekaj jaroj en GLEA, kies centra estraro havis sian sidejon dum kelkaj jaroj en Berlin, plifortiĝis la influo de klaskonsciaj laboristaj esperantistoj. La konfliktoj inter la dekstraj socialdemokratoj kaj la klaskonsciaj laboristaj esperantistoj fine de la dudekaj jaroj akriĝis. En 1929 Adolf Sproek kaŭzis skismon de la Berlina LEA-grupo kaj fondis la „Liberan Esperantistan Unuiĝon de Berlin". Unu jaro poste estis fondita la „Socialisma Esperanto Asocio", socialdemokratia organizaĵo. GLEA laŭ decido de la 8a Asocia Kongreso en Essen en 1930 aliĝis al la Interessocieto por Laborista Kulturo (IFA) kaj enviciĝis en la batalo de la klaskonscia revolucia germana proletaro. Ĝi subtenis la antifaŝisman unuecfrontan politikon de Thälmann. En 1931 en Berlin agadis 7 grupoj de GLEA kun 180 membroj. La gravan politikan laboron de LEA-anoj en tiuj jaroj ilustris la longjara estro de la urbdistrikta konsilantaro de Berlin-Friedrichshain, kamarado Hans Höding, en intervjuo. Li rememoris, ke li kiel junulo vizitis kunvenojn de laboristaj esperantistoj ĉe Ostbahnhof (Orienta Stacidomo) kaj komencis lerni Esperanton. Sub la influo de klaskonsciaj LEA-anoj li trovis la vojon al la Komunista Partio de Germanio. Ankaŭ berlinaj esperantistoj donis ekzemplon de proletara internaciismo.

Laŭ iniciato de la moskva SEU-grupo de la 7a de novembro 1930 ĝis la 7a de novembro 1931 okazis konkurso kun la berlinaj esperantistoj. La moskvaj esperantistoj inter alie sindevigis

- ligi laborkolektivojn el 50 fabrikoj de Moskvo kun kolektivoj de similaj fabrikoj en Berlin kaj aliaj germanaj urboj,
- sendi materialojn pri la aktuala socialisma konstruado en USSR al „Rote Fahne" kaj al fabrikgazetoj de Berlin.

La berlinaj esperantistoj inter alie sindevigis

- evolugi la internacian laboristan korespondadon inter fabrikoj de Berlin kaj de Sovetunio
- aktive partopreni ĉiujn aranĝojn de la revolucia proletaro en Berlin (demonstracioj, amasmanifestacioj, festoj, ekspozicioj ktp.).

Sub la gvido de Erwin Schleusener, Ludwig Schödl kaj Alfred Schwarz la berlinaj laboristaj esperantistoj faris bonrezultan laboron. Ili plenumis sian programon. Ekzemple ili evoluigis la ligon inter la Berlina AEG-elektro-uzino kaj uzino en Moskvo. En 1931 Erwin Schleusener, Adolf Schwarz, Schlecht kaj Erich Lilge veturis al Moskvo, por transdoni berlinan flagon.

Post la reveno ili inter alie raportis pri sia 2monata restado en la broŝuro „Kion ni travivis en Sovetrusio" eldonita de LEA. La vojaĝo de la berlina delegacio estis financita per vendado de en Sovetunio presitaj Esperanto-lernolibroj. La berlinaj esperantistoj kunportis el Moskvo flagon el ruĝa pluŝveluro kun la sovetia ŝtatemblemo kaj la devizo (en Esperanto) „Proletoj de ĉiuj landoj unuiĝu!" Tiu ĉi flago incitis atenton dum demonstracioj en Berlin, ĉar ĝi tiutempe estis la sepa flago el Sovetio tiuspeca, kiu entute ekzistis inter la berlinaj laboristaj organizoj.

Karakterize por la reago de la ŝtato estu aldonita la fakto, ke en la jaro 1930/31 en Berlin 200 policistoj senpage lernis Esperanton.

Kulminon la revolucia Esperanto-movado travivis en aŭgusto 1932. Jam depost 1930 en Berlin aperis la unua numero de la „Internaciisto", organo de la klasbatala esperantistaro kaj de ties opozicio en SAT. En unua deklaro estis karakterizita la ideologio de la SAT-direkcio kiel konfuza kaj neproletara, supertakso de la graveco de Esperanto, ignoro de la politika klasbatalo, ignoro de la nacia demando, falsigo de la nocio de proletara internaciismo, subteno de la imperiismo kaj de la koloniisma subpremo. En Berlin la opozicio instalis ligan buroon kaj formulis sian programon. De la 21a de aŭgusto ĝis la 25a de aŭgusto 1932 en Berlin 348 laboristaj esperantistoj el 11 landoj kunvenis por fondi la „Internacion de Proleta Esperantistaro". La kongreson malfermis Willi Vildebrand el Berlin (KPG), la tiama prezidanto de GLEA. Al IPE aliĝis 72 % de ĉiuj organizitaj proletaraj esperantistoj.

Kun la potenctranspreno en Germanio la faŝismo detruis la IPE-centron en Berlin. „Arbeiter-Esperantist" kaj „Internaciisto" estis malpermesitaj kaj la buroo de LEA en Berlin, Dircksenstr. 42, parte estis detruita.

Laboristaj esperantistoj envicigis sin en kontraŭleĝan antifaŝistan batalon.

„Arbeiter-Esperantist", kies lasta numero ankoraŭ aperis en februaro 1933, estis kelktempe eldonita kiel multobligita bulteno (organo de la laboristaj esperantistoj de Berlin).

Pri la kontraŭleĝa laboro en Berlin ekzemple raportis ĉifrita materialo, kamuflita kiel reklamo por Nivea-kremo. En ĝi tekstas inter alie: „Nun en la tuta regno ekzistas niaj filioj. Sole en Berlin ekzistas pli ol 15. Sed tiuj 15 filioj ne estas niaj solaj voĉoj ĉi tie, kontraŭe la tuta Berlin parolas pri niaj produktoj". Vere temas pri la 15 grupoj de LEA en Berlin kaj pri ĝiaj produktoj la materialoj de la Proleta Esperanto Korespondo.

Somere de 1933 estiĝis en Berlin laŭ iniciativo de iamaj LEA-funkciuloj kontraŭleĝa rezistgrupo, al kies estraro ankaŭ apartenis Erwin Schleusener kaj Johannes Grützmacher. Tiu grupo inter alie organizis kontraŭleĝajn renkontiĝojn kaj eldonis flugfoliojn. Ĝi ekzistis ĝis 1944 kun subgrupoj en 10 urbdistriktoj.

3. Berlinaj esperantistoj hodiaŭ

Post la venko super la faŝismo kaj liberigo de Berlin fare de sovetia armeo ankaŭ berlinaj esperantistoj partoprenis la antifaŝistan-demokratan rekonstruon en nia urbo. La aktiva laborista esperantisto Ludwig Schödl kunlaboris kun sovetia armeo por prizorgi infanojn de viktimoj de la faŝismo. Aktive li agadis en kadro de la movado de packonsilantaroj ankaŭ per Esperanto. Li kiel aliaj iamaj funkciuloj de GLEA, ekzemple Willi Vildebrand, Rudi Graetz, Otto Bäßler, Erwin Schleusener kaj Rudolf Hahlbohm en Berlin la 31an de marto 1965 fondis la Centran Laborrondon Esperanto, kiu en 1981 transformiĝis al la Centra Estraro de la Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA). Ĝia buroo ĉiam estis en Berlin. La berlina grupo en 1965 komencis labori en la subdistrikto Prenzlauer Berg sub la gvido de Karl Maier. Laŭ la ĉeftaskoj de Kulturligo la berlinaj esperantistoj kontribuis per siaj specifaj rimedoj al la socialisma konstruo en la ĉefurbo de GDR, al la disvastigo de realisma bildo pri kulturo, scienco kaj politiko en nia lando kaj al la internacia pacbatalo.
Sub la gvido de Rudolf Hahlbohm, Ernst Schonert kaj Hans Wegener, sinsekvaj prezidantoj de la Distrikta Laborrondo respektive Distrikta Estraro de GDREA la esperantista vivo en Berlin vigliĝis.
Intertempe famiĝis la ĉiujara Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj ĉe Berlin en Internacia Kampadejo Krossinsee.
Amikaj rilatoj kun esperantistoj en aliaj landoj realiĝis ekzemple per amika vojaĝo al Leningrad komence de la 70aj jaroj kaj reciprokaj amikaj rilatoj de la lichtenberga grupo kun la esperantistoj el Pardubice/ČSSR.
Esperantistoj el multaj landoj intertempe vizitis la berlinajn esperantistojn, inter ili la gvidantoj de la Esperanto-asocioj de socialismaj landoj, inter ili ekzemple prof. Isaev, el Moskvo. Funkciuloj de MEM kaj de UEA, ne mankis inter ili ekzemple Nikola Aleksiev kaj Humphrey Tonkin. Ni renkontiĝis kun vojaĝgrupoj el diversaj landoj. Berlinanoj donis interesajn impulsojn por la Esperanto-movado en nia lando. Mi nur mencias la grandegan tradukan laboron de d-ro Karl Schulze, kiu inter alie tradukis la eminentan romanon „Nuda inter lupoj" de Bruno Apitz eldonita de GDR-eldonejo, kaj mi mencias d-ron sc. Detlev Blanke, kiu instigis lingvosciencajn esplorojn rilate al la Esperantologio ne nur nacikadre.
La eblecoj de la lernado de Esperanto en Berlin depost meze de la 70aj jaroj plikvalitiĝis per la kursoj en la popolaltlernejo, unue gviditaj de Hella Sauerbrey, poste de Monika Ludewig.
En la lastaj jaroj ankaŭ en Berlin plivigliĝis la junulara laboro. La junuloj havas klubejon en juna nova urbdistrikto de Berlin, en Marzahn. Por la jubilea jaro la berlinaj gejunuloj preparis interesan ekspozicion pri la rilatoj de eksterlandanoj al nia urbo. Ili jam kolektis esprimriĉajn kontribuojn, kiuj montras, ke multaj esperantistoj el la tuta mondo sentas sin proksime al nia pacama ĉefurbo de pacama lando. Tiu ekspozicio estas unu kontribuo de ni berlinaj esperantistoj, kiu videbligas, ke ni digne daŭrigas la progresemajn tradiciojn de la Esperanto-movado en nia urbo.

El la Gvidprincipoj de la Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR

„La lernado, aplikado kaj kulturado de Esperanto kiel parto de fremdlingva klereco prezentas multflankajn eblecojn por la formado de sencoplena libertempo, donas al la unuopulo spiritan gajnon kaj servas al la socia bezono de la konservo de paco kaj la firmigo de popola amikeco."

Alf Scorell

La hundo Teofilo

Antaŭ kelkaj tagoj mi decidis, viziti foje mian malnovan amikon Johano, ĉar mi ĵus troviĝis proksime de lia loĝejo. Post mia sonorigado sonis muĝanta bojado, kvankam miaopinie Johano ne posedis hundon. Sed Johano havas iom strangan humoron kaj eble li mem bojis, por ĝojigi siajn vizitantojn aŭ por timigi monpostulantajn kreditorojn. Se vi, gesinjoroj, konus Johanon, tiam vi scius, ke oni povas kredi lin kapabla por tio.
Sed mi ege eraris. Tio vere estis hundo. Pli precize grandega, griza, lupeca besto, kiu senceremonie metis siajn piedegojn sur mian ŝultron kaj lekis mian vizaĝon. Mi tremis kvazaŭ ruĝĉapulineto* kaj ne kuraĝis movi min. Eble la hundo havus kompaton.
„Ĉu ĝi ne estas dolĉa", jubilis Johano, „tiom temperamentoplena kaj ŝtorma. Ĝi ankoraŭ estas juna. Kia ĝi nur estos plenkreska." Pri tiu ebleco mi pensis horore.
Cetere la hundo ankoraŭ ne ŝajnis havi malbonajn intencojn. Ĝi forprenis la piedegojn kaj puŝis min per sia muzelo tiel ke mi ŝanceliĝis kontraŭ la vestgardejo, kiu per tio renversiĝis. Tio treege ŝajnis plezurigi la hundon.
Post kiam ĉio ree estis ordigita, Johano ĝuste prezentis al mi sian novan familio-pligrandiĝon: „Ĝia nomo estas Teofilo", mi estas instruita. „Donu vian piedon!" Mi ne sciis, ĉu tiu ordono estis direktita al mi aŭ al la hundo. Ĉiukaze mi rapidis obei la ordonon, por ne okazigi la indignon de Teofilo.
Ni sidiĝis en la loĝoĉambro, same Teofilo, ne por sekundoj ĉesanta rigardi min. Mi ankoraŭ ĉiam ne sentis min tute hejmece, kvankam Johano asertis, ke Teofilo estus la plej kara, bona kaj pacema hundeto, kiu iam ajn estis en la mondo. Mi tute ne estis konvinkita pri la vero de tiuj vortoj, sed ne kuraĝis kontraŭdiron, kiu eble estus ofendinta la ‚hundeton'.
Subite Johano ekkriis, pala pro teruro, konsterniĝis kaj rigardis la horloĝon. „Mi preskaŭ estus forgesinta mian rendevuon", li ĝemis. Mi ĝentile petis informon, kun kiu li estis fiksinta rendevuon. „Kun virino", li deklaris signifoplene, „kun t i u virino!" Tiun esprimon mi ne prijuĝis kvazaŭ eksterordinaran, ĉar Johano ĉiusemajne meznombre duĝis trifoje trafas la „virinon por sia vivo".
„Tre bone", li diris subite, „ke vi venis. Vi povus fari komplezon al mi". Ĉe la vorto „komplezo" mi rigardis skeptike. Sed li jam daŭrigis, ekskludante ĉiun kontraŭdiron. „Se mi rapidas, ĝustatempe mi alvenos al rendevuo. Bonvolu esti tiel kara kaj resti ĉi-tie. Iomete atentu pri la kara hundeto kaj pli poste iom promenu kun ĝi." Mi paliĝis.
„Ĉi-tie estas la konjako", Johano persvadante daŭrigis, metante botelon sur la tablon, „Faru al mi la komplezon kaj ne detruu la feliĉon de mia vivo!" Kiu ĉe tio povus kontraŭstari? Mi diris per tremanta voĉo „jes", kvankam mi konsidere al la perspektivo, resti sola en la loĝejo kun Teofilo, sentis timon. Kaj Johano, jubilante, forkuris tra la pordo.
Profunde spirante, mi intencis enverŝi konjakon kaj etendis la mano al la botelo. Averta grumblado retirigis min. Teofilo evidente malaprobis mian entreprenon, estanta aŭ abstinulo aŭ responsulo pri la konjaknivelo de la botelo. Nun komenciĝis vera martiriĝo por mi. La kara hundeto ne permesis al mi la plej malgrandan movon. Tuj kiam mi montris iun intencon, ekstari el la fo-

Kurt Tucholsky

Geedzoj rakontas spritaĵon

„Sinjoro Panter, hieraŭ ni aŭdis tiom ĉarman spritaĵon, tiun ni devas al vi... do tiun mi devas rakonti al vi. Mia edzo jam konis ĝin... sed ĝi estas tiom ĉarma. Do atentu. Iu viro – Walter, ne disŝutu tabakon sur la tapiŝon, jen! vi ja disŝutas la tutan tabakon sur la tapiŝon – do iu viro, ne, iu migranto perdas la vojon en montaro. Do li iras en montaro kaj perdas la vojon, en la Alpoj. Kion? En la Dolomitoj, do ne en la Alpoj, tio ja estas tute egala. Do li iras tie tra la nokto kaj subite vidas lumon kaj li ĝuste iras laŭ la lumo... do lasu min rakonti! Tio apartenas al la spritaĵo!... iras laŭ la lumo, kaj tie estas kabano, en kiu loĝas kamparanaj geedzoj. Kamparano kaj lia edzino. La kamparano estas maljuna kaj ŝi estas juna kaj beleta, jes, ŝi estas juna. Ili jam enlitiĝis. Ne, ili jam ne enlitiĝis..."

„Mia edzino ne kapablas rakonti spritaĵojn. Do lasu min! Vi poste rajtas diri, ĉu estis korekte. Do nun mi rakontos tion al vi. Do, viro migras tra la Dolomitoj kaj perdas la vojon. Jen li venas – vi tute konfuzas min, tiel ne estas la spritaĵo! La spritaĵo estas tute alia. – En la Dolomitoj, tiel estas tio! En la Dolomitoj loĝas maljuna kamparano kun sia juna edzino. Kaj ili nenion plu havas por manĝi. Ĝis la venonta foirtago ili nur havas konservan ladskatolon kun bovaĵo. Kaj tion ili konservas. Kaj jen venas... Kial? Tio estas tute korekta! Silentu!... jen venas nokte migranto, do iu frapas al la pordo, tie staras viro, kiu perdis la vojon kaj li petas loĝadon por unu nokto. Sed ili ja ne havas loĝejon, pli precize, ili nur havas liton, en kiu ili dormas duope. Kion? Trude, tio ja estas sensencaĵo... Tio povas esti tute agrabla!"

„Nu, mi ne povus tion. Ĉiam kun iu, kiu – baraktas dum la dormo... do mi tion ne povus!"

„Vi ja tute ne devos. Ne interrompu min konstante!"

„Vi ja diris, ke tio estus agrabla. Mi ne opinias tion agrabla." Mi ne opinias tion agrabla."

„Do..."

„Walter! La cindro! Ĉu vi do ne povas preni cindrujon?"

„Do... la migrulo nun staras tie en la kabano, li gutas pro pluvo, kaj li ja deziras dormi tie. Kaj la kamparano diras al li, ke li ja povas dormi en la lito, kun la edzino."

„Ne, tiel ne estis. Walter, vi rakontas tute erare! Inter ili, inter li kaj la virino – do la migranto meze!"

„Se vi volas, en la mezo. Tio ja estas tute egala."

„Tio nepre ne estas tute egala... la tuta spritaĵo ja baziĝas sur tio."

„La spritaĵo ja ne baziĝas sur tio, kie dormas la viro!"

„Kompreneble ĝi baziĝas sur tio! Kiel do sinjoro Panter povas kompreni la spritaĵon... do nun lasu min – mi rakontos! Do la viro dormas, komprenu, inter la maljuna kamparano kaj lia edzino. Kaj ekstere fulmotondras. Lasu min do!"

„Ŝi rakontas tute malvere. Unue tute ne fulmotondras, sed ili tute paceme ekdormas. Subite la kamparano vekiĝas kaj diras al sia edzino – Trude, bonvolu iri al la telefono, sonoras. – Ne, tion li kompreneble ne diris... La kamparano diras al sia edzino... Kiu telefonas? Kiu estas ĉe la telefono? Diru al li, ke li telefonu ankoraŭfoje poste – nun ni ne havas tempon! Jes. Ne. Jes. Surmetu! Surmetu do."

„Ĉu li jam rakontis ĝis la fino? Ĉu ne, ankoraŭ ne? Nu, do rakontu!"

„Jen diras la kamparano: Mi foje devas iri eksteren, pro la kaproj – mi supozas, ke ili disŝiris la ŝnuron, kaj morgaŭ ni ne havos laktón! Mi deziras vidi, ĉu la stalpordo estas bone fermita."

„Walter, pardonu, ke mi interrompas, sed Paul diris, ke li ne povas telefoni poste, nur vespere li telefonos."

„Bone, vespere. Do la kamparano – bonvulo preni ankoraŭfoje iom da kafo! – Do la kamparano eksterenira s, kaj apenaŭ li estas ekstere, jen puŝas la juna virino..."

„Tute malĝuste. Totale malĝuste. Do ne unuafoje! Li eksteren iras, sed ŝi puŝas nur triafoje – la kamparano nome trifoje eksteren iras – tion mi trovis tiom komike! Lasu min rakonti! Do la kamparano eksteren iras al la kapro, kaj la kapro estas tie; kaj li ree envenas."

„Malĝuste. Longe li restas ekstere. Intertempe la juna virino diras al la migranto..."

„Tute nenion ŝi diras. La kamparano envenas..."

„Unue li ne envenas!"

„Do... la kamparano eniras, kaj kiam li dormis tempeton, jen li subite rektiĝas kaj diras: Mi ankoraŭfoje devas vidi al la kapro – kaj ree iras eksteren."

„Vi ja tute forgesis rakonti, ke la migranto havas teruran malsaton!"

„Jes. La migrulo antaŭe ĉe la vespermanĝo diris, ke li havas teruran malsaton, kaj tiuj diris, ke iomete da fromaĝo ekzistas..."

„Kaj lakto!"

„Kaj lakto, kaj krome iom da bovaĵkonservo, sed tiun ili ne povus doni al li, ĉar ĝi devas sufiĉi ĝis la venonta foirtago. Kaj tiam ili enlitiĝis."

„Kaj kiam la kamparano estas ekstere, tiam ŝi puŝas lin, do la virino puŝas la migranton je la flanko kaj diras: Nu..."

„Nepre ne! Sed nepre ne! Walter, tio ja estas malvera! Ŝi do ne diras: Nu..."

„Kompreneble ŝi diras: Nu...! Kion alian ŝi dirus?"

„Ŝi diras: Nun estus tia ebleco..."

„Male ŝi diras: Nu... kaj puŝas la migranton je la kokso..."

„Vi vere ruinigas ĉiun spritaĵon, Walter!"

„Tio estas grandioza! Ĉu mi ruinigas ĉiun spritaĵon? Vi ruinigas ĉiun spritaĵon – mi do ne ruinigas ĉiun spritaĵon! Jen diras la virino..."

„Nun lasu min rakonti la spritaĵon! Vi ja fuŝas la efekton...!"

„Ne kolerigu min, Trude! Kiam mi komencas spritaĵon, tiam mi ankaŭ volas rakonti ĝin ĝis la fino..."

„Vi ja ne komencis ĝin... Mi ĝin komencis!"

„Tio estas tute egala – ĉiukaze mi intencas finrakonti la spritaĵon, ĉar vi ne kapablas rakonti spritaĵojn, almenaŭ ne korekte!"

„Kaj mi rakontas spritaĵojn miamaniere kaj ne viamaniere, kaj kiam ne plaĉas al vi, tiam vi ne devas aŭskulti...!"

„Mi ja tute ne volas aŭskulti... Mi volas rakonti ĝin ĝis la fino – nome tiel, por ke sinjoro Panter havu plezuron

---

telo, ĝi grumblis kun vere diableca ĝojo. Evidente tiu bela ludo faris plezuron al ĝi, sed ne al mi. Feliĉe post horo – al mi doloris ĉiuj ostoj – la hundo enuis, kaj ĝi hejmece komencis manĝi la plej novan tapiŝon de Johano. Miaj singardaj kaj pedagogiaj avertoj ne helpis. La kara hundeto grumblis kaj kaptis laŭ mia brako. Tiam pli bone la tapiŝon! Mi pensis. Post kiam la unua angulo de l'tapiŝo estis diseriĝinta, la kara hundeto kaptis du terure koloriĝitajn figurojn el ligno, starintajn sur la skribotablo – Johano estis tre fiera pri ili –, kaj manĝis ilin kun evidenta plezuro kvazaŭ deserton. Ĉi-foje mi tute ne provis interveni, ĉar tiuj figuroj jam delonge malplaĉis al mi.

Post kiam Teofilo estis ĉesinta la abundan manĝon, ĝi sentis bezonon al movado. Tiucele ĝi aranĝis liberstilajn luktadojn kun mi – ĉiam, kiam mi intencis ĉesi, ĝi amikece vigligante mordis en mian suron. Post tri rondoj Teofilo estis supera venkinto!

Mi ne havis tempon por ripozo. Teofilo irigis min per trejnitaj nazpuŝoj en la koridoron kaj, bojante, saltis al sia ŝnuro. Kiam ni forlasis la loĝejon, ĝi ekkuregis kvazaŭ sprintulo. Mi ĉiam

(fino p. 38)

Roda Roda

La ĉambro en la Bogner-strateto

Tio, pri kiu mi nun rakontos, tute ne devenas de mi, sed de Franz Molnár. Li provos kontesti tion. Mi kontraŭdiros:

Kial Vi kontestas, sinjoro Molnár? Ĉu Vi ne plu memoras? Pri la aŭtuno de la jaro 1914? Vi ĵus alvenis al ni en la militgazetaran kvartiron! Ni ambaŭ kaj Via amiko Fakler veturis al Przemys (Pŝemis). Survoje en Sanok la ŝlimo blokis nin. Estis vespere, pluvegis kiel el verŝiloj. La duonon de la loko oni forbruligis, la reston troplenigis trupoj. Maljuna, laca kaj ekscitita superleŭtenanto en la stacia taĉmento grumblis: „Gesinjoroj, mi havas nur unu kvartiron por Vi, la kameron por mortintoj de la ĥolerhospitalo, ĝi estas hazarde libera. Ĉu Vi ne volas? Ĉu Vi timas la ĥoleron? Vi povas ricevi ĝin ĉie pli frue ol tie, la kamero por mortintoj estas almenaŭ desinfektita."

Ĉu vi ankoraŭ scias, sinjoro Molnár? Kiel ni vagadis tutan horon, centfoje oni malakceptis nin, ĝis kiam ni, tute malsekigitaj de pluvo, frosttremante gastis en la kamero por mortintoj. Du brankardoj kiel litoj. Desinfektitaj brankardoj. Unu kandelstumpo lumis. Eble oni eĉ konsekris ĝin . . .

Oni devis fari ion kontaŭ la hororo de la medio, intence drinki, intence paroli.

– Vi malplenigis vian soldatan botelon kaj ekkriis: „Bone, mi havas sufiĉe da fantazio por iluzii min, ni estus en la hotelo ‚Hungaria'".

Do, diablo, kie restis Fakler? Nia dika kamarado Fakler?

„Mi vetas", vi diris, „la ruzulo trovis kvartiron, belan kaj malmultekostan ĉambron kiel tiam en la Bogner-strateto."

Kaj kiam mi demandante ekaŭskultis:

„Roda, ĉu vi ne scias la aferon pri la ĉambro de Fakler? En la Bogner-strateto en Vieno? Estis konsiderinde stranga afero. Pri tio vi devos skribi."

„Kial tion ne faras Franz Molnár mem?"

„Estas neeble. Fakler dispecigus min."

„Li ankaŭ min . . ."

„Unue mi ne interesiĝus pri tio kaj due oni devus klarigi la demandon, ĉu Fakler estas pli forta ol vi."

„Bone", mi diris, „mi provos defendi min. Rakontu!"

„Se vi mencius min kiel fonton, mi kontestos."

– Ĉi-tiu Fakler do alvenis el alpoj al Vieno, pli malriĉa ol frue, sed kun koro plena da sentoj. Li serĉis meblitan ĉambron, por ke li trankvile notu ĉi-tiujn sentojn.

Li serĉis antaŭtagmeze de la oka ĝis la unua horo en la interna urbo, la ŝtuparojn supren kaj malsupren; ĉio estis tro multekosta. Posttagmeze en la Alser-kvartalo, neniu ĉambro kostis malpli ol 40 ŝilingojn. Sed Fakler projektis en sia buĝeto nur 30 ŝilingojn por lupago.

Subite, irante hejmen, li legas en la Bogner-strateto afiŝon: „Tre eleganta ĉambro, tre malmultekosta."

„Ho, tio estas mia kazo!" Kaj li suprengrimpis kun dolorantaj genuoj etaĝon post etaĝo por trankviligi per ĉi-tiu lasta provo sian ŝpareman konsciencon. Se ankaŭ ĉi-tiu ne sukcesus, li volus alie aranĝi sian buĝeton kaj ŝanĝi la profesion.

Ĵetinte rigardon en la ĉambron, Fakler tuj turnas sin. Tiel li imagis tion: kurtenoj, tapetoj, latunlito, ŝvelaj sofoj – ne, poeto ne povas loĝi tiel elegante.

„Kien, sinjoro? – Dommastrino alsaltis, kaptante lin kun hontema trudemo ĉe liaj ŝultroj. Bonvolu, aŭskulti nur! La ĉambro estas tre malmultekosta. Ne kapneu! Ĝi estas tre malmultekosta. Vi miregos."

Fakler – sensone: „Kiom?"

Dommastrino: „15 ŝilingojn por monato."

Kiam li restas muta, ŝi daŭrigas: „Kun servado. Estimata sinjoro, kial mi erarigus Vin? Dum kelkaj minutoj vi ja tion rimarkus . . . Jes, la ĉambro havas grandan malperfekton. Ni havas malfortetan infanon. Nia kuracisto, la naturkuracisto, receptis al ĝi kaprolakton. Ni tenas kaprinon. La kaprino staras apude. Ĝi mekas kelkfoje . . ., vespere, malfrue vespere . . ., matene . . ., tre frue . . . Tio signifas: ĝi mekadas dumtage kaj dumnokte. Aŭskultu nur!"

„Mehehehek!"

„Luinto post la alia tial forloĝiĝis, ne malluinte." – La virino ĵetas sin preskaŭ al la kolo de la dika Fakler. „Sed vi, ĉu ne, kutimiĝos al tio. Mi asertas, vi kutimiĝos. Ni, mia edzo kaj mi, ne plu aŭdas tion. Tia utila besto. Kaj la bedaŭrinda infano. La eleganta ĉambro. Nur 15, nur 13, kion mi diras, nur 12 ŝilingojn inkluzive de servado. Bone, ankaŭ inkluzive de hejtado. Ho ve, bonvolu resti!"

Li restis. Li estis tiel laca pro la serĉado kaj la ŝtuparsuprengrimpado, ke li restus eĉ en la infero.

– Li skribis:

„Mi ŝatas nebulojn, leviĝantajn kiel feinoj
el malseketaj herbejoj en la somervespero,
svingantajn je danco grizosilkajn vualojn
orkolore kaj mallaŭte en mutaj paradizoj."

„Mehehehek!"

„Ne, tio estas malebla", li diris. „La animstato forestas." Li ĉifis la folion kaj ĵetis ĝin en la brodaĵan pluŝkorbon kaj komencis ekscititan baladon:

„Princino Elisabeto de Transsilvanio
sufokigis ĉiutage cent infanojn.
En la lando krias la malvarma
teroro . . ."

„Mehehehek!"

„Tio eĉ malpli taŭgas", murmuris Fakler kaj ĵetegis ankaŭ la baladon en la angulon.

Li enlitiĝis. La kaprino mekadis lin maldorma. Ĝi parolis trudeme en liajn sonĝojn.

Matene post la ĉagrena nokto – ne, malfrue antaŭtagmeze – li ankoraŭ dormegis kaj ekvekiĝis nur pro la tintado de la abunda tepleto. Sen temposento li subite leviĝis.

„La matenmanĝo ankaŭ estas inkluziva", diris honteme la dommastrino . . .

„Espereble vi ne estis ĝenata tro forte. Mimi hodiaŭ bedaŭrinde jam komencis je la matenkrepusko . . ."

„Mimi?", li demandis, „kia Mimi?"

„Nun, vi ja scias, la . . ."

„Mehehehek!"

„Oj, . . . mi aŭdis nenion."

„Ha, kiel bele! Mia edzo kaj mi ankaŭ ne plu aŭdas ĝin. Bonan apetiton, bonvolu trinki la teon! Ĉu vi preferas ŝinkon aŭ ovojn al la teo?"

„Diablo", diris al si Fakler kaj manĝegis kaj trinkegis, „filozofo venkas kon-

---

pro la rakonto!"

„Se vi eble kredas, ke estas plezuro aŭskulti vin . . ."

„Trude!"

„Bonvolu diri, sinjoro Panter, ĉu oni povas elteni tion? Kaj tiel nervoza li jam estis la tutan semajnon . . . Mi havas . . ."

„Vi estas . . ."

„Via nekapablo sinregi . . ."

„Tuj ŝi diros: frenezeco! Via patrino tion simple nomas malbona edukado . . ."

„Mia infanaĝo . . .!"

„Kiu do nuligis la aferon ĉe la advokato? Kiu do? Ĉu eble mi? Vi! Vi petis, ke la eksedziĝo ne . . ."

„Mensogo!"

Bumm: pordokrakado dekstre. Bumm: pordokradado maldekstre. Nun mi sidas ĉi-tie kun duona spritaĵo.

Kion diris la viro al la juna kamparanino?

Trad. Manfred Arnold

traŭ dentodoloroj – kaj se ne: Cervantes verkis en malliberejo: mi montros al la mondo, ke stulta kaprinaĉo . . ."
„Mehehehek!"
„. . . kaprinaĉo . . ."
„Mehehehek!"
„. . . kaprinaĉo ne povas rabi mian animan ekvilibron. – Mehehehek!", li imitaĉis ĝin kaj verkis.
„Mehehehek!", li sarkasme alvokis al ĝi, post kiam skriis sian animon el sia korpo.
La kaprino respondis. Fariĝis beleta dueto.
– Je la dudeka tago – formante ĵus ritornelon, li ekstaris strange maltrankvile de sur la sofo. Kio estas nur? Kio hodiaŭ mankas al li? Frapas al la pordo. – „Bonvolu, eniri!" – La dommastrino eniras kun ruĝplorintaj okuloj.
„Vi certe jam rimarkis, sinjoro Fakler, la malfeliĉon, kiu trafis min."
„Kio do okazis, Jezuo kaj Maria?"
La dommastrino: „Mimi mortis. Morta. Oj, oj, kia granda malfeliĉo por ni."
Fakler eksaltis kaj trapasis zorgoplene la ĉambron.
„Malfeliĉo ankaŭ por mi, kara sinjorino." (Sed nun ŝi memkompreneble malluos min.) „Mi jam treege kutimiĝis . . ."
„ ‚Me-he-he-hek', ĝi ankoraŭ diris, falis teren kaj etendis de si siajn kvar gambojn."
„Kiel ĝi ankoraŭ diris, kara sinjorino? Bonvolu, ripeti! Tio mankas al mi jam dum la tuta mateno."
„Oj, oj, oj, kaj kiel mankas tio al nia infaneto! La infaneto tre ŝatis Mimi'n. Nun krias la infaneto, krias, ekcitiĝas kaj febras. Ni ne rajtas malkaŝi, ĉar Mimi mortis la infaneto senĉese ploras. Mi perdas la sinregon, mia edzo perdas la sinregon, ni, mia edzo kaj mi, perdas la sinregon. Ni konsideris ĉion eblan, nenie estas eliro. Oj, oj, oj, kara, karega sinjoro Fakler. Vi nur povas helpi nin. Ĉu mi rajtas paroli?"
„Bonvolu, paroli!"
„Kara, karega, bona, plej bona sinjoro Fakler! Bonvolu, meki!"
„Kion mi devus fari???"
„Meku nur unufoje. – Vi scipovas tion tiel bone, por ke la infaneto trankviliĝu!"
„Mehehehek!"
„Mi dankegas vin! Aŭskultu nur, la infaneto trankviliĝis, ĝi estas kontenta. Oj, oj, oj, kara sinjoro, faru al ni la komplezon. Mia edzo kaj mi – bonvolu ne miskompreni nin, kara sinjoro Fakler – volonte ni volus malpliigi la lupagon je ŝilingoj, se Vi estus tiel afabla, iam kaj iam . . ."
„Iam kaj iam . . ."
„. . . meki. Vi devus fari tion ne senĉese – nur, se Vi ĵus havus tempon, unufoje, dufoje dum kvaronhoro . . ."
– Fakler restis. Kaj mekadis. Mekante

(fino p. 38)

Miroslav Malovec

Pri traduka arto

1. Beletra tradukado

En ĉiuj literaturoj de la mondo la beletro tradukita antaŭis la originalan. Ankaŭ Esperanto ne estas escepto, male la traduka literaturo havas por ĝi ĉefan signifon, ĉar la tradukanto, ne rajtante eviti malfacilajn lokojn, devas ĉiam trovi kontentigajn solvojn de ĉiu lingva aŭ stila problemo. Tiamaniere la tradukado grave evoluigas la lingvon, enportante en ĝin novajn frazeologiaĵojn, idiomaĵojn kaj proverbojn, disvolvigante ĝiajn proprajn stilajn kvalitojn kaj eblojn.

Tamen estus eraro pensi, ke por bona tradukado sufiĉas majstri ambaŭ lingvojn kaj posedi iom da stilista talento. La tradukisto devas bonege sin prepari teorie por sia laboro kaj konscii pri siaj rajtoj kaj devoj. La asertoj, ke iu traduko estas „pli bona ol la originalo", estas same ridindaj kiel fanfaronado per „pli rapida horloĝo", kaj atestas, ke oni miskomprenis la taskojn de la tradukado.

Pri la problemoj de beletra tradukado estis esprimitaj multaj postuloj, kiuj ofte kontraŭas unuj la aliajn, ekzemple:

- La traduko devas laŭvorte reprodukti la originalon
- La traduko devas reprodukti la ideon de la originalo
- La traduko devas esti legebla kiel la originala verko
- La traduko devas malkaŝi, ke ĝi estas traduko.
- La traduko devas konservi la stilon de la originala aŭtoro.
- La traduko devas emfazi la individuan stilon de la tradukinto.
- La traduko devas havi la koloron de la tempo, en kiu estiĝis la originalo.
- La traduko devas havi freŝecon de la tempo de sia estiĝo.
- La traduko ne permesas aldonadon aŭ eliminadon.
- La traduko povas koncizigi la originalon aŭ kompletigi.

Se oni volas orientiĝi en la problemaro, necesas reveni al la historio.

2. El la historio de tradukado

La mezepoka tradukisto simple aliras kontis la nereligiajn tekstojn, konsiderante la rezulton de sia propra verko, dum la religiajn skribaĵojn li tradukis per sklaveca laŭvorteco, vorton post vorto, perfortante eĉ la gramatikon, kvankam la rezulta teksto estis preskaŭ nelegebla kaj malfacile komprenebla. Sed li ne kuraĝis „korekti la vortojn de Dio".

La humanismo jam postulis, ke oni ne traduku izolajn vortojn, sed signifon post signifo, ideon post ideo, kaj ke oni uzu korektan kaj facile kompreneblan lingvaĵon. La protestantismaj tradukoj de Biblio eĉ aktualigis vivrealaĵojn, anstataŭigante turbanojn per ĉapeloj, papirusajn volvaĵojn per libroj, kuŝadon ĉe la manĝo per sidado k.s.

La baroko pro propagandaj, kontraŭprotestantismaj celoj klopodis folklorigi la tradukojn ankoraŭ pli, por ke ili facile disvastiĝu en la popolo kaj helpu likvidi la influon de la protestantismo. Male, la fiera klasikismo konsideris ĉion folkloran maldigna por la literaturo; la tradukistoj penis rivale „pliperfektigi" la aŭtoron, elstreki ĉion „nepoezian" (ekz. nazpurigadon), uzi sole poetismajn esprimojn. Ambaŭ manieroj estas misaj, uniformigantaj la verkojn kaj senigantaj ilin de la originaleco. La aŭtoroj ofte uzas diferencajn stilojn por karakterizi la unuopajn heroojn de siaj verkoj; en la folklorigitaj aŭ poetigitaj tradukoj la karakterizaj diferencoj malaperas.

La romantikaj tradukistoj pietate subiĝis al la aŭtoro, dezirante prezenti lin al la legantaro tia, kia li efektive estas, eĉ kun liaj mankoj, konservi lian stilon kaj esprimmanieron. Kiel idealo estis por ili traduko preskaŭ laŭvorta, imitanta ĉiujn apartaĵojn de la originalo, eĉ se ili impresis strange kaj nenature en la traduko, ĉar la romantikuloj opiniis tiujn apartaĵojn karakterizaj por la aŭtoro.

La realisma traduko klopodis aspekti kiel originalo, se la aŭtoro verkus ĝin en la lingvo de la tradukisto. La traduko imitis la stilajn manierojn kaj kutimojn de la aŭtoro, aplikante ilin je la nova lingva materialo. La interpretisto ne tradukis laŭvorte la karakterizaĵojn de la aŭtoro, sed serĉis en sia propra lingvo esprimilojn, havantajn similan efikon. Ĉar la realisma tradukisto deziris, ke lia traduko impresu la leganton same kiel la originalo, li ofte transportis la scenejon de la rakontado el fremda lando kaj malproksima pasinteco al sia lando kaj sia epoko. Sed tiamaniere li ŝanĝis la kolorecon kaj atmosferon de la rakontado.

La naturalistoj konsideris sia devo konservi la nacian karakteron de la verko, por ke la leganto sentu, ke li legas romanon anglan, francan, rusan ktp. Ili ne nur ne transportis la scenejon, sed klopodis akcenti la fremdan medion spicanta sian tradukon per fremdismoj (anglismoj, francismoj, rusismoj). Ili ekzemple tradukis kelkajn idiomojn aŭ proverbojn laŭvorte, de tempo al tempo

konservis nekutiman vortordon k.s. Sed ankaŭ tio estis eraro, la fremdismoj ĝenas la leganton, aspektas nenature.

3. Modernaj postuloj

Laŭ modernaj postuloj la tradukisto devas prezenti al la publiko ne sin mem, sed la tradukatan aŭtoron, ne plibonigadi lian verkon laŭ sia bontrovo, sed interpreti ĝin kun ĉiuj kvalitoj pozitivaj kaj negativaj. Se la aŭtoro uzis en la verko diversajn stilojn por karakterizi siajn heroojn (nobelojn, pastrojn, soldatojn, maristojn, kamparanojn, laboristojn ktp.), la stiloj devas resti en la traduko konservitaj en plena riĉeco kaj esprimiveco. Ĉiun esprimon necesas traduki ne nur laŭ ĝia priskriba signifo, sed ankaŭ kun ĉiuj nuancoj kaj stilaj valoroj, por ke la sceno konservu sian atmosferon, kolorecon kaj sentespriman ŝargon kiel en la originalo. La ideo de la verko devas resti neŝanĝita kaj nedeformita. La nacian karakteron de la verko necesas konservi ne per formalaj, nenaturaj rimedoj, sed simple ne rompante ĝin, ne transportante la scenejon de la rakontado en la landon de la tradukisto. Tia transporto – eĉ subkonscia – okazas, kiam oni tradukas familiajn nomojn (ekz. sinjoro Brown en angla romano al sinjoro Bruna, kiu perdas sian anglan karakteron), se oni uzas dialekton, kiu lokigas la rakontadon en certan regionon en la lando de la tradukisto, se oni uzas frazeologiajojn, kiujn la herooj en la rakonto ne povas koni (ekz. „Judasa kiso" en romano pri antikvaj grekoj) ktp.

4. La principo de tradukado

Beletraĵo per artismaj rimedoj bildigas la realon kaj esprimas ideojn kaj celojn de la aŭtoro, per kiuj li volas impresi la leganton. La lingva materialo ebligas al li krei frazojn, kiuj en la cerbo de la leganto elvokas la intencitajn bildojn, ideojn kaj celojn. La tradukisto unue kiel leganto devas kapti la bildigojn kaj kompreni la intencojn de la aŭtoro kaj poste reesprimi ilin per la materialo de sia lingvo. La samaj vortoj kaj vortkombinoj eĉ en tre parencaj lingvoj preskaŭ neniam havas absolute identajn signifon, nuancon kaj stilan uzeblon, male ofte ili estas tre diferencaj, eĉ kontraŭaj. Tial ne eblas traduki laŭvorte kaj samtempe fidele, ĉar la fideleco ne baziĝas sur vortoj, sed sur esprimitaj ideoj. Al la fideleco apartenas ankaŭ beleco, sed oni ne konfuzu ĝin kun kiĉa plaĉeco. Se iu esprimo en la originalo estas plursignifa kaj ebligas plurajn diferencajn eksplikojn, la tradukanto devas elekti tiun varianton, kiu pleje akordas kun la tuta ideo de la verko. La tradukisto devas tre bone koni la tradukatan beletraĵon, ĝiajn scenojn kaj la naturon de ĝiaj herooj, por li li povu traduki ne laŭ vortoj, sed laŭ la bildigita realo. Tamen rompi la laŭvortecon senbezone estas ankaŭ eraro. La principo de neceso kaj sufiĉo validas ankaŭ ĉi tie.

La traduko estas senĉesa decidado inter pluraj eventualoj de interpretado. La elekton influas la celoj, por kiuj la tradukisto laboras. Alie tradukas profesoro preparanta helpilon por siaj gestudantoj de fremda lingvo, alie artisto, deziranta abundigi la literaturon de sia lingvo. Kiam la traduklingvo estas nur disvolviĝanta, la tradukisto volas riĉigi ĝin per novaj vortoj, idiomoj, proverboj kaj aliaj esprimoj, kaj tio kondukas lin al laŭvorteco kapablanta „ŝteli" la bezonatajn stilaĵojn. Se la lingvo jam plene literature disvolviĝis, la tradukanto koncentras sian atenton sole al la artismaj kvalitoj de la verko. Ĉiuj solvoj havas siajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn, sed preskaŭ neniu absolute identas kun la originalo. La tradukisto devas decidi, kion li preferos kaj kion li pribedaŭros. Nove kreita kaj enkondukita esprimo povas riĉigi la lingvon, sed ĝi samtempe tiras al si la atenton de la leganto kaj rompas tiamaniere la artan efikon. La tradukanto, anstataŭ resti modeste kaŝita malantaŭ la aŭtoro, tro emfazas sin mem kaj entrudas sian vortkreivan lertecon al la leganto. Tia tradukado estas ĝusta, nur kiam la aŭtoro mem tiel vortludas.

Multaj esperantistoj lasas sin influi per impreso, ke plurvorta traduko de unuvorta esprimo estas ia perdo atestanta pri malriĉeco de la lingvo. Tial ili klopodas traduki unu vorton de la originalo ĉiam per unu vorto en Esperanto, eĉ se estiĝas monstra kunmetaĵo, plene altiranta al si la atenton de la leganto, rompanta la belecon kaj efikon de la frazo. Sed plurvorta tradukado estas nenia honto, ĉar tion faras ĉiu lingvo, eĉ tradukante el Esperanto. Necesas atenti alian problemon. Mallongaj esprimoj en la originalo estas malpli okulfrapaj kaj tial ili povas kelkfoje ripetiĝi, dum la pli longaj frazeroj en la traduko ĉe la sama ripetado netolereble atencas la okulojn kaj orelojn. Ekzemple „estas" havas en la naciaj lingvoj kutime unusilaban formon, ĝia ripetado ne estas tiom ĝena kiel en Esperanto. Bona tradukisto de tempo al tempo evitas ĝin (estas eble = eblas, li estas dekjara = li havas dek jarojn). Tamen ekzistas okazoj, kiam la ripetado de la sama esprimo estas bezonata por emfazi la efikon. Alikaze malpli longa esprimo povas malakcentigi bildigon. La tradukisto bezonas posedi bonan senton por tiaj nuancigoj kaj profunde koni la stilajn diferencojn inter la du lingvoj.

5. Misinklinoj de la tradukantoj

Tradukinte tradukon reen en la originalan lingvon kaj komparante la tekston kun la originalo, oni rimarkis du gravajn tendencojn, kiuj aplikiĝis dum la tradukado: a) La tradukistoj tendencas uzi pli ĝenerale konatajn vortojn kun pli larĝa, sed malpli preciza signifo, uzi stilajn ŝablonojn. Ekzemple „muĝado de leonoj" ŝanĝiĝas al „blekado de leonoj", „sonsonado de aŭtomobiloj" al „murmurado aŭ bruado de aŭtomobiloj", „serpentumado de soldatoj" al „zigzaga rampado de soldatoj" ktp. La esprimoj uzitaj de la originala aŭtoro estas pli trafaj, pli koloraj, pli reliefaj kaj impresaj. Kiam la tradukisto rimarkas, ke la aŭtoro intence uzis emocie fortajn esprimojn, li male inklinas troigi la emocian forton. Anstataŭ „granda amaso da mono" li tradukas „grandega amaso da mono", anstataŭ „Joĉjo gapis" aperas en la traduko „Joĉjo gapaĉis" k.s. La pliintensigo kaj malintensigo de la emociaj esprimoj estas tradukmetodaj eraroj kaj la tradukantoj devas gardi sin kontraŭ ili.

b) La tradukistoj tendencas „klarigi" la tekston, fari ĝin pli logika ol en la originalo. Sed la aŭtoroj ofte intence formulas siajn frazojn malklare por elvoki streĉan atmosferon (detektivaj kaj psikologiaj romanoj) aŭ ŝajne nelogike, ĉar tio donas al la teksto novan, pli impresan bildon. En la frazo „mi estis kaptita, poste ili kuris tra ia koridoro kaj fine ĵetis min en ian kaĝon" la verkisto montras sian senpovon dirante „poste ili kuris tra ia koridoro" anstataŭ diri „poste ni kuris tra ia koridoro", kvankam estas klare, ke li kuris kun ili. Tradukisto, kiu anstataŭ „ili" skribus „ni", farus la frazon pli logika, sed malpli impresa. Tiaj „plilogikigoj" estas en tradukoj tre oftaj. Multaj tradukantoj inklinas al pli ofta uzo de konjunkcioj, por ke la teksto estu „pli flua". La aŭtoro intence evitis ilin por akiri certan efikon (Li alkuris. Li sidiĝas. Li diris nenion.), sed la tradukinto rompis la bildon per aldono de konjunkcioj (Li alkuris. Kaj li sidiĝis. Kaj li diris nenion.).

Tamen en multaj situacioj la klarigoj taŭgas. Estas konsilinde skribi „la rivero Sázava, la vilaĝo Krenovice, la komunista ĵurnalo Rovnost", ĉar la nomoj Sázava, Krenovice aŭ Rovnost per si mem dirus nenion al la eksterlanda leganto.

6. La tradukmetodo

La tradukisto antaŭ la komenco de laboro devas bone prepari sin. Li bezonas unue akiri kvalitan eldonon de la tradukota libro (se eble, la t.n. kritikan eldonon) kaj tre atente tralegi ĝin. Unue kiel simpla leganto lasante sin impresi per poeziaj bildoj, due kiel tradukonto,

bone atentante la esprim-rimedojn de la aŭtoro, substrekante per krajono interesajn kaj problemajn lokojn. La tradukisto devas bone pripensi, kia estas la idea celo de la verko, kion la aŭtoro intencis komuniki al la legantoj. Estas bone koni ankaŭ la ceterajn verkojn de la aŭtoro kaj lian biografion, scii en kia tempo kaj por kia celo li verkis ĝin. Poste necesas tre zorge analizi la esprimilojn de la aŭtoro, lian bildigan metodon kaj provi serĉi adekvatajn rimedojn en la traduklingvo. Se iu kvalito de la originala lingvo estas netradukebla, la tradukisto serĉas taŭgan kompenson, per kiu li almenaŭ parte anstataŭigus la netradukeblan trajton de la originalo. Ekz-e d-ro Tomáš Pumpr en sia traduko de Bapto de caro Vladimir uzis internajn rimojn (kaj tuj poste ĉevalvoste; frue jam ĝi volas manĝi; false ŝajnas, ke mi gajnas), kiuj ne troviĝas en la ĉeĥa originalo de Havlíček, por kompensi netradukeblajn dialektaĵojn, slangaĵojn kaj karesvortojn, kiuj spicas la ĉeĥan tekston. La tradukonto devas decidi, kiamaniere li tradukos dialektojn, arkaismojn, vortludojn, proprajn nomojn, proverbojn, idiotismojn, koncize dirite li bezonas krei sian „tradukŝlosilon". Poste li povas eklabori, serĉante taŭgajn esprimojn por ĉiu bildo kaj klopodante, ke li priskribu ĝin nek malpli nek pli intense, klare aŭ emocie ol estas necese laŭ la intencoj de la aŭtoro.

7. Ankoraŭ kelkaj notoj

a) Tradukante teatraĵon la tradukisto ne devas forgesi, ke la verko estas destinita por esti prezentata sur la scenejo de teatro. Tial ĉiuj frazoj devas esti facile prononceblaj kaj ankaŭ facile kompreneblaj, ĉar la spektanto ne havas eblon legi „rimarkojn de la tradukinto" kiel en libro. La teatraĵo povas esti aktualigita tiel, por ke ĉiuj aludoj kaj mencioj estu kompreneblaj por la aŭskultantoj. Se en la teksto estas aludo pri iu ne plu konata komponisto, estas konsilinde anstataŭigi lin per alia, pli fama muzikisto, alie la sursceneja konversacio estas por la spektantoj nekomprenebla.

b) La proprajn nomojn familiajn oni povas traduki nur tiam, kiam la medio de la verko ne troviĝas en konkreta lando. Ekzemple la medio de Insulo de Pingvenoj far Anatole France troviĝas sur nekonata insulo. Konservi la francajn nomojn de la originalo signifus transporti la scenejon de la rakontado el la nekonata insulo en Francion kaj fari el la verko satiron nur pri Francio, dum la tradukitaj nomoj donas al la verko validecon por la tuta homaro. Se oni tradukus la komikajn nomojn en la romano de Dickens pri sinjoro Pickwick, la romano estus kvazaŭ forportita el Anglio, kie okazas ĝiaj eventoj, la verko

(fino p. 38)

Fritz Wollenberg

La disputo pri la Zamenhofa heredaĵo

„Prave aŭ malprave
la mondo vidas en mi
ĉiam la naturan reprezentanton
de la anaro esperantista . . ."

1. Aktualeco de la Zamenhofa heredaĵo

„La korektita Zamenhof" titolis artikolo, en kiu mi prezentis ekzemplon por la manipulado de Zamenhofaj ideoj.[2] Ito Kanzi, la konata Zamenhof-historiografo, provis en sia „senlegenda biografio de L. L. Zamenhof" pravigi siajn proprajn politikajn konvinkojn ne nur per eluzo de la kontraŭdireco de Zamenhofaj ideoj, sed eĉ per korekto. Malgraŭ al liaj meritoj en la esplorado kaj kompilado de datoj kaj faktoj pri Zamenhofaj vivo kaj verko videbliĝas la neceso por la Esperanto-movado senmaskigi kaj repuŝi tiajn korektojn de Zamenhofaj ideoj, kiuj ne kongruas kun la historiaj spertoj de nia movado kaj hodiaŭ kaŭzus plifortigon de sektecaj tendencoj kaj la apartigon de la esperantistoj disde la fortoj de paco kaj socia progreso. Dum Ito Kanzi propagandis reviziitan Zamenhofan homaranismon, sursceniĝis en la rondo de „Zamenhofologoj" pola aŭtoro, kiu entute kontestas aktualecon de Zamenhofaj sociaj ideoj por la nuntempo. „Por la nuna, dudeka jarcento Zamenhof por ni lasis la lingvon, dum lian soci-religian penson almenaŭ nuntempe, oni devas lasi por bibliotekoj kaj arkivoj."[3] Tiun rekomendon de Walter Zelazny mi trovis en 24-paĝa traktado pri la „Doktrino de Zamenhof". Intertempe la sama aŭtoro publikigis „Tezojn pri la esplorpostuloj pri la Zamenhofaj verko kaj vivo kaj ties influo en la Esperanto-movado".[4] Estas strange, kiom multe da energio Walter Zelazny uzas por forpeli la Zamenhofan idean heredaĵon en bibliotekojn kaj arkivojn. Fakte neniam en la lastaj 100 jaroj iu sukcesis en tiu entrepreno.

Simpla trarigardo de Esperanto-gazetoj montras, ke aŭtoroj por pruvi diversajn, eĉ kontraŭajn opiniojn citas Zamenhof. „Kaj kion diras la plej kompetenta esperantisto Zamenhof . . ." ekzemple demandas D-ro Istvan Nagy en sia artikolo „Konferenci, simpozii aŭ . . . agi?".[5] Ne estas lingva demando, por kies respondo D-ro Nagy citas Zamenhof kiel aŭtoritatulon. Temas pri vojoj al la oficialigo, akcepto de Esperanto, do lingvopolitika demando.

La aktualeco de Zamenhofaj pensoj ankoraŭ pli okulfrape evidentiĝas en la motivigo de la strategio de Esperanto-organizaĵoj. „Ĉiuj esperantistoj plenumante la ideojn de Zamenhof pri paco kaj frateco, klopodante krei pli bonajn kondiĉojn por la fina venko de Esperanto, devas unualoke kontribui al la tutmonda batalo por konservo de la paco kaj tiucele aliĝi al la vicoj de MEM."[6] Tiun ĝeneralan motivigon de la prezidanto de MEM, Imre Pethes, kaj aliaj aktivuloj pli detale klarigas. La bulgara Zamenhof-historiografo Canko Murgin prilumis la demandon „Kial la nuntempaj esperantistoj pacdefendantaj sentas proksime al si la pactestamenton de L. Zamenhof" en sia artikolo „Zamenhof – de pacifisto al pacdefendanto".[7] La demando kaj la titolo de la artikolo sufiĉe klare esprimas la sintenon de Murgin rilate al la Zamenhofa idea heredaĵo. Alia formo por la internacia esperantista pacmovado konfesi Zamenhofajn tradiciojn estas la nomoj de aranĝoj. Mi nur indikas pri la tradicia ĉiujara Zamenhofa Internacia Pacmarŝo en Hungario.

UEA ne pli malfavore apogas sin je la Zamenhofa heredaĵo. Humphrey Tonkin, la prezidanto de UEA, motivigis pasintjare la kongresan temon de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto en 1986 en Pekino „Interkompreniĝo, Paco, Evoluo" per aktualigo de Zamenhofaj pensoj pri la pacbatalo.[8] Al la idea heredaĵo de Zamenhof UEA sin same konfesis per starigo de alta distingo la Premio Zamenhof – por internacia kompreniĝo, kiun unue ricevis en 1985 la Asista Ĝenerala Sekretario de Unuiĝitaj Nacioj, Robert Muller[9a] kaj 1986 la ĝenerala direktoro de UNESKO Amadou Mahtar M'Bow[9b].

Se mankas ankoraŭ pruvo por aktualeco kaj graveco de la esploro kaj prezento de la Zamenhofa idea heredaĵo mi aldonas, ke tute prave enkadre de la 1-a Internacia Simpozio en Varsovio 1984 estis pritraktitaj vivo kaj verko de Zamenhof kaj ties influo en la Esperanto-movado sub la temo: „Strategiaj demandoj de la Esperanto-Komunumo". Surprize la temon traktis la sama Zelazny, kiu akceptis de Zamenhof por la nuntempo nur la lingvon Esperanto.[10] Tamen vere estas strategia demando, kiamaniere ni rilatas al la Zamenhofa idea heredaĵo. Ni rigardu la sintenon de du internacie konataj esperantistoj al la Zamenhofaj ideoj pri organizado de esperantistoj. Ito Kanzi prezentas la penojn de Zamenhof por kreo de organizo de la esperantistoj kiel kompromison kun la civilizacio.[11] Tute alie la elstara bulgara partia, sindikata kaj esperantista aktivulo, la honora prezidanto de MEM, Nikola Aleksiev, interpretas tiujn Zamenhofajn penojn kiel espri-

mon de ties demokratismo. La Zamenhofan demokratismon Aleksiev pritaksas speciale grave. Li analizis en artikolo la demokratismon kiel „unu el liaj plej karakterizaj trajtoj", kiu „portas tute popolan karakteron kaj ege helpis al li en lia tuteca agado kiel aŭtoro de projekto de internacia lingvo kaj poste kiel rekonata kaj ege estimata gvidanto de reala kaj relative sufiĉe amasa Esperantista movado", kaj li postulis „fakte oni devas verki specialan studon pri tiu temo, emfazante ĝian aktualecon en nia epoko." Tiun aktualecon li en la sama artikolo substrekis jene: „Ni esperantistoj-pacdefendantoj estu fieraj, ke en la respondecaj tagoj de nia nuntempo, ni portas alte kaj fiere la demokratecan idealon de la granda humanisto Zamenhof."[12] Do la disputo pri la Zamenhofa heredaĵo koncernas gravajn aktualajn problemojn de la homaro, unuarange la porpacan batalon. La bunta bildo de la nuntempa prizamenhofa literaturo en tiu ĉi artikolo nur aludata respegulas la diversajn aŭ eĉ kontraŭajn opiniojn kaj mondkonceptojn en la internacia Esperanto-movado. Aleksiev, Murgin, Waringhien, Kanzi, Maimon, Zelazny kaj multaj aliaj partoprenas tiun disputon, kiu ne nur okazas interne de la Esperanto-movado.

La bildo, kiun akiras la neesperantista publiko pri la iniciatinto de Esperanto dependas ofte de esperantistaj informoj kaj influas la rilaton de tiu neesperantista publiko al la Esperanto-movado.

Antaŭ nelonge dum la 71-a UK de Esperanto en Pekino la vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko karakterizis „la diplomatian politikon de sendependeco kaj memdecido", la opinion, ke „la landoj, ĉu grandaj aŭ malgrandaj, sen konsidero pri la socia aŭ politika sistemo povas kaj devas disvolvi rilatojn de komuna harmonio kaj amika kunlaboro surbaze de la kvin principoj de paca kunekzistado" kiel politikon kaj kredon, kiuj „respondas al la Zamenhofa spirito".[13] Ne ĉiuj prizamenhofaj skribaĵoj perus al li tiun imagon pri la Zamenhofa spirito. Ĝuste nun, kiam la 100-jariĝo de Esperanto instigas pli grandan intereson de la neesperantista publiko por la lingva komunumo de la esperantistoj, por ĝiaj historio kaj tradicioj, por la 100-jara funkciado de internacia planlingvo, por la apliko de Esperanto en la diversaj sferoj de la socia vivo, pligrandiĝas ankaŭ la intereso por la personeco, por vivo, verko, kaj mondkoncepto de ĝia iniciatinto kaj sekve pligraviĝas ĉiuj prizamenhofaj esploro kaj prezento.

2. Necesas scienca esploro, kritika aprezo kaj realisma prezento de la Zamenhofa heredaĵo

„Mi scias, . . ., ke unu esperantisto verkis'himnon al Zamenhof; . . . Mi kore petas ĉiujn, ke oni tion ĉi ne faru, . . ."[14] Tiu ĉi peto de Zamenhof ne nur estas ekzemplo por lia modesteco. Li en aŭtobiografia letero esprimas sian opinion, pro kio lia biografio „por la estontaj generacioj . . . eble estos ne seninteresa". Li indikas pri tio, ke „efektive mia tuta vivo . . . prezentas unu konstantan kaj seninterrompan serion da diversaj bataloj: a) i n t e r n e en mi konstante bataladis reciproke diversaj idealoj kaj diversaj celadoj, kiuj ĉiuj egale estis por mi ordonaj . . .; b) e k s t e r e mi ofte devis bataladi kontraŭ diversaj malhelpoj, ĉar neniam miaj idealoj apartenadis al la idealoj e n m o d o . . ."[15]

Neniu prizamenhofa aŭtoro povas malatenti tiun postulon de Zamenhof mem, prezenti la kontraŭdirojn kaj ties kaŭzojn, prezenti la evoluon de ideoj, la serĉadon kaj la erarojn.

Historiografoj el diversaj landoj kun diversaj mondkonceptoj kontribuis al la esploro kaj prezento de tiuj kontraŭdiroj. Waringhien ekzemple skizas enkadre de esperantologiaj eseoj evoluon de Zamenhofaj ideoj kaj konkludas, ke maldikiĝis la religia parto kaj ke „Zamenhof ekkonsciis, ke la vera baro, kiu disigas la homojn nuntempajn, estas malpli la lingvo aŭ la religio, kiel en la pasintaj jaroj". Waringhien substrekas „La nacian ŝovinismon, li montris tre klare en siaj lastaj verkoj, . . ., kiel la plej grandan malbonon kaj la plej grandan obstaklon al la paco". Li kiel ankaŭ aliaj historiografoj montras la humanisman tradicion, en kiu Zamenhof envicigis sin kaj pritaksas, ke Zamenhofa penso ankoraŭ estas efika", ĉar la entuziasmon de la viziulo ĉiam akompanis la praktikismo de la scienculo".[16] La Zamenhof-historiografo Maimon, kiu speciale pritraktas la judecajn aspektojn en la vivo de Zamenhof emfazis, ke meze de la instruo de Hilelismo situas la homo kaj per tiu skizas unu fonton de la Zamenhofaj ideoj. Tamen tiuj aŭtoroj pro iliaj propraj kontraŭdiroj ne povas klare pritaksi la humanisman enhavon de la Zamenhofaj ideoj. Waringhien nur neklare povas pritaksi Zamenhof kiel „grandan apostolon de la homa frateco".

Zelazny diras, pro kio li rezignas pritaksi la sociajn ideojn de Zamenhof. Li konfesas, ke li ne povas science pruvi kiel „aspektas evoludirekto de la historiozofio" kaj plendas „Bedaŭrinde tiu problemaro ne apartenas al sciencaj kategorioj".

Laŭ la pritakso de Zelazny Zamenhof estas „totala viziulo", pri kies ideoj li diras: „Totalaj vizioj malaperas kune kun sia potenco paralizitaj far si mem, . . ." Certaj instigoj de Zelazny por pli profunda esploro de Zamenhofaj vivo kaj verko meritas atenton. En liaj tezformaj esplorpostuloj li indikas pri fontoj de la Zamenhofa pensado kaj pri kelkaj liaopinie nove esplorendaj demandoj. Limigas lin lia pozitivisma starpunkto. Unuflanke li asertas, ke al la „kategorio de science analizeblaj fenomenoj" nur apartenas „la lingvo Esperanto mem" kaj ke „Ĉio alia apartenas al profetaĵoj, mondkonceptoj, ideologioj, teorioj, doktrinoj, religioj ktp."[17] aliflanke ĝuste pri tiuj „science ne analizeblaj fenomenoj" skribas esplorpostulojn bedaŭrante, ke „neniam" tiaj esploroj „science okazis".[18] Tamen tiaj esploroj necesas. La direkton montris Ernest Drezen, kies studon Zelazny prave elstarigas, sed kies metodon li ne sekvas. Drezen aprezas la lingvokrean verkon de Zamenhof, kiu „sukcesis solvi la problemon mondlingvan kun tia profundeco, kiun antaŭ li kaj post li elmontris nek unu esploranto".[19] Drezen ankaŭ pritraktis la sociajn ideojn de Zamenhof repuŝante de sia marksismaleninisma pozicio ĉiujn ideojn, kiuj kapablus nur fuŝi la realan komprenon de la ekzistantaj socifortoj"[20], sed samtempe konstatis realismajn poziciojn kaj eĉ opiniis, ke „kelkaj flankaj praktikaj rezultantoj el lia Dogmaro meritas aprobon kaj akcepton".[21] Hodiaŭ aliaj Zamenhof-historiografoj pli detale esploras tiujn realismajn poziciojn kritike aprezente Zamenhof kiel burĝan humaniston, Por Canko Murgin ekzemple, kiu en la lastaj jaroj surbaze de interesaj fontoj multe kontribuis al realisma Zamenhof-bildo, Zamenhof same kiel por Drezen ne estas „totala viziulo". Li pritaksas la sociajn ideojn de Zamenhof laŭ scienca historiozofio kaj kapablas partopreni la destinon de la kontribuo de Zamenhofaj verko kaj vivo al la homara progreso.

Tamen ne okazas intermikso de Zamenhofaj ideoj kun marksismo en la senco de Zelazny. Tiu ĉi asertas: „Ankaŭ markistoj-leninistoj rajtas ligi sian doktrinon kun la penso de Zamenhof metante elementojn de la doktrino de Zamenhof en sian marksisman historiozofion." Nek ekzistas neceso nek ebleco kompletigi la marksismon per Zamenhofaj pensoj kaj same estus nescience submeti al Zamenhof marksismajn pensojn. Lia klaspozicio estis tiu de burĝa demokrato kaj li meritas aprezon por ĉio, kion li kiel burĝa demokrato kontribuis siatempe al la pliriĉiĝo de la homaro scio kaj al socia progreso.

3. La heredantoj de Zamenhof

La japana revolucia esperantistino Verda Majo publikigis la 15-an de decembro 1938 alvokon „Al la tutmonda Esperantistaro". 21 jarojn post la morto de Zamenhof ŝi en sia tempo alvokis al fondo kaj formiĝo de internacia unuecfronto antifaŝista apogante sin sur spirito de Zamenhof. Ŝi skribis: „Tio estas miaj proponoj kaj petoj al vi okaze

de la naskiĝtago de nia kara gvidanto. Krom ilia realigo mi kredas, neniu alia rimedo taŭgas por memorigi ĉijaran Zamenhofan tagon."[22] Verda Majo sentis sin kune kun ĉiuj antifaŝistaj fortoj en la Esperanto-movado kiel heredanto de Zamenhof.

Murgin nomas la heredantojn de la nuntempo „La MEM-anoj, la esperantistaro el la landoj de reala socialismo, la progresemaj esperantistoj el la cetera parto de la mondo, ĉiuj pacdefendaj kaj pacamaj esperantistoj estas legitimaj heredantoj ne nur de la Lingvo Internacia, sed ankaŭ de ĉiu racia grajneto el la Zamenhof-ideologio".[23]

Hodiaŭ, kiam minacas nin nuklea milito estas necese mobilizi la tutan homaran heredaĵon de pacpensoj en la komuna batalo de tre diversaj fortoj por la sekurigo de la paco. Kiu hodiaŭ argumentas pri aŭ per Zamenhof devas senti la respondecon, partopreni tiun mobilizadon.

Zamenhof mem respondecplene kiel aliaj inventistoj – mi memorigas pri Einstein – zorgis pri tio, ke lia inventaĵo – la internacia lingvo Esperanto – estu firme ligata kun la pacpenso kaj kun la pacmovado. Mi nur memorigas pri liaj kontaktoj kun la organizinto de kelkaj mondpackongresoj Gaston Moch, al kiu li en 1905 skribis: „Nun la pacifistoj ne volas tre ligiĝi kun Esperanto, kaj la esperantistoj timas ankoraŭ tro oficiale aliĝi al la pacifistoj, sed mi estas konvinkata, ke pli aŭ malpli frue la ideoj de la esperantismo kaj pacifismo tute kunfandiĝos, ..."[24] En oktobro de la sama jaro Zamenhof akceptis la titolon de „honora membro de la Internacia Societo Esperantista por la Paco".[25]

Kiu hodiaŭ skribas pri Zamenhof, kiu hodiaŭ pretendas efiki lian testamenton unuarange devas konscii pri la spertoj de la historio, devas konscii pri liaj idealoj kaj la eblecoj de ilia efektivigado. Tre grava sperto de la internacia Esperanto-movado estas, ke ĝi nur progresas, se ĝi situas je la flanko de la fortoj de socia progreso. Nur tiamaniere estas efektivigeblaj la idealoj de Zamenhof. La Unesko-rezolucio rilate al la 100-jariĝo de Esperanto estas aktuala pruvo por tio.

4. Literaturo kaj fontoj

[1]) L. L. Zamenhof: Originala Verkaro, Eld. J. Dietterle, Leipzig, 1929, p. 390 (OV)

[2]) Fritz Wollenberg: La korektita Zamenhof, en: Paco, GDR-eldono, Berlin 1986

[3]) Walter Zelazny: Doktrino de Zamenhof, en: Ryszard Kraŝko: Zamenhof, Jerzy Leyk: Movado, Walter Zelazny: Doktrino, Versovio: PEA, 1983, p. 102

[4]) Walter Zelazny: Tezoj pri la esplorpostuloj pri la Zamenhofaj verko kaj vivo kaj ties influo en la Esperanto-movado, en: La Gezeto, Metz, numero 0 kaj 1, sept. kaj dec. 1985

(fino p. 38)

Canko Murgin

Puŝkin, Zamenhof kaj nia epoko

La 150-jara datreveno (1837–1987) ekde pereo (en duelo) de A. S. Puŝkin (1799–1837) potence altiris ankaŭ la atenton de monda esperantistaro. La unua traduko en Esperanto estis la novelo de Puŝkin „La Neĝa Blovado", kiu aperis en memstara eldono jam en la tre frua jaro 1888, en traduko de A. Grabovski. Post kelkaj jaroj sekvis la tradukoj de V. N. Devjatnin el Puŝkin: „Poltava", „Ruslano kaj Ludmila" kaj la dramo „Boris Godunov". Bedaŭrinde mi ne havas detalan bibliografion pri la tradukoj el Puŝkin-verkaro por citi pli detale, sed mi diros, ke jam pli ol duonjarcento la esperantistaro havas en siaj manoj la versan romanon „Eŭgen Onegin", en traduko de N. Nekrasov. Multaj versaĵoj de Puŝkin estas tradukitaj en Esperanto kaj senĉese represataj en E.-gazetaro kaj legolibroj, krestomatioj, diversaŭtoraj poemkolektoj. Kaj ĉio ĉi estas farita pro bonvolemo, pro altruismo nur por riĉigi la tradukan literaturon en Esperanto. De unu flanko tio montras la vivantecon de Esperanto kaj de alia flanko ĝi indikas la senmortecon de Puŝkin-verkaro eĉ en traduka sfero. Kaj tamen ne tio estas la temo de mia artikolo.

Por la esperantistaro ekzistas ankaŭ aliaj motivoj, ligitaj kun la vivo kaj verkaro de A. S. Puŝkin, de lingva, ideologia kaj socipolitika karaktero.

Fine de la XVIII kaj komence de la XIX jarcentoj en Rusio okazis konsiderinda lingva evento. Oni ŝanĝis la literaturan lingvon de Rusio, enkondukante la novrusan parolatan lingvon kaj forlasante la malnovrusan lingvon, kiun oni delonge ĉesis paroli kaj ĉesis komplete kompreni. Evidente per nuligo de tiu malkongruo inter la parolata kaj literatura lingvoj oni kreis bonajn kondiĉojn por salto de rusa kulturo al pli alta nivelo.

Tiun ŝanĝon, sen speciala intenco, iniciatis D. I. Fonvizin (1744/1745–1792), energie kaj kun granda inspiro daŭrigis tiudirekte N. M. Karamzin (1766–1826) kaj la eterna A. S. Puŝkin faris la grandan parton el la „konkluda" laboro. Krome li poluris la novan rusan literaturan lingvon en krea ekstazo, verkante grandamplekse nevelkeblajn poezion kaj prozon, kiuj ankaŭ nun, same kiel iam, estas soife serĉataj de la ruslingva legantaro. La koncerna proceso pri starigo kaj sukcesa enkonduko de nova literatura lingvo estas bone esplorita.

D-ro Zamenhof konis perfekte tiun lingvan eventon en la historio de rusaj lingvo kaj literaturo kaj li eltiris kelkan, tre utilan, sperton pri sia lingvoplanado dum la kreo de Lingvo Internacia Esperanto.

Bedaŭrinde, nek esperantologoj nek esperantistaj interlingvistoj atentis ĝis nun pri la edifo kaj instruo el la rezultoj de tiu lingvoŝanĝa proceso en Rusio al la pensmaniero de la estonta „iniciatoro" de Lingvo Internacia Esperanto. Vere tiaj lingvoŝanĝaj procesoj okazis plurloke kaj en diversaj epokoj, sed tiu en Rusio konkrete influis al gimnaziano – amatora planlingvisto. Sendube Zamenhof havis lingvistan kaj verkistan talenton, kiu vekiĝis kaj rapide kreskis dum la kvinjaro 1874–1879. En 1905 D-ro Zamenhof konfesis, ke la hejma lingvo en la familio de Marko Zamenhof estis la rusa lingvo kaj ke li mem ekde junaĝo revis fariĝi granda rusa poeto[1]. D-ro Zamenhof finis la II-an Filologian Gimnazion en Varsovio, tial li havis solidajn konojn kaj pri lingvistiko kaj pri belliteraturo. Do li ne estis amatoro en prilingvaj aferoj. Krom diplomo pri matura ekzameno en la gimnazio Zamenhof ricevis ankaŭ favoran referencon, ke li perfekte tradukas el la malnovgreka lingvo.[2] Ne malpli grava estas la fakto, ke Zamenhof-familio havis tre riĉan hejman bibliotekon kun verkoj pri poezio kaj prozo, pri lingvistiko kaj historio de la monda belliteraturo.

La komparaj esploroj, ĉu parte ĉu komplete, inter Esperanto kaj germana lingvo (de D-ro Detlev Blanke[3]), kaj inter Esperanto kaj rusa lingvo (de Boris Kolker[4]) estas imitendaj por pluaj similaj komparoj inter Esperanto kaj la ceteraj naciaj lingvoj. Tiu estas unu el la metodoj por malkaŝi detale la genealogion de Esperanto konekse kun la naciaj lingvoj. Sed samtempe oni devas organizi esplorojn pri la genealogio de Esperanto konekse kun la lingvoprojekto „Langue internationale ..." („Lingvo Internacia ...") de franca planlingvisto E. Courtonne (pri kiu aperis lernolibro en 1875, 1881–?, 1885 kaj 1887). Tiu projekto absorbis en si multajn atingaĵojn (kun kelkaj gravaj esceptoj) de antaŭaj kontribuintoj al praktika solvo pri internacilingva problemo. Petro Stojan skizis planon pri similaj studoj[5], sed li ne trovis disĉiplojn por daŭrigo de tiuj esploroj. Eble

malgrandan escepton faras nur Bernard Golden, kiu antaŭnelonge kontribuis fragmente pri Esperanto kaj Volapuko[6].

Bedaŭrinde D-ro Zamenhof nenion lasis al ni por kompreni en kia grado li uzis la atingaĵojn de siaj antaŭuloj en aplika planlingvistiko. Kiel la triopo de Fonvizin – Karamzin – Puŝkin sukcesis enkonduki la parolatan lingvon por literatura lingvo de Rusio en daŭro de duonjarcento, tiel alia triopo de Courtonne – Schleyer – Zamenhof sukcesis per komunaj fortoj krei kaj enkonduki la Lingvon Internacian Esperanto kaj en la sfero de internaciaj rilatoj, trovi daŭran socian apogon en la personeco de internacia Esperanto-movado kaj fondi en monda skalo originalan kaj tradukan literaturon en Esperanto. Ne estas kulpo de esperantistaro, ke la plej ampleksaj organizoj de la popoloj – la ŝtatoj – ankoraŭ staras grandparte kiel flankaj observantoj. Tamen la rezolucioj de UNESKO (1954, 1985) kuraĝigas nin.[7]

Oni konas la historion de Esperantaj lingvo, movado, literaturo ekde aperigo de Unua Libro („Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro", por rusoj) de julio 1887, sed oni ne konas la historion de Esperanta embriologio. Tiu manko estas ne plu prokrastebla, nek preterlasenda. Certe la temo estos tre temporaba en la komenco, sed finfine dank' al la ricevotaj rezultoj la historio de Lingvo Internacia kaj ties movado kaj literaturo fariĝos efektive kompleta, el ĉiu vidpunkto. Nur post kiam ni povos mencii kaj aprezi la apartajn kontribuojn de dekoj aŭ eble de cento da aŭtoroj, ni havos precizan bildon pri la preparlaboroj kaj pri la kreo mem de Esperanta embrio. Apenaŭ tiam la homaro scios, ke la kontribuoj de filozofoj, poetoj, verkistoj kaj eĉ de talentaj laikoj per komuna laborado, en daŭro de pli ol 250 jaroj, sukcesis konstrui vivipovan embrion de planlingva sistemo, kiu – lanĉita en la sferon de internaciaj rilatoj – kapablos ekĝermi, funkciadi, perfektiĝi kaj senmanke servi al la homaj individuoj, al nacioj, etnoj, al la tuta homaro.



Ke tiu kampo de esploro estas atentinda, montras ankaŭ tio, ke en la hejma biblioteko de D-ro Zamenhof estis aro da libroj pri „artefaritaj" lingvoj. Pri tio tute konkrete rememoras Leo Belmont (vera nomo: Leopold Blumenthal – 1865–1941), jurnalisto, poeto, verkisto, kiu pruntepreniS tiajn verkojn el la hejma biblioteko de D-ro Zamenhof, jam aŭtune 1887, por verki artikolojn[8]. Petro Stojan (1884–1962) kompletigas, ke D-ro Zamenhof povis legi librojn pri „artefaritaj" lingvoj en la grandaj bibliotekoj de Moskvo kaj Varsovio[9]. El ili unu tre interesa, ĉar ĝi estis eldonita en Rusio kaj restis nekonata por la okcideneŭropanoj kaj diversaj volumoj de la Granda Universala Enciklopedio (en franca lingvo) kun resumoj pri apartaj „artefaritaj" lingvoj.

D-ro Zamenhof neniam menciis ion pri uzo de rezultoj kaj de sperto el siaj antaŭuloj. Tamen la pli viglaj, en la sciemo, esperantistoj interesiĝis, tial N. A. Borovko (1863–1913) demandis (1895) D-ron Zamenhof kaj tiu respondis per longa letero, sed nur pri siaj infan- kaj jun-aĝaj rezonadoj. D-ro Zamenhof, tamen, nenion esencan diris, kio okazis poste, dum li serioze okupiĝis por perfekte finpretigi vitalan embrion de Lingvo Internacia Esperanto antaŭ la aperigo de la Unua Libro („Lingvo Internacia. Antaŭparolo kaj Plena Lernolibro", por rusoj) en julio 1887.

D-ro Zamenhof estis profunde inspirita, ekde junaĝo, de la heroa vivo kaj progresema verkaro de A. S. Puŝkin. Lia konfeso en 1905 (Mi deziris fariĝi granda rusa poeto!) tute konkrete indikas pri la potenca influo de Puŝkin sur la intencojn, klopodojn kaj celadojn de D-ro Zamenhof al servo de la tuta homaro. La gimnaziano Zamenhof estis sorĉita de la ideo pri unuigo de la homaro, esprimita de Puŝkin en 1834: „Ne malofte li parolis pri epoko ne malproksima, kiam la popoloj, forgesante malkonkordojn unuiĝos en unu grandan familion"[11].

Kvindek jarojn post la morto de Puŝkin (1837) D-ro Zamenhof elpaŝis antaŭ la monda publiko per sia projekto por Lingvo Internacia (1887). La starigo de „Internacia Konstanta Pacifista Sidejo"[12] en Berno, 1891 (Svislando) inspiris D-ron Zamenhof al krea laboro kaj li verkis poemon „La Espero" (1891). Tiu poemo poste fariĝis himno de internacia esperantistaro. Ĝi vokas la homaron: „Ne al glavo sangon soifanta!" Tamen la esenca kerno estas di-



finita en la versoj:

„. . . komprenante unu la alian
la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian"[13].

Per tiu versa pledo por unuigo de la homaro D-ro Zamenhof sin vicigis en la longan batal-kolonon (ekde la Granda Franca Burĝa Revolucio – 1789–1794) de poetoj, verkistoj, filozofoj kaj politikistoj, kiuj dum jarcentoj esprimis sian firman prognozon, profetaĵon aŭ esperon.

Pro tiu penso D-ro Zamenhof estis riproĉe kritikata (pro utopiismo, kvankam flugilhava, vigla kaj esperiga) kaj samtempe ne malpli laŭdata kaj eĉ aplaŭdata (pro sincera pacifismo, kvankam degradita) pro persekutoj kaj malfavoraj cirkonstancoj, post malvenko de Pariza Komuno (1871).

Tamen . . . kaj tamen **venis rekono al la defendantoj pri unuigo de la homaro en unu grandan rondon familian**. Ĝi venis subite kaj surprizis nin ĉiujn. La rekono venis el tre alta instanco. Ĝi estas adresita rekte al la senmorta poeto de Rusio (Puŝkin), sed samtempe kaj samgrade ĝi validas ankaŭ por D-ro Zamenhof.

La ministro pri Kulturo de USSR – V. G. Zaĥarov, en sia malferma parolado ĉe la memorkunveno pri 150-jara datreveno ekde pereo de A. S. Puŝkin, deĉifris al ni – tute oficiale – kion signifas la tiom milde kaj melodie prikantita unuiĝo de la homaro en unu grandan rondon familian. Ministro Zaĥarov diris: „Sistemo, kiu en disputo kun poetoj de tia rango, alkuras al pistolo kiel lasta argumento, jam komencas disputon kun la popolo mem. Sekve, tiu sistemo subskribas propramane sian historian senfundamentecon. Ĝuste post ok jardekoj, tio estis decideme konfirmita, en tiu tago de oktobro (1837 + 80 = 1917, klarigo mia: C. M.), kiam **la popoloj** (de Rusio, k.m.: C. M.), **forgesante la malkonkordojn, unuiĝis en**

unikan familion"[14]. Tiu unueca familio de sovetaj socialismaj respublikoj elstaras per sia aktiva partopreno por savi la homaron el kompleta pereo. Neniu, absolute neniu, rajtas subtaksi, forgesi aŭ prisilenti, ke **la unua leĝo** de la novtipa ŝtatpotenco estis **la Dekreto por Paco**[15].
Post la Napoleon-militoj sekvis Packontrakto de Vieno, per kiu Francio estis punita (1815). Iom poste, en la sama jaro, la venkintoj kontraŭ Francio subskribis apartan kontrakton pri starigo de reakciula „Sankta Unio" (1815), al kiu aliĝis multaj ŝtatoj de Eŭropo (sed la ĉefroluloj estis Aŭstrio, Rusio, Prusio), por gardi siajn feŭdo-aristokratiajn privilegiojn kaj per komunaj fortoj batali kontraŭ liberalaj kaj revoluciaj movadoj kaj organizoj. La franca poeto Pierre-Jean Béranger (1780 ĝis 1857) malbene damnis la sociajn bremsulojn per sia klasika poemo-satiro „La Sainte-Alliance barbaresque"[16] („La Sankta Unio de Barbaroj"), 1816.
Kontraŭ la triumfo de barbaroj, kontraŭ la politike bremsantaj ŝtat-fortoj aperis esperiga rezisto. La unuaj pacifismaj organizoj estis fonditaj spontane en la komenco de la XIX-a jarcento, en Novjorko (1815), en Londono (1816), en Ĝenevo (1830), k.a. Fine, en tiu etapo de socia disvolviĝo, aperis primitiva, sed konkrete organizita agado kontraŭ la milito, por paco eterna inter ŝtatoj, nacioj, etnoj.
Aŭtune de 1818 Béranger pledis per nova poemo „La Sainte Alliance des peuples"[17] („La Sankta Unio de la Popoloj") pri starigo de internacia tolerema kaj progresema sociforto por kontraŭstari al la arkaisma, eksmoda, bremsula „Sankta Unio de Barbaroj" (de 1815). Tiu poemo (de 1818), same kiel la plejparto de Béranger-poemoj havis popularan melodion kaj estis publike kantata de la popolamasoj ne nur en Francio kaj en la latinidaj landoj, sed ankaŭ en la cetera mondparto. La laŭvica eldono (1910) de tiu kanto (teksto kaj muziko) estis tre fervore kaj tre favore recenzita en la internacia esperantista organo „Lingvo Internacia": „Gravega grandampleksa verko. Kvankam la vortoj estas francaj, **ĝi povas esti konsiderata kiel Esperanta kanto, pro la ideoj tie esprimitaj**"[18] (substreko mia: C. M.). Estas notinde, ke Karlo Marks (1818–1883) tre alte aprezis la mobilizantan soci-rolon de tiu Béranger-poemo (kanto), en apelo al la Provizora Registaro de Francio (1848.02.28):
„Honoron kaj gloron al vi francoj! Vi metis la fundamenton de ,Unio de la Popoloj', tiel perfekte prikantita de via senmorta Béranger"[19].
Pasis jaroj, strikoj kaj tumultoj, pasis militoj kaj ribeloj, pasis revolucioj, kiuj renversis reĝimojn arkaismajn, mezepokajn. Post la Dua Mondmilito la socialismaj landoj fondis Union de Ŝtatoj en Varsovia Kontrakto (1955). Parolante pri tiu Unio de Ŝtatoj en Varsovia Kontrakto, M. S. Gorbaĉov diris en aprilo 1985: „La historio ne konas tian Union, kia estas la nia, en kiu la rilatoj sin apogas al plena egaleco kaj kamarada interhelpo de suverenaj ŝtatoj. Unio, kiu – en plena senco de la vorto – estas **,Unio de la Popoloj'. Unio, kiu neniun minacas kaj komplete estas dediĉita al defendo de la paco. Ni konstruas niajn rilatojn kun la landoj de alia soci-sistemo sur la principo de paca kunekzistado – la unika racia fundamento, precipe en la kernoarmila jarcento**"[20] (substreko mia: C. M.).
Multe pli ol cent ŝtatoj de la Tria Mondo estas pacpolitikaj. Nur kelkaj el ili estas dungitaj de monda imperiismo por servi al Marso, sed ni esperu, ke ties gvidantoj komprenos la komplikecon en la internaciaj rilatoj kaj ili trovos decan lokon por sia lando inter la porpaca mondo.
Dekkelkaj altevoluintaj kapitalismaj landoj, kun siaj transnaciaj monopoloj kaj bankoj, kaj fortoj por rapida reago, sufokas per ŝuldoj, ekspluatas laŭ mezepoka maniero kaj la Trian Mondon kaj siajn proprajn popolojn, kaj foje eĉ punas aliajn popolojn per okupacio, per aviadilaj bombadoj. Militarismaj rondoj agas konspire eĉ preter sialandaj parlamentoj. Kompreneble tiuj ekscesoj kaj malnovaj pens kaj ag- manieroj ne plu estas utilaj eĉ al ili mem.
La eksterma kapacito de nuntempaj amasmortigiloj estas tiom granda kaj ampleksa, ke ĉiu normala homo komprenas kaj sentas la nenigan minacon kontraŭ sia lando kaj kontraŭ la tuta homaro. Kaj la respondo al la demando: Ĉu vivi komune aŭ perei kune naskis la novan pensmanieron: Evitu kaj fine malpermesu la militon per komuna klopodo en traktado por certigi decan kunekzistadon por ĉiuj nacioj, etnoj, por la tuta homaro.

Notoj

1) Waringhien, G. (red.): Leteroj de L. L. Zamenhof, vol. I, eld. de SAT, Paris, 1948, p. 111.
2) Holzhaus, Adolf: Doktoro kaj Lingvo Esperanto, Helsinki, 1966–1970, p. 149.
3) Blanke, Detlev: Thesen zur Dissertation B, p. 57–61, 55–56, Der Esperantist, XXI, 131 (3), majo-junio 1985, Berlino, GDR.
4) Kolker, B. G.: Vklad russkogo jezika v formirovanie i razvitie Esperanto, Moskva, 1985; Influo de Rusa Lingvo al Verba Sistemo de Esperanto, p. 19–22, Horizonto de Soveta Litovio, oka kajero, Vilno, 1985.
5) Stojan, Petro: Deveno kaj la Vivo de Esperanto, eld. Flandra E-Instituto, 1953, p. 37–40.
6) Oljanov, Violin (red.): Interlingvistiko – Esperantologio, Sofio, 1985, p. 97–102, 103–108, 112–117.
7) Bulgara Esperantisto, LV, 1, januaro 1986, p. 2; Der Esperantist, XXII, 136 (2), marto-aprilo 1986, Berlino GDR, p. 35–38.
8) Belmont, Leo: Rememoroj pri Zamenhof, p. 25–28, Ora Libro 1887–1937, p. 28.
9) Noto 5, p. 38.
10) Dietterle, Joh. (red.): L. L. Zamenhof – Originala Verkaro, Leipzig, 1929, p. 417 ĝis 422.
11) Puŝkin, A. S.: Versaĵoj (kaj) Poemoj, en rusa lingvo, Moskva, 1984, p. 243.
12) Nilsson, Anna: Datoj kaj Faktoj pri la Paca Movado, II eldono, Stokholmo, 1926.
13) Noto 10, p. 586.
14) TASS: Nia Nuntempulo – Puŝkin, ĵurnalo Pravda, N-ro 42 (25 029), la 11-an de februaro 1987, Moskvo, p. 1, 3.
15) Dekreto por la Paco, jurnalo Izvestija, en rusa lingvo, N-ro 208, la 27-an de oktobro 1917, malnovstila kalendaro, Petrograd. Murgin, Canko: Lumturo de Paco kaj Internacia Amikeco, p. 12–13, Paco, XXIX, 6, novembro-decembro 1982, Sofio
16) Béranger, Pierre-Jean: Œuvres Choisies, edition du Progrès, Moskvo, 1980, p. 80–81.
17) Noto 16, p. 98–99.
18) Lingvo Internacia, XV, 7, julio 1910, p. 334: La Sainte Alliance de peuples, vortoj de Béranger, muziko de Léon Moitié.
19) Marks, K. (kaj) Fr. Engels: Al la civitanoj, membroj de la Provizora Registaro de Franca Respubliko, Bruselo, la 28-an de februaro 1848, en Verkaro, bulgarlingva, vol. 4, tradukita el dua ruslingva eldono, Sofio, 1957, p. 532–533.
20) Gorbaĉov, Mihail S.: Parolado . . ., ĵurnalo Rabotniĉesko delo, LIX, 117, la 27-an de aprilo 1985, Sofio, en bulgara lingvo.

(daŭrigo de p. 14)

Humanismo (1400–ĉ. 1517) aperas kun kelkaj pecoj i.a. de Johannes de Tepl, Johannes Pauli, Sebastian Brant kaj Erasmus de Rotterdam. La Reformacio (1517–1620) havas apartan signifon. Tie mi trovas nomojn kiel Martin Luther, Thomas Müntzer (tro malmulte, cetere), Ulrich von Hutten, Hans Sachs, Jacob Böhme, k.a. Finas la libron la Baroko (1620–1700) kun kontribuoj i.a. de Martin Opitz, Paul Fleming, Andreas Gryphius, H. J. Chr. von Grimmelshausen, Gottfried Wilhelm Leibnitz kaj Johann Christian Günther.
La libro estas zorge redaktita. Ĉiu epoko havas mallongan literatur-historion. Bonvenaj estus informoj pri la diversaj aŭtoroj. Pli ol 30 reproduktaĵoj de malnovaj manuskriptoj, lignogravuraĵoj kaj kuprogravuraĵoj tre plaĉe kompletigas la valoran volumon. Tre gratulinda eldonaĵo.

D. Blanke

(daŭrigo de p. 33)

perdus sian pure anglan karakteron, kiun ĝi devas havi. Tial la nomojn en ĉi tiu romano ne eblas traduki. La personajn nomojn (Petro, Paŭlo, Elizabeta, Maria) oni ordinare tradukas, ĉefe en la porinfanaj verkoj la alnomojn necesas traduki ĉiam. En la Trezor-insulo far Stevenson la nomon de pirato Long John Silver (laŭvorte: Longa Johano Arĝento) la ĉeĥoj tradukis en la eldono por plenkreskuloj Longa John Silver, en la eldono por geknaboj Longa Johano Silver, ĉar „Longa" estas alnomo de la pirato ricevita de kamaradoj, dum „Silver" estas lia angla familia nomo. Se la nomo ne estas tiel mondfama kiel Pickwick, Silver, Don Quijote k.s., eblas traduki ĝin donante al ĝi aspekton de la originala lingvo (komparu: sinjoro Skarabo – sinjoro Skarabov – sinjoro Skarabowski – sinjoro Skarabeĉek – sinjoro Scarabeau – sinjoro Scarrabow – sinjoro Scarabini ktp.). Tiun artifikon uzas tradukantoj de bonhumoraj verkoj. c) La dialektojn aperintajn en la originalo ne eblas simple traduki per la dialektoj de la traduklingvo. Se la sudfrancan dialekton oni tradukus en la ĉeĥan per la sudbohemia dialekto, la medio de la rakonto estus subkonscie transportita el la suda Francio al la suda Bohemio kaj la verko perdus sian nacian karakteron. En Esperanton oni ne povas traduki tian dialekton per Ido, ĉar tiamaniere la sudfrancoj fariĝus idistoj. Pro la samaj kaŭzoj ne eblas traduki la ukrainan lingvon en ruslingvaj romanoj per Ido aŭ Interlingua (ĉu Interlingua traduku la ukrainan per Esperanto?!). Necesas serĉi neŭtralajn rimedojn, kiuj nur nuancigas la tekston folklore, sed ne forprenas ĝian nacian karakteron („Oĉjo, venu niadomen, ni festenos porkobuĉon!") nek faros la tekston malfacile komprenebla. La samo validas ankaŭ pri arkaisma lingvo.

8. Konkludo

Ĉi tiu artikolo ne elĉerpis la tutan problemaron de traduko. La aŭtoro nur intencis montri, ke la tradukado postulas multe pli ol solan regadon de la traduklingvo, pli ol nuran stilistikan talenton. Li volas instigi la tradukemulojn al diligenta studado de la literaturo pri tradukarto.

(daŭrigo de p. 29)

postkuris, kvankam la kuracisto malpermesis al mi ĉiun ajn fizikan streĉadon. La hundeto estis bona paŝofaranto. Sendube mi estus povinta gajni kun ĝi maratonon. Kompreneble mi ne kapablis influi direkton kaj rapidecon. Ni kuregis tra la stratoj kvazaŭ fantomo. Fine post du kaj duona horoj Teofilo lasis sin persvadi, por preni direkton al sia hejmo.
Al morto pli proksima ol al vivo, mi suprenŝanceliĝis la ŝtuparon. Johano, ŝtorme salutita de Teofilo, jam ĉeestis. La virino de sia vivo ne estis veninta. „Nu, ĉu mi estas promesinta tro multe?" li demandis min. „Ĉu ĝi ne estas ĉarma hundeto?"
Sole al la ĉeesto de la ĉarma besto Johano povis danki, ke li je tiu vespero ne fariĝis interesa paciento en la kirurgia kliniko. El tio oni vidis, ke garda hundo kiel Teofilo estas utila besto.

Trad. Manfred Arnold

*) la konata fabelo-figuro.

(daŭrigo de p. 31)

li skribis sian dikan versaĵvolumon en la Bognerstrateto.
Kiam li fianĉiĝis, lia fianĉino komence amuziĝis pri lia mekado; poste li ekhontis kaj ruĝiĝis tiel ofte, kiel li faris ĝin. Dum la edzeco li bezonis monatojn, por dekutimiĝi almenaŭ de la publika mekado. Hejme en sia familiara rondo li ankoraŭ hodiaŭ mekadas.

El Roda Roda, Der Mann mit der roten Weste, Berlin/Weimar 1970, p. 20–27
Trad. Wolfgang Villain

12) Nikola Aleksiev: La demokratismo de Zamenhof, en: Paco 6/1976, Sofio, p. 11
13) Huang Hua: Granda idealo kaj granda praktiko, Salutvortoj al la inaŭguro de la 71-a UK, en: El Popola Ĉinio, Pekino, 11/86, p. 3
14) OV, p. 230
15) Enciklopedio de Esperanto, I. volumo, redaktis L. Kökeny kaj V. Bleier, Represo de la unua eldono, Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1979, p. 579
16) Gaston Waringhien: 1887 kaj la sekvo, la laguna – Rotterdam: La Stafeto/FK 1980, p. 75
17) Walter Żelazny, Doktrino . . ., p. 104
18) Walter Żelazny, Doktrino . . ., p. 101
19) Walter Żelazny, Tezoj . . ., p. 13
20) Ernest Drezen: Zamenhof, en: Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado, eldonis: Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1978, redaktis: Detlev Blanke, p. 134
22) Verkoj de Verda Majo, Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1982, p. 387–394
23) Canko Murgin: Progresemaj momentoj en la ideologio de L. L. Zamenhof, Kolekto de studoj, Bulgara Esperantista Asocio, Sofio, 1985, p. 15
24) OV, p. 436
25) OV, p. 437

(daŭrigo de p. 35

5) Istvan Nagy: Konferenci, simpozii aŭ . . . agi?, en: Budapeŝta Informilo, Budapest, 10/86, p. 11
6) Imre Pethes: Ni vivu en paco, en: Paco 3/85, Sofio, p. 2
7) Canko Murgin: Zamenhof – de pacifisto al pacdefendanto, en: Paco 6/1980, Sofio, p. 9
8) Humphrey Tonkin: Interkompreniĝo, paco, evoluo – inaŭgura Parolado, 71-a Universala Kongreso de Esperanto Pekino, en: Budapeŝta informilo, Budapest, 10/86, p. 2–3
9) a: Funkciulo de UN ricevis Premion Zamenhof, en: Heroldo de Esperanto, Bruxelles, n-ro 4–5, 20 marto 1986, p. 2
9) b: Kp. „Esperanto" 1/1987
10) Strategiaj demandoj de la Esperanto-Komunumo: 1-a Internacia Simpozio, 1984, Versovio: Pola Esperanto-Asocio, 1985
11) Ludovikito (= I. Kanzi): Senlegenda biografio de L. L. Zamenhof, Tokio, 1982, p. 43

Kien skribi:

Honora prezidanto: Nikola Aleksiev, str. Nezabravke 1, vh. 2, 1113 Sofia, Bulgario
Prezidanto: D-ro Imre Pethés, H - 1144 Budapest, Füredi ut. 11/A VI. 26, Hungario
Vicprezidantoj: William Gilbert, 30 rue Croix-Montoire, 37100 Tours, Francio
Claude Glady, 36 Marne st. B - 1030, Brüssel, Belgio
Magomet Isaev, prosp. Kalinina 14, Moskva K-9, USSR
Ĝenerala sekretario: Clément Tholet, 54 Rue des Hineux, 4400 Herstal, Belgio
Sekretarioj: Nanba Syôzi, Huruiti 3-13-26 Zyôto-ku, Osaka, Japanio
Vasja Cvetkova, kompl. „Mladost" bl. 16, vh. 2, ap. 36, et 7, 1150 Sofia, Bulgario
Ĉefredaktoro: Violin Oljanov, Emil Markov, PK 66, 1404 Sofia, Bulgario
Centra kasisto: (por la okcidentaj landoj) Pierre Jouvin, 14, rue Tjier, 76120 Grand Quevilly, Francio (p. ĝ. k. – CCR-Rouen, 102-45 P).

Atentigo:

La Redakcio atendas kontribuaĵojn de pacamikoj el la tuta mondo. Ju pli da kunlaborantoj, des pli varia kaj interesa revuo. Pro la nesufiĉa spaco la materialoj ne estu pli longaj ol 60 tajpitaj linioj, nur en gravaj okazoj ĝis 90. Ili estu prefere tajpitaj aŭ tre klare mane skribitaj kun sufiĉa interlinia spaco kaj marĝeno, sur grandaj folioj de kancelaria formato. La Redakcio akceptas nur originalajn (unuajn) ekzemplerojn de la tajpaĵo. Kopioj estas lasataj sen konsidero. Por ke la materialo atingu la Redakcion ĝustatempe, ĝi devas esti je ĝia dispono ĝis la 10-a de ĉiu para monato. La Redakcio ne resendas neuzitajn materialojn. Skribu klare viajn nomojn kaj adresojn en nacia lingvo! Ĉion sendu al la adreso de la Redakcio „Paco" – 1000 Sofia, PK 66, Bulgario.

Pri la aperado de „Paco"

La internacia revuo „Paco", organo de la Mondpaca Esperantista Movado (MEM)


aperadas en du serioj. La oficiala serio aperas en Sofio per 6 numeroj, po 16 paĝoj. Krome unuopaj landaj sekcioj de MEM eldonas landajn kajerojn (ofte ekz. ČSSR, Japanio, ĉiujare GDR).

Pri la enhavo de 6-kajera oficiala serio respondecas redakta komitato, al kiu apartenas: Violin Oljanov (Bulgario) – ĉefredaktoro, Veneta Baleva (Bulgario) – redaktoro, membroj de la redakta komitato: d-ro Detlev Blanke (GDR), William Gilbert (Francio), Kimiaki Kurita (Japanio), Nguyen Hai Trung (Vjetnamio).

Tiun ĉi numeron redaktis d-ro Detlev Blanke, Berlin (GDR).

Kie aboni:

Aŭstralio: F-ino Joice Turner, 19 Wandal Road, Rockhampton, 4700
Aŭstrio: Ernst Quietensky, Pappenheimgasse 70/3/12, A - 1200 Wien, Aŭ S. 130
Belgio: Claude Glady, 36 Marne str. 1030 Bruxelles, B. Fr. 360
Berlino Okcidenta: Roland Schnell, Mökkernstr. 71, D - 1000, Berlin 61 (Poŝtĉekkonto Stgt 137769-701) DM 24
Brazilo: F-ino Elma do Nascimento, str. D. Claudina Nr. 100, apt. 402 - RIO DE JANEIRO, RJ-CEP 20 721 Cr. $ 65
Britio: Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresby, Great Grimsby, South Humberside DN 36 5RT £ 4
Bulgario: Bulgara MEM-komitato bulv. Ĥristo Botev 97, 1303 Sofia Lv. 3
Ĉeĥoslovakio: PNS Vinohradska 46, 12043 Praha 2 Kronoj 46,20
Por la kromaj (naciaj) numeroj: ČES Jilska 10, 11000 Praha I Kronoj 16
Danlando: Egon Starup, Brovaenget 26, DK - 2700 Kobenhavn BRN D. Kr. 50
F. R. Germanio: Roland H. Hegen, Iggelbach, Schlossgasse 30, D - 6738 Elmstein 2, DM 24
Finnlando: Erkki Järvinen, Ukonkivenpolku 2-1-73, 01610 Vantaa 61 Fin. M. 42
Francio: Joseph Barre, 10 rue du Sénat, 44300 Nentes Fr. Fr. 60
GDR: a) Post- und Fernmeldeamt Falkenberg, Zentralvertrieb d. PZV, 7900 Falkenberg, Uebigauer Str. 4; 3,60 M
b) por la landaj eldonoj: Esperanto-Asocio en KL de GDR, O.-Nuschke-Str. 1, 1080 Berlin
Hispanio: Luis Serrano Perez, Font Nova 32, Sabadell (Barcelona)
Italio: Riccardo Pinori, V. A. Ghisleri 9/15, I - 00176 Roma (p. ĝ. k. 64882004).
Japanio: Syôzi Nanba, Huruiti 3-13-26, Zyôtô-ku, Osaka, 536 (p. ĉ. k. Osaka 7-19235)
Kanado: Richard Piper, 20 Millar St. Hull, Quebec, J8Y 3N7 K $ 12
Kolombio: S-ino Calvo de Feijoo Leonor, K22 Nr. 34–12, P. 2. Bogota
Kubo: Pac-sekcio de Kuba E-Asocio, PK 2018, Habana 2
Nederlando: S-ino J. Vries-van Leeuwn, Johan Vermeerstr. 32, NL - 1741 K. K. Schagen (p. ĝ. k. 5569309) Gld. 25
Norvegio: Olaf Reiersøl, Torodveien 109, N 3135 Torod
Pollando: RUCH-WARSZAWA
Portugalio: Caeiro de Sousa, rue Aguiar 97, 2830 Barreiro Escudo 460
Rumanio: Abonu ĉe la poŝtoficejo: vidu „Catalogul presei externe", rubrica „PR Bulgaria"
Vjetnamio: Vjetnama Pacdefenda E-Asocio, 105 A, Quan Thanh, Hanoi
Sovetunio: 103885 GSP, Moskva k-9, prosp. Kalinina 14, ASE Rubloj 1,80
Svedio: Tomas Jansson, Döbelnsgatan 24, S - 75223, Uppsala
Svislando: Otto Walder, Esperantoweg, CH - 8590 Romanshorn (p. ĉ. k. 80-12139), Sv. Fr. 14,50
Usono: Bern Wheel, 834 Wenonah Ave. Oak Park IL, 60304 $ 8
Centra kasisto (por la okcidentaj landoj): Pierre Jouvin, 14 rue Tjiers, 76120 Grand Quevilly, Francio (p. ĝ. k. CCR-Rouen 102-45 P).



Soveta Unio

Dmitrij Lisenko, str. Lenina 7-4, **404 130 Volŝkij**, Volgograda reg., dez. kor. tutmonde

Vladimir Girba, **279 800 Floreŝti**, P. K. 10, dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.

Leo Teder, Nômme sovhoos **203622 Kilingi-Nômme**, Estonio, dez. kor. pri kolektado, kol. pm, bk, kalendarojn

EGLI-ano FD de UEA pri goo tutmonde serĉas kontaktojn kun esp. ŝatantaj goon: V. Kulikov, **644119 Omsk**, Lukaŝeviĉa 23-178

Membroj de Volgograda Esperanto-Klubo „Rado" serĉas geamikojn tutmonde: E-klubo „Rado", str. Ĉujkova 65, Molodjojnyj centr. ZKŜ. **Volgograd**

Mezlernejaj abiturientoj (17j. junulinoj) dez. kor. tutmonde:
– Riina Raus, 202020 Kohtla-Järve 5, O. Milderi 12–10
– Marju Uustalu, 202020 Kohtla-Järve 14, Kosmonautide pr. 21–39
– Heli Hanson, 202020 Kohtla-Järve 3, Kalevi 16–83
– Ulvi Gromova, 202020 Kohtla-Järve 4, Jaama 32–7
– Alina Sokolova, 202020 Kohtla-Järve 3, Komsomoli 30–53
– Ene Kurvits, 202020 Kohtla-Järve 8, Katse 5–49
– Jaana Lõhmus, 202020 Kohtla-Järve 3, Komsomoli 33–74

Lernantoj de mezlernejo, 12–15j., dez. kor. kun samaĝaj lernejanoj tutmonde pri paco, turismo, arto, kol. bk: Klubo internacia amikeco – E-rondeto, s-ino Irina Ĉerkasova, **410017 Saratov**, pl. Frunze 1a, mezlernejo N 62

Studentino, 18j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Lilija Čepukaitytė, **235250 Litovio**, Pasvalys, Užupio 17

18–40j. membroj de E-Klubo „MATENO" dez. kor. tutmonde pri E-kulturo, literaturo instruado, movadaj kaj pacproblemoj. Skribu al: E-klubo „MATENO", **626400 Tjumenskaja** obl., Surgut, glavpoŝtamt, ab. ja. 39

Lernantino, komencantino dez. kor. kun 15–18j. geknaboj: Aari Ounap, **Viljandi 202900**, Sostra 2

Junulo dez. kor. tutmonde, kol. stereodiapos bk-formate: Ain Paavo, **202020 Kohtla-Järve**, Peapostkontor, pk. 21, Estonio

Komencanto, 23j., dez. kor. tutmonde pri kino, muziko, kuirreceptoj, moderna kaj antikva historio, literaturo, kol. bk: Oleg A. Demjaŝev, Nova Urbo, 4/08-127, Breĵnev, **423819 Tartario**

Serĉas seriozan partneron por interŝanĝi kol. bk, E-revuojn. Respondo garantiata. EVDR Ŝepuraitis, **232038 Vilnius**, A/D 727, ĵurnalisto.

Laboristo, 29j., dez. kor. tutmonde: Leonid Budarin, Ĥakurate 636/28, **Majkop 352721**

Elena Ŝlykova, **390007 Razan**, Daŝĉki I (Roŝĉa) d. 101a, (23j.), dez. kor. tutmonde pri literaturo, muziko, fotografio, kol. bk, kalendarojn

Gejunuloj de
– E-Klubo, **660075 Krasnojarsk**, p. k. 2420
– E-klubo, **662320 Ĉernenko**, p. k. 41
dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.

Dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.:
– Irina Stepanova, Okeanskij Prosp. 8, kv. 8-a, 690091 Vladivostok, 25j., fervoja inĝenierino
– Jelena Ignatenko, ul. Amurskaja 10, kv. 6, 690075 Vladivostok, 27j.
– Aleksej Jelankov, ul. Saĥalinskaja 39, kv. 58, 690080 Vladivostok

35j. instruistino dez. kor. tutmonde pri turismo, literaturo, manlaboro, kol. bk, librojn: Margit Vuus, **203181 Haapsalu raj.**, Ridala sjk. Estonio

29j. inĝenierino dez. kor. tutmonde pri lingvoj, pinglolaboro, kol. bk: Gintare Liatukaite, p. k. 541, **232024 Vilnius**

14j. knabo dez. kor. pri muziko, literaturo: Vitalij Opjonkov, **Soĉi**, ul. Bitha 37, kv. 92

32j. pentristino dez. kor. tutmonde pri pentroarto, kulturo, muziko, turismo: Graĵina Jaronyte, **234640 Varena**

12–17j. gelernantoj dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Dvorec Pionerov Esperanto, **454000 Ĉelabinsk**

Maria k Valdo Banaitis, **232031 Nova Vilnia**, Pergales 26-35, 43j., kuracistoj, dez. kor. kun kolegoj el orienteŭropo, Ĉinio, pri psikiatrio, alkoholismo, poezio.

Membroj de E-klubo dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Esperanto-Klubo, **654000 Novokuzneck**, ul. 25 let Oktjabrja 1, Inostrannij otdel biblioteki imeni Gogolja

21j. studentino pri fiziko dez. kor. kun geesp. el Bulgario, Hungario, Italio, Hispanio, p. ĉ. t., kol. bk, insignojn: Olga Bondarenko, **690039 Vladivostok**, av., 100-letija 103, E-klubo

Eldoninto de tiu ĉi numero:

GDR-MEM-sekcio, Kulturligo de GDR / asocia sekretariejo (Esperanto-Asocio). Redakcio: 1080 Berlin, Otto-Nuschke-Str. 1, Telefono 2 82 63 43. Respondeca redaktoro: D-ro sc. Detlev Blanke. Redakcia komisiono: Ludwig Schödl, Rudolf Hahlbohm, Werner Pfennig. Redakcia fino: 31-a de junio 1987. Presejo: Grafischer Grossbetrieb Völkerfreundschaft Dresden, Betriebsteil Meissen.
7409 - 36



Unua kovrilpaĝo:
Nikolai-kvartalo de Berlin. Monda Packonsilantaro distingis Berlin per la titolo „Urbo de la paco".

Lasta kovrilpaĝo:
Turingia Arbaro ĉe Tambach-Dietharz